



# EL POPOLA ĈINIO

星之少

不可燎原

战日东

Aŭtografo de Prezidanto Maŭ: "Sola fajrero povas bruligi la tutan stepon."



Ho Prezidanto Maŭ! Vi estas la plej plej ruĝa suno en la koro de la tutmonda popolo!

Jen Prezidanto Maŭ en Kanton, 1925.





# Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon

(La 5-an de januaro, 1930)

MAŬ ZEDONG

*(Tio ĉi estis letero skribita de kamarado Maŭ Zedong por kritiki la pesimismajn pensojn tiam ekzistantajn en la Partio.)*

**P**ARTO de la kamaradoj en nia partio ankoraŭ ne scias, kiel korekte taksu la nunan situacion kaj solvi la akompanantan demandon kiel agi. Kvankam ili kredas, ke la alta tajdo de revolucio neeviteble alvenos, tamen ili ne kredas, ke ĝi povos baldaŭ veni. Tial ili ne aprobas la planon preni la provincon Gianghi kaj aprobas nur la vagan geriladon en la tri areoj ĉe la limoj de Fugian,

Guangdong kaj Gianghi; kaj krome ili ankaŭ ne havas profundan komprenon pri la establo de ruĝa regpotenco en la gerilaj areoj, sekve ili ne havas profundan komprenon pri la akcelado de la landskala alta tajdo de la revolucio per la firmigo kaj disvastigo de tia ruĝa regpotenco. Ili ŝajne opinias, ke estas vane fari tian penigan laboron por establi regpotencon, kiam la alta tajdo de la revolucio estas

ankoraŭ malproksima. Anstataŭe, ili esperas plivastigi nian politikan influon per pli facila rimedo de vaga gerilado, kaj nur post kiam la laboro por gajni la amasojn tra la tuta lando jam estas bone plenumita aŭ farita ĝis certa grado, ili levos landskalan armitan ribelon, kio, kun la partopreno de la Ruĝa Armeo, fariĝos granda landskala revolucio. Tiu ilia teorio pri la establo de regpotenco nur post la gajno de la amasoj en tutlanda skalo kaj en ĉiuj lokoj ne konformas al la realaj kondiĉoj de la ĉina revolucio. Tiu teorio devenas ĉefe el tio, ke ili ne klare vidas, ke Ĉinio estas duonkolonio, por kiu interbatalas multaj imperiismaj landoj. Se oni klare vidas tion, do, unue, oni komprenos, kial en la tuta mondo, nur en Ĉinio estas tia strangaĵo de longtempa implikita militado interne de la regantaj klasoj, kial tiu militado intensiĝas kaj plivastiĝas tagon post tago, kaj kial neniam estis unueca regpotenco. Due, oni komprenos la gravecon de la problemo de kamparanoj, sekve oni komprenos ankaŭ, kial la leviĝoj en kamparoj havas tian landskalan disvolviĝon kiel nun. Trie, oni komprenos la korektecon de la slogano pri la laborista-kamparana demokratia regpotenco. Kvarre, oni komprenos la alian strangaĵon aperintan sekve de la strangaĵo de la longtempa implikita militado interne de la regantaj klasoj trovebla nenie en la mondo krom en Ĉinio, nome la ekziston kaj disvolviĝon de la Ruĝa Armeo kaj gerilaj trupoj, kaj kune kun tio la ekziston kaj disvolviĝon de etaj ruĝaj regionoj kreskantaj en la ĉirkaŭsieĝo de la blanka reĝimo (simila strangaĵo estas trovebla nenie, krom en Ĉinio). Kvine, oni komprenos, ke la establo kaj disvolviĝo de la Ruĝa Armeo, gerilaj trupoj kaj ruĝaj regionoj estas la plej alta formo de kamparana batalo sub la gvido de la proletaro en la duonkolonia Ĉinio, la neevitebla rezulto de la disvolviĝo de la kamparana batalo en duonkolonio, kaj sendube la plej grava faktoro por akceli la altan tajdon de la revolucio en la tuta lando. Kaj sese, oni ankaŭ komprenos, ke la politiko de nura vaga gerilado ne povas plenumi la taskon de akcelado de alta tajdo de revolucio en la tuta lando, sed sendube korektaj estas la politikoj adoptitaj de Ĝu De kaj Maŭ

Zedong kaj ankaŭ de Fang Ĝimin<sup>1</sup>, nome: la politikoj de establo de bazlokoj; de sistema starigo de regpotenco; de profundigo de la agrara revolucio; de pligrandigo de la popolaj armitaj fortoj per la tuta procedaro konstrui unue la subdistriktajn Ruĝajn Gvardiojn, poste la distriktajn Ruĝajn Gvardiojn, la guberniajn Ruĝajn Gvardiojn, la lokajn trupojn de la Ruĝa Armeo kaj fine la regulajn trupojn de la Ruĝa Armeo; de plivastigo de regpotenco en ondmaniera antaŭenpuŝiĝo, ktp. ktp. Nur tiamaniere estas eble starigi fidon de la revoluciaj amasoj en la tuta lando, kiel Sovetunio starigis ĝin en la tuta mondo. Nur tiamaniere estas eble krei grandegajn malfacilojn al la reakciaj regantaj klasoj kaj ŝanceli ilian bazon por rapidigi ilian internan diseriĝon. Kaj nur tiamaniere estas eble efektive krei la Ruĝan Armeon, por ke ĝi fariĝu la ĉefa armilo por la estonta granda revolucio. Unuvorte, nur tiamaniere estas eble akceli la altan tajdon de la revolucio.

Tiuj kamaradoj, kiuj suferas de malsano de revolucia malpacienco, trotaksas la subjektivan forton de la revolucio<sup>2</sup> kaj subtaksas la forton de la kontraŭrevolucio. Tia takso venas ĉefe de subjektivismo. Finfine, ĝi sendube kondukas al puĉismo. Aliflanke, se oni subtaksas la subjektivan forton de la revolucio kaj trotaksas la forton de la kontraŭrevolucio, ankaŭ tio estas ne konvena takso, kaj ĝi certe naskas malbonan rezulton en alia flanko. Tial, ĉe juĝo pri la politika situacio en Ĉinio estas necese kompreni jenajn fundamentajn punktojn:

1. Kvankam la subjektiva forto de la ĉina revolucio nun estas malgranda, tamen malfortaj estas ankaŭ ĉiuj organizaĵoj de la reakciaj regantaj klasoj (organizoj de regpotenco, armitaj fortoj, politikaj partioj ktp.), baziĝantaj sur la postiĝinta kaj malforta socia kaj ekonomia strukturo de Ĉinio. Tio helpas klarigi, kial revolucio ne povas tuj eksplodi en la landoj de la okcidenta Eŭropo, kie, kvankam la subjektiva forto de revolucio estas iom pli granda ol tiu en Ĉinio, tamen la forto de la reakciaj regantaj klasoj tie estas multoble pli granda ol tiu en Ĉinio. Kvankam la sub-

jektiva forto de la ĉina revolucio nuntempe estas ankoraŭ malgranda, tamen ankaŭ la forto de la kontraŭrevolucio estas relative malgranda, kaj tial la alta tajdo de la ĉina revolucio certe venos pli rapide ol tiu en la okcidenta Eŭropo.

2. Post la malvenko de la revolucio en 1927, la subjektiva forto de la revolucio vere multe reduktiĝis. La restanta eta forto kompreneble povas kaŭzi pesimisman al tiuj kamaradoj, kiuj juĝas nur laŭ iuj aspektoj. Tamen, se oni juĝas laŭ la esenco, tute alia estas la afero. Ĉi tie ni povas apliki la malnovan ĉinan diron: "Sola fajrero povas bruligi tutan stepon." Alivorte, kvankam niaj fortoj nun estas ankoraŭ malgrandaj, tamen ili disvolviĝos rapide. En la kondiĉoj de Ĉinio ili havas ne nur eblecon, sed eĉ neeviteblecon de disvolviĝo. Tio estas jam plene pruvita en la Movado de 30 Majo kaj la ĝin sekvanta Granda Revolucio. Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas ekzameni ĝian esencon kaj trakti ĝian aspekton kiel enkondukanton ĉe la sojlo, kaj transpaŝinte la sojlon ni devas tuj kapti ĝian esencon; nur tio estas fidinda kaj scienca metodo de analizo.

3. Simile, en la taksado pri la kontraŭ-revoluciaj fortoj, ni absolute ne devas rigardi nur ĝian aspekton, sed devas ekzameni ĝian esencon. En la komenca periodo de nia sendependa reĝimo en la Hunan-Gianghi-a Limregiono, iuj kamaradoj vere kredis la malĝustan takson de la tiama Provinca Komitato de Hunan, kaj rigardis la klasan malamikon kiel bagatelon; la du priskribaj esprimoj "ekstreme ŝanceliĝema" kaj "ekstreme terurita", kiuj nun ankoraŭ cirkulas ĉe ni kiel ŝercoj, estis uzitaj de la Provinca Komitato de Hunan tiutempe (de majo ĝis junio, 1928) en taksado de la hunan-a reganto Lu Diping<sup>3</sup>. Sub tia takso neeviteble naskiĝis puĉismo en politiko. Sed dum ĉirkaŭ kvar monatoj de novembro de la sama jaro ĝis februaro de la pasinta jaro (antaŭ la eksplodo de la milito inter Ĉiang Kajŝek kaj la guanghiaj militaristoj<sup>4</sup>), kiam la tria "kuna ekstermo"<sup>5</sup> proksimiĝis al Gingsangmontaro, iuj kamaradoj elmetis la demandon, "Kiom longe ni povas teni la ruĝan flagon?"

Fakte, tiam la batalo en Ĉinio inter Britio, Usono kaj Japanio jam fariĝis tre publika, kaj jam formiĝis la situacio de implikita militado inter Ĉiang Kajŝek, la guanghi-aj militaristoj kaj Feng Juhiang; fakte, tiam venis la tempo, kiam la kontraŭrevolucia tajdo jam komencis fali kaj la revolucia tajdo komencis denove leviĝi. Sed, tiam ne nur en la Ruĝa Armeo kaj lokaj partiaj organizoj ekzistis tia pesimisma penso, sed eĉ la Centra Komitato tiam estis nebuligita de la supraĵa aspekto kaj aŭdigis pesimisman tonon. La letero<sup>6</sup> de la Centra Komitato en februaro ja estas atesto pri la pesimisma analizo tiam farita en la Partio.

4. La nuna objektiva situacio ankoraŭ povas facile nebuligi la kamaradojn kiuj ekzamenas nur la supraĵan aspekton, sed ne la esencon de tio, kio prezentiĝas antaŭ ili. Precipe kiam niaj kamaradoj laborantaj en la Ruĝa Armeo suferas malvenkon en batalo, aŭ sin trovas en sieĝo, aŭ estas persekutataj de grandaj malamikaj fortoj, ili ofte nekonscie ĝeneraligas kaj troigas tian momentan, specifan, limigitan situacion, kvazaŭ la situacio en la tuta lando kaj la tuta mondo estas ne optimisma, kaj la perspektivo de la venko de la revolucio estas tre malproksima. La kaŭzo de tio ke ili nur kaptas la supraĵan aspekton sed forĵetas la esencon en sia observo de aferoj, kuŝas en tio, ke ili ne faris sciencan analizon pri la esenco de la ĝenerala situacio. La demando, ĉu la alta tajdo de la ĉina revolucio baldaŭ venos aŭ ne, estas decidita nur post detala ekzameno pri tio, ĉu vere disvolviĝas la diversaj kontraŭdiroj kiuj kondukas al la alta tajdo de revolucio. Ĉar disvolviĝas la kontraŭdiroj internacie inter la imperiismaj landoj, inter la imperiismaj landoj kaj la kolonioj, inter la imperiismaj landoj kaj ilia enlanda proletaro, tial pli akriĝas la neceso de la lukto inter la imperiismaj landoj por superregi Ĉinion. Kiam la lukto inter la imperiismaj landoj por superregi Ĉinion intensiĝas, la kontraŭdiro inter la imperiismaj landoj kaj la tuta Ĉinio kaj la kontraŭdiroj inter la imperiismaj landoj mem samtempe disvolviĝas interne de Ĉinio, kaj tio plivastigas kaj akriĝas tagon post tago

la implikitan militadon inter diversaj grupoj de reakciaj regantoj de Ĉinio kaj la kontraŭdiroj inter ili ĉiam daŭre disvolviĝas. Kune kun la kontraŭdiroj inter la diversaj grupoj de reakciaj regantoj — la implikita militado inter la militaristoj — venas pli pezaj impostoj, kio ĉiam pli akriĝas la kontraŭdirojn inter la vastaj amasoj de impostpagantoj kaj la reakciaj regantoj. Kune kun la kontraŭdiro inter imperiismo kaj la nacia industrio de Ĉinio estiĝas la fakto, ke la nacia industrio de Ĉinio ne povas ricevi cedon de la imperiismo, kio akriĝas la kontraŭdiron inter la ĉina burĝaro kaj la ĉina laboristaro, nome la ĉinaj kapitalistoj klopodas trovi elirejon per freneza subpremado al la laboristoj kaj la ĉinaj laboristoj rezistas siavice. Kune kun la komerca invado de la imperiistoj, la ekspluato de la ĉinaj komercaj kapitalistoj kaj la plipeziĝo de la impostoj de la registaro, k. c., des pli profundiĝas la kontraŭdiro inter la bienularo kaj la kamparano, t. e. plipeziĝas la ekspluato per terrento kaj uzuro, kaj la kamparanoj des pli malamegas la bienulojn. Pro la premado de la eksterlandaj varoj, la elĉerpiĝo de la aĉetpovo de la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj plipeziĝo de la impostoj de la registaro, pli kaj pli da komercistoj de ĉinaj varoj kaj sendependaj produktistoj suriras la vojon de bankroto. La senlima ekspansiigo de la trupoj fare de la reakcia registaro malgraŭ la manko de sufiĉaj proviantoj kaj soldoj, kaj la ĉiam pli multiĝantaj de tio militadoj ofte ĵetas la soldatajn amasojn en malfacilojn kaj suferojn. Pro la plipeziĝo de la impostoj de la registaro, la plialtiĝo de la terrento kaj interezo de la bienuloj kaj plivastiĝo de la militaj katastrofoj kun ĉiu tago, estiĝis plagoj kaj raboj tra la tuta lando, tiel ke la vastaj amasoj de kamparanoj kaj urbaj malriĉuloj falis en senelirejon. Pro manko de mono por funkciigi lernejojn, multaj lernantoj timas ke ilia lernado interrompiĝos; pro estiĝinteco de produktado, multaj diplomitoj ne havas esperon akiri laborpostenon. Se ni komprenas la supre diritajn kontraŭdirojn, do ni vidos, sub kia maltrankvila situacio kaj en kia ĥaoso Ĉinio sin trovas. Ni ankaŭ vidos, kiel neeviteble

kaj rapide alvenos la alta tajdo de revolucio kontraŭ imperiismo, militaristaro kaj bienularo. La tuta Ĉinio estas plena de sekaj brullignoj, kiuj baldaŭ brulegos. La diro “Sola fajrero povas bruligi tutan stepon” estas taŭga priskribo pri la disvolviĝo de la nuna situacio. Nur per ekrigardo al la en multaj lokoj disvolviĝantaj laboristaj strikoj, leviĝoj de kamparanoj, ribeloj de soldatoj kaj strikoj de lernantoj, oni jam povas vidi ke tiu ĉi “sola fajrero” bruligos “tutan stepon” sendube en ne malproksima estonto.

La esencon de la supra diraĵo jam entenis la letero de la Ĉeffronta Komitato al la Centra Komitato datita je la 5-a de aprilo lastjare. Tiu letero diras interalie:

La letero de la Centra Komitato (datita je la 9-a de februaro, lastjare) faris tro pesimisman takson pri la objektiva situacio kaj nia subjektiva forto. La tri “ekstermaj kampanjoj” kontraŭ Ginggaŝ-montaro fare de Kuomintango signis la kulminon de la kontraŭrevolucia tajdo. Sed tie ĝi haltis, kaj poste la tajdo de la kontraŭrevolucio grade malaltiĝas, dum la tajdo de la revolucio grade altiĝas. Kvankam la batal-kaj organiz-fortoj de la Partio malgrandiĝas ĝis la grado priskribita de la Centra Komitato, tamen ili certe restariĝos tre rapide, kaj la pasiva sinteno de la kadroj en la Partio rapide malaperos, sub la situacio de la malaltiĝo de la tajdo kontraŭrevolucia. La amasoj certe sin turnos al ni. La reakcia politiko de masakrado<sup>7</sup> servas nur por “peli la fiŝojn en abismon”, kaj reformismo ne plu povas altiri la amasojn. La iluzio de la amasoj al Kuomintango certe forvoriĝos baldaŭ. Sub la estonta situacio neniu partio povos konkuri kun la Komunista Partio en gajno de la amasoj. La politika linio kaj organiza linio difinitaj de la Sesa Tutlanda Kongreso de la Partio<sup>8</sup> estas korektaj, t. e., la revolucio en la nuna etapo estas demokratia sed ne socialisma, kaj la nuna tasko de la Partio (tie ĉi devas aldoniĝi la vortoj “en la grandaj urboj”) estas gajni la amasojn sed ne tuj okazigi



ribelejn. Tamen la disvolviĝo de la revolucio estos tre rapida, kaj ni devas preni aktivan sintenon en nia propagando kaj preparado de armitaj ribeloj. En la nuna situacio de granda ĥaoso ni povas gvidi la amasojn nur per pozitivaj sloganoj kaj aktiva sinteno. Nur per tia aktiva sinteno la batalforto de la Partio povas restariĝi... La gvido de la proletaro estas la sola ŝlosilo por la venko de la revolucio. Establi proletaran bazon de la Partio kaj starigi partiajn filiojn en industriaj entreprenoj en centraj regionoj estas la nunaj gravaj organizaj taskoj de la Partio, sed, samtempe, la disvolvo de batalo en la kamparo, la establo de la ruĝa regpotenco en malgrandaj regionoj, kaj la kreo kaj ekspansio de la Ruĝa Armeo estas precipe la ĉefaj kondiĉoj por helpi la batalon en la urboj kaj akceli la altiĝon de la revolucia tajdo. Tial, estas erare forlasi la batalon en la urboj; sed, laŭ nia opinio, ankaŭ tio estas eraro, se iuj el niaj partianoj timas la disvolviĝon de la kamparanaj fortoj, pensante ke ties fortoj superos tiujn de la laboristoj kaj tiel malutilos al la revolucio. Ĉar, por la revolucio de la duonkolonia Ĉinio, nur povas esti ke la kamparana batalo malvenkas sen la gvidado flanke de la laboristoj, sed neniam povas esti ke al la revolucio malutilas la disvolviĝo de la kamparana batalo super tiu de la laboristoj.

En tiu ĉi letero estis jena respondo al la demando pri la taktiko de la operaciado de la Ruĝa Armeo:

Por konservi la Ruĝan Armeon kaj mobilizi la amasojn, la Centra Komitato postulas ke ni dividu niajn trupojn en tre malgrandajn unuojn kaj disiru al la vilaĝoj, ke Ĝu De kaj Maŭ Zedong foriru de la armeo kaj ke ni forkaŝu la grandajn celaĵojn. Tio ĉi estas nereala ideo. Ekde la vintro de 1927, ni jam planis dismeti niajn fortojn tra la kamparo, por ke ĉiu roto aŭ bataliono aparte agadu memstare kaj adoptu gerilajn taktikojn por mobilizi la amasojn sen prezenti celaĵon al la malami-

ko; multfoje ni praktikis tiun planon, sed ĉiufoje malsukcesis. La kialoj estas: (1) plejparto de la soldatoj en la ĉefa forto de la Ruĝa Armeo ne estas indiĝenoj, kaj diferencas de la lokaj ruĝgvardianoj en la deveno; (2) divido de niaj fortoj en tre malgrandajn unuojn rezultigas malfortigon de la gvido kaj nebligas venki malfacilojn, kaj tio facile kondukas al malsukceso; (3) la unuoj povas esti facile kaj unuope frakasitaj de la malamikoj; (4) ju pli malbonaj estas la kondiĉoj, des pli necesas koncentriĝo de la fortoj, kaj des pli necesas firma batalado de la gvidantoj, ĉar nur tiamaniere ni povas unuiĝi interne kontraŭ la malamiko. Nur en favoraj cirkonstancoj ni povas dividi niajn fortojn por gerilaj bataloj kaj nur tiam la gvidantoj ne bezonas ĉiam resti kun la trupoj kiel ili devas en la malfacilaj cirkonstancoj.

La manko en tiuj ĉi vortoj estas: la kialoj elmetitaj kontraŭ divido de la fortoj estas negativaj, kaj tio tute ne sufiĉas. La pozitivaj kialoj por koncentri la fortojn estas: Nur koncentriĝo ebligas al ni ekstermi relative grandajn malamikajn fortojn kaj okupi urbojn kaj urbetojn. Nur post kiam ni estos ekstermintaj relative grandajn malamikajn fortojn kaj okupintaj urbojn kaj urbetojn, ni povos mobilizi la amasojn en granda skalo kaj establi regpotencon en kelkaj najbaraj gubernioj. Nur tiamaniere ni povos vaste altiri la atenton de la amasoj (tio estas nomata plivastigo de politika influo), kaj doni efektivan efikon al la rapidigo de alta tajdo de la revolucio. Ekz-e, la regpotenco en Hunan-Gianghi-a Limregiono establita de ni en la antaŭlasta jaro kaj tiu en okcidenta Fugian pasintjare<sup>9</sup> ambaŭ estas rezulto de la politiko de koncentro de niaj fortoj. Tio ĉi estas ĝenerala principo. Sed, ĉu ne estas okazoj, kiam niaj fortoj devas esti dividitaj? Jes, estas. La letero de la Ĉeffronta Komitato al la Centra Komitato parolas pri la gerilaj taktikoj de la Ruĝa Armeo, inkluzive de la divido de fortoj en malgranda distanco:

La taktikoj, kiujn ni akiris en la bataloj dum la lastaj tri jaroj, estas tute malsamaj ol

iu ajn alia taktiko antikva aŭ moderna, enlanda aŭ eksterlanda. Per niaj taktikoj, la amasoj povas esti mobilizitaj por batalo en ĉiam pli granda skalo, kaj nenia potenca malamiko povas nin subigi. Niaj taktikoj estas tiuj de gerilado. Mallonge dirite ili estas:

“Dividi la fortojn por mobilizi la amasojn, koncentri la fortojn por agi kontraŭ la malamiko.”

“Kiam la malamiko almarŝas, ni retiriĝas; kiam ĝi kampadas, ni ĝin ĝenas; kiam ĝi laciĝas, ni ĝin atakas; kiam ĝi retiriĝas, ni ĝin persekutas.”

“Por vastigi stabilajn regionojn<sup>10</sup>, ni alprenas la politikon de antaŭenpuŝiĝo en ondmaniero. Persekutate de forta malamiko, ni alprenas la politikon de rondirado.”

“Mobilizi tre vastajn amasojn en tre mallonga tempo kaj per tre bonaj metodoj.”

Tiaj taktikoj similas al uzado de reto; je ĉiu ajn momento ni devas povi ĝin etendi aŭ kuntiri, etendi por gajni la amasojn kaj kuntiri por agi kontraŭ la malamikoj. Tiaj estis la taktikoj praktikataj de ni dum la lastaj tri jaroj.

Tie ĉi “etendi” signifas dividi la fortojn en malgranda distanco. Ekzemple, kiam ni unuafoje okupis la gubernian urbon Jonghin en la Hunan-Gianghi-a Limregiono, ni disigis la fortojn de la 29-a kaj 31-a regimentoj interne de Jonghin-gubernio. Denove, kiam ni triafoje okupis Jonghin, ni sendis la 28-an regimenton al la limo de Anfu-gubernio, la 29-an regimenton al Lianhua kaj la 31-an regimenton al la limo de Gi-an-gubernio. Ankaŭ tiel dividis ni la fortojn en diversaj gubernioj de suda Gianghi en aprilo kaj majo kaj en diversaj gubernioj de okcidenta Fugian en julio de la lasta jaro. Rilate al divido de fortoj en granda distanco, ĝi eblas nur sub du kondiĉoj, nome la cirkonstancoj estas relative favoraj kaj la gvida organo estas relative forta. Ĉar la celo de divido de fortoj estas akiri pli grandan eblecon gajni la amasojn, profundigi la

agraran revolucion, establi regpotencon kaj ekspansiigi la Ruĝan Armeon kaj lokajn armittajn fortojn. Estas pli bone ne fari dividon, se tiuj celoj ne povas esti atingitaj, aŭ, kontraŭe, la divido de niaj fortoj kondukus al malvenko aŭ malfortiĝo de la Ruĝa Armeo, kiel en aŭgusto de la antaŭlasta jaro, kiam ni dividis niajn fortojn ĉe la limo de Hunan kaj Gianghi por ataki Ĉenĝoŭ. Sed sendube ni devas dividi niajn fortojn, se ni jam havas la supre diritajn du kondiĉojn, ĉar sub tiuj kondiĉoj divido estas pli avantaĝa ol koncentro.

La februara letero de la Centra Komitato ne estis en la ĝusta spirito, kaj donis malbonan influon al parto de kamaradoj en la Partio de la Kvara Armeo. Tiam la Centra Komitato ankaŭ dissendis cirkuleron, asertantan ke ne nepre eksplodos milito inter Ĉiang Kajŝek kaj la guanghi-aj militaristoj. Tamen, depost tiam, la taksoj kaj instrukcioj de la Centra Komitato ĝenerale estas ĝustaj. Koncerne al la cirkulero kiu faris nekonvenan takson, la Centra Komitato jam dissendis alian cirkuleron por ĝin korekti. Koncerne al la letero al la Ruĝa Armeo, kvankam la Centra Komitato ne faris korekton, tamen la postaj instrukcioj jam ne entenis tian pesimisman tonon kaj ĝiaj opinioj pri la aktivadoj de la Ruĝa Armeo koincidas kun la niaj. Tamen la malbona influo de la letero de la Centra Komitato ĉe parto de kamaradoj ankoraŭ ekzistas. Tial mi opinias, ke estas necese fari eksplikon pri tiu problemo eĉ nun.

Ankaŭ la plano pri preno de Gianghi en unu jaro estis elmetita de la Ĉeffronta Komitato al la Centra Komitato en aprilo de la pasinta jaro kaj la decido pri ĝi estis farita poste en Judu. Jenaj kialoj estis montritaj en la letero al la Centra Komitato:

La armeoj de Ĉiang Kajŝek kaj la guanghi-aj militaristoj interproksimiĝas unu al la alia ĉe Giugiang, kaj tuj eksplodos granda batalo. La restarigo de la amasaj bataloj kaj la disvastiĝo de la kontraŭdiroj interne de la reaciaj regantoj ebligas, ke baldaŭ alvenos la alta tajdo de la revolucio.

Koncerne al aranĝado de niaj laboroj sub tia situacio, ni sentas ke en la du el la sudaj provincoj, Guangdong kaj Hunan, la armitaj fortoj de la kompradoroj kaj bienuloj estas tro grandaj, kaj ke en Hunan, krome, ni preskaŭ tute perdis niajn amasojn en kaj ekster la Partio pro la puĉismaj eraroj de la Partio. La situacio en la tri provincoj Fugian, Gianghi kaj Ĝegiang, tamen, estas alia. Unue, la fortoj de la malamikaj trupoj en tiuj provincoj estas plej malgrandaj. En Ĝegiang estas nur malmulte da provincaj garnizonaj trupoj de Giang Boĉeng<sup>11</sup>. En Fugian, kvankam estas kvin grupoj da malamikaj trupoj konsistantaj el 14 regimentoj, tamen la trupoj de Guo Fengming<sup>12</sup> jam estas frakasitaj; la trupoj de Ĉen Guohuj kaj Lu Hingbang<sup>13</sup> ĉiuj estas banditoj, kaj havas tre malgrandan batalforton; la du brigadoj de marinfanterio ĉe la marbordo neniam faris batalon, do certe ne havas grandan batalforton; nur la trupoj de Ĝang Ĝeng<sup>14</sup> iom kapablas batali, sed laŭ la analizo de la Fugiana Provinca Komitato nur du el liaj regimentoj estas relative fortaj. Krome, Fugian nun tute dronas en ĥaoso kaj malunueco. En Gianghi, la trupoj de Ĝu Pejde<sup>15</sup> kaj Hiong Ŝihuj<sup>16</sup> sume el 16 regimentoj estas pli fortaj ol la trupoj en Fugian aŭ Ĝegiang, kvankam en komparo kun tiuj en Hunan ili estas multe malpli fortaj. Due, malpli multe da puĉismaj eraroj estas faritaj en tiuj tri provincoj. Ni ne klare konas la situacion en Ĝegiang, sed la organiza kaj amasa bazo de la Partio en la provincoj Gianghi kaj Fugian estas pli bona ol tiu en Hunan. Prenu Gianghi kiel ekzemplon: en norda Gianghi ni ankoraŭ havas konsiderindan amasan bazon en De-an, Hiuŝuj kaj Tonggu; en okcidenta Gianghi ankoraŭ ekzistas la fortoj de la Partio kaj la Ruĝa Gvardio en Ninggang, Jonghin, Lianhua, Sujĉuan; en suda Gianghi estas ankoraŭ pli granda espero, ĉar la 2-a kaj 4-a regimentoj de la Ruĝa Armeo en Gi-an, Jongfeng, Hingguo kaj

aliaj gubernioj ĉiam pli kaj pli tendencas al disvolviĝo; kaj la Ruĝa Armeo gvidata de Fang Ĝimin ne estas ekstermita. Tiel kreiĝis la situacio por formi sieĝon ĉirkaŭ Nanĉang. Ni proponas al la Centra Komitato, ke dum la periodo de longdaŭra militado inter la kuomintangaj militaristoj, ni devas konkuri kun Ĉiang Kajŝek kaj la guanghiaj militaristoj por preni Gianghi kaj samtempe por preni okcidentan Fugian kaj okcidentan Ĝegiang. En la tri provincoj ni devas vastigi la Ruĝan Armeon, krei sendependan reĝimon de la amasoj, kaj la limigita tempo por plenumi tiun ĉi planon estas unu jaro.

La propono pri la preno de Gianghi eraris nur en la difino de limigita tempo de unu jaro. Koncerne al la preno de Gianghi, tio baziĝis ne nur sur la kondiĉoj en Gianghi mem, sed ankaŭ sur la perspektivo de la baldaŭa alveno de alta tajdo de revolucio en la tuta lando. Ĉar, se ni ne konvinkiĝus ke baldaŭ alvenos la alta tajdo de revolucio, ni tute ne povus veni al la konkludo ke ni povas preni Gianghi en unu jaro. La sola manko en la propono estis, ke ĝi difinis la limigitan tempon je unu jaro, tiel donante nuancon de malpacienco al la "baldaŭ" en la diro "baldaŭ alvenos la alta tajdo de la revolucio". Koncerne al la subjektivaj kaj objektivaj kondiĉoj en Gianghi, ili estas atentindaj. Krom la subjektivaj kondiĉoj preparolataj en la letero al la Centra Komitato, tri objektivaj kondiĉoj nun povas esti klare montritaj: Unue, la ekonomio en Gianghi ĉefe estas feŭda, la influo de la komerca burĝaro estas relative malgranda, kaj la armitaj fortoj de la bienularo estas pli malfortaj ol tiuj en iu ajn cetera suda provinco. Due, Gianghi ne havas siajn provincajn trupojn, kaj en ĝi ĉiam garnizonas trupoj el aliaj provincoj. La deekstere venintaj trupoj por "ekstermado de komunistoj" kaj "ekstermado de banditoj" ne bone konas la lokajn cirkonstancojn, kaj iliaj interesoj estas multe malpli rekte tuŝataj, ol la lokaj trupoj, kaj al ili ofte mankas entuziasmo. Trie, malsimile al Guangdong, kiu estas proksima al Hongkong kaj kie pres-

kaŭ ĉio estas sub la kontrolo de Britio, Gianghi estas relative malproksima de la influo de imperiismo. Kompreninte tiujn tri punktojn, ni do povas ekspliki, kial la leviĝoj en la kamparo estas pli disvastigitaj, kaj la gerilaj trupoj de la Ruĝa Armeo en Gianghi estas pli multaj ol tiuj en iu ajn alia provinco.

La komuna demando por multaj kamaradoj estas, kiel kompreni la “baldaŭ” en la diro “baldaŭ alvenos la alta tajdo de la revolucio”. Marksistoj ne estas sortodivenistoj. Ili devas kaj povas montri nur ĝeneralan direkton de la estontaj disvolviĝoj kaj ŝanĝiĝoj, sed ne devas kaj ne povas meĥanike difini la daton. Tamen la baldaŭa alveno de alta tajdo de revolucio, pri kiu mi parolis, absolute ne estas la t.n. “ebleco de baldaŭa alveno” parolata de iuj homoj, kiu estas nur iluzio neatingebla kaj tute ne havanta signifon de agado. Ĝi estas kvazaŭ ŝipo en la maro, kies mastopinto jam estas videbla de la marbordo; ĝi estas kvazaŭ leviĝanta matena suno en la oriento, kies disradianta brilo jam estas videbla de la altega montpinto; ĝi estas kvazaŭ bebo, kiu intense moviĝadas en la ventro de la patrino kaj baldaŭ venos en la mondon.

## KLARIGOJ

1. K-do Fang Ĝimin naskiĝis en Jijang, Gianghi-provinco. Li estis komitatano de la Sesa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kreinto de la ruĝa regiono en nordorienta Gianghi-provinco kaj de la Deka Korpuso de la Ruĝa Armeo. En 1934 li kondukis la avangardan taĉmenton de la Ruĝa Armeo marŝi norden por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. En januaro de 1935 li estis arestita dum batalo kontraŭ kontraŭrevoluciaj kuomintangaj trupoj. En julio de la sama jaro li heroe oferis sian vivon en Nanĉang.

2. “La subjektiva forto de la revolucio” ĉi tie priparolata de k-do Maŭ Zedong temas pri la organizitaj revoluciaj fortoj.

3. Lu Diping, kuomintanga militaristo, estis kuomintanga provinestro de Hunan en 1928.

4. Temas pri la milito inter la nankin-a militaristo Ĉiang kajŝek kaj la guanghi-aj militaristoj Li Zongĵen kaj Baj Zunghi en marto kaj aprilo de 1929.

5. La tria atako de la kuomintangaj militaristoj de Hunan kaj Gianghi al la bazloko de la Ruĝa Armeo

en Gینگang-montaro inter la fino de 1928 kaj la komenco de 1929.

6. Temas pri la letero de la Centra Komitato al la Ĉefronta Komitato, datita je la 9-a de februaro de 1929. La letero de la Ĉefronta Komitato al la Centra Komitato en la dato de la 5-a de aprilo de 1929 kaj citita en tiu ĉi verko koncize resumis la enhavon de tiu letero, kiu ĉefe tuŝis la takson pri la tiama situacio kaj la taktikon de la agado de la Ruĝa Armeo. La opinioj elmetitaj en la letero de la Centra Komitato ne estis konvenaj, kaj tial la Ĉefronta Komitato esprimas malsamajn opiniojn en sia letero al la Centra Komitato.

7. Temas pri la rimedo de sanga masakrado, kiun la kontraŭrevoluciaj fortoj aplikis kontraŭ la revoluciaj fortoj de la popolo.

8. La Sesa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazis en julio de 1928. Ĝi montris, ke post la malvenko de la revolucio en 1927 la ĉina revolucio restas, en naturo, burĝara demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kaj montris ankaŭ ke la alveno de nova alta tajdo de la revolucio estas neevitebla, sed tiu ĉi nova alta tajdo de la revolucio ankoraŭ ne alvenis, tial la ĝenerala linio de la revolucio estas gajni la amason. La Sesa Kongreso likvidis la dekstran kapitulacismon de Ĉen Duĥiu en 1927 kaj ankaŭ kritikis la “maldekstran” puĉismon ekzistantan en la Partio en la fino de 1927 kaj en la komenco de 1928, post la malvenko de la revolucio en 1927.

9. En 1929 la Ruĝa Armeo en Gینگang-montaro faris orientan ekspedicion al Fugian, starigis novan revolucion bazlokon kaj establis popolan revolucion regpotencon en la gubernioj Longjan, Jongding kaj Ŝanghang en la okcidenta parto de Fugian.

10. Stabilaj bazregionoj estas la relative stabilaj revoluciaj bazlokoj establitaj de la Laborista-kamparana Ruĝa Armeo.

11. Giang Boĉeng tiam estis la komandanto de la kuomintangaj sekurigaj trupoj en Ĝegiang-provinco.


12. Temas pri la brigado sub la komando de Guo Fengming, kiu estas parto de la kuomintangaj trupoj en Fugian.

13. Ĉen Guohuj kaj Lu Hingbang estis du fifamaj fugian-aj banditoj, kies trupoj estis reorganizitaj en la kuomintangan armeon.

14. Ĝang Ĝeng, diviziestro de la kuomintanga armeo.

15. Ĝu Pejde, kuomintanga militaristo, tiutempe estis kuomintanga provinestro de Gianghi.

16. Hiong Ŝihuj tiutempe estis diviziestro de la kuomintanga armeo garnizonanta en Gianghi-provinco.



# Eterne Flirtados

## la Ruĝa Flago

### de Ginggaŝ-montaro

SONGTAŬ

**L**AŬTE kantas la ondanta maro de pinoj sur Ginggaŝ-montaro, kaj ĝoje huraas la verdaj ondoj de la mil-lia rivero Gangiang: sub la kora prizorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉe la alveno de la pompe brilanta jaro 1968, kaj en la klarionado de antaŭenmarŝo por gajni la kompletan venkon de la granda proletara kultura revolucio, fondiĝis la Revolucia Komitato de Gianghi-provinco!

Antaŭ kvardek jaroj, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone starigis la revolucionan ruĝan flagon sur Ginggaŝ-montaro kaj malfermis la brilan revolucionan vojon de sieĝo de la urboj per la kamparo por kapti armite la ŝtatan potencon. De tiam, la heroaj gefiloj de Ginggaŝ-montaro sekvis strikte la grandan ĉefkomandanton Prezidanto Maŭ, tutanime kaj fidele faris revolucion sub la direktado de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, kaj skribis grandiozan epopean paĝon en la historio de la ĉina revolucio.

Dum longa periodo, la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Gianghi, Fang Ĝiĉun kaj similaj, arogante staris kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj plenenergie praktikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion, vane intencante ŝanĝi la koloron de Gianghi, la malnova ruĝa bazloko. Por defendi la proletaran revolucionan linion de Prezidanto Maŭ, la revolucia popolo de Gianghi, kiu estas fidela al Prezidanto Maŭ, kondukis pinto-kontraŭpintan heroan batalon kontraŭ tiu ĉi plenmano da klasaj malamikoj. Kaj dum la granda proletara

kultura revolucio, ili strikte sekvis la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, kaj akiris grandan venkon, trarompante multajn obstaklojn kaj subigante furiozajn ventojn kaj insidajn ondojn.

#### **POR ĈIAM FIDELAS AL PREZIDANTO MAŬ LA GEFILOJ DE GINGGANG-MONTARO**

De la grandioza Ginggaŝ-montaro ĝis la vasta Pojang-lago, ĉie oni povas aŭdi la vortojn de la proletara revoluciularo de Gianghi eldiritajn kun senlime profunda amsono: "Ho Prezidanto Maŭ, al Vi plej fidelas la gefiloj de Ginggaŝ-montaro!" Tiu diro estas la plej kara hereda trezoro de la revoluciuloj de la malnova generacio en la malnova revolucia bazloko de Gianghi kaj la plej firma ĵuro de iliaj gefiloj. La granda penso de Maŭ Zedong estas la plej fundamenta garantio por la venko de la granda proletara kultura revolucio en Gianghi.

En la urbo Gi-an ĉe la piedo de Ginggaŝ-montaro, kelkdek maljunaj emeritaj eksruĝarmeanoj formis "Ruĝarmean Propagandan Trupon" kun kamarado Peng Ĵenŝan kiel la ĉefo, por defendi la proletaran revolucionan linion de Prezidanto Maŭ. Dum la tagoj kiam regis la blanka teroro de la burĝara reakcia linio, ili luktis kune kun la junaj batalantoj en ventoj kaj pluvoj kvazaŭ samboatanoj. Tage, ili kune skribis daŭzibaŭojn kaj, nokte, kune gardostaris. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la ka-



*Parto de la kunvenejo*

pitalisman vojoni rigardis ilin kiel najlojn en la okuloj kaj dornojn en la karno kaj insultis ilin: "Vi estas jam maljunaj kaj ne multe taŭgas. Ne kreu tumulton." Kamarado Peng Ĵenŝan decideme respondis kun flegma indigno kontraŭ tiuj fiuloj: "Kvankam ni estas maljunaj, tamen, ne maljuniĝis kaj neniam maljuniĝos niaj ruĝaj koroj fidelaj al Prezidanto Maŭ!"

Same kiel la maljunaj eksruĝarmeanoj de Gian, pli ruĝajn korojn senlime fidelajn al Prezidanto Maŭ havas hodiaŭ la maljunaj estintaj ruĝgardianoj, kiuj siatempe sekvis Prezidanton Maŭ en revolucio, la antaŭaj batalantoj de ribelaj trupoj, kiuj siatempe firme gardostaris sur Gingga-montaro, la maljunaj eksruĝarmeanoj, kiuj trapasis la neĝan montaron kaj marĉan stepon en la Longa Marŝo, kaj la maljuna generacio de Gingga-montaro, kiu militiris suden kaj norden inter vivo kaj morto. Kaj en la plej kriza momento de la granda proletara kultura revolucio, ili firme staras ĉe la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, sen hezito eĉ je sekundo kaj ŝanceliĝo eĉ je hareto!

La maljuna generacio de Gingga-montaro starigis por la junaj revoluciaj batalantoj brilan ekzemplon de plej granda fideleco al Prezidanto Maŭ. Heredante de la antaŭuloj tiun gloran tradicion la juna generacio kantis batalanton por esprimi sian fidelon al Prezidanto Maŭ kaj mortpretecon por defendi lin: "Ne gravas kapoperdo, sed venku l' ver' en certo; por defendi Prezidanton Maŭ, ni nin oferos en preto!" Laŭte kantante tiun ĉi heroan batalanton, ili kuraĝe batalis kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en Gianghi.

La junaj ruĝgardianoj de la Nanĉang-a Kvina Mezlernejo montris sin indaj gefiloj de Gingga-montaro el la juna generacio. Ekde junio de 1966, alte tenante la revolucian standardon, kune kun la revoluciaj ribeluloj en Nanĉang, ili trabatalis al si vojon tra sennombraj obstakloj el sub la pezaj subpremoj de la burĝara reakcia linio.

"Kapleve vidas ni la Nordan Stelon sur ĉiel-kupolo, tuj al Maŭ Zedong eksopiras nia tuta koro." Ĝuste en tiuj tagoj de blanka teroro, la gefiloj de

Ginggang-montaro ĉiam sopiris al la plej estimata kaj plej amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kun plena kredo al venko en la koro kaj neelĉerpebla forto en la korpo.

La heroaj gefiloj de Ginggang-montaro senlime kaj por ĉiam fidelas al Prezidanto Maŭ, tio estas ja ilia plej alta konscio kaj plej bona virto, kaj la esenco de la revolucia spirito de Ginggang-montaro!

### **LA GEFILOJ DE GINGGANG-MONTARO PLEJE AŬSKULTAS LA VORTOJN DE PREZIDANTO MAŬ**

La riveroj jubilis, la homoj ridis, kaj la montoj hurais. Dum sia inspekta vojaĝo al la regionoj de norda Ĉinio, sud-centra Ĉinio kaj orienta Ĉinio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ venis al Gianghi kaj direktis la gefilojn de Ginggang-montaro por gajni novajn kaj pligrandajn venkojn en la granda proletara kultura revolucio!


Tiuj tagoj estas plej neforgeseblaj kaj plej felikaj por la gefiloj de Ginggang-montaro!

Ĉi-okaze, kamarado Ĉen Ĉangfeng, membro de la prepara grupo de la Provinca Revolucia Komitato kaj eksruĝarmeano, kiu sekvis Prezidanton Maŭ en la Longa Marŝo, revidis Prezidanton Maŭ kaj aŭdis grandan kaj saĝan instrukcion de Prezidanto Maŭ pri la granda kultura revolucio en Gianghi. De Ginggang-montaro al Jan-an, de Jan-an al Pekino, en sia longlonga vojaĝo plena de furiozaj kaj insidaj ondegoj, la ĉina revolucio antaŭeniris laŭ la direkto montrita de la granda direktilisto Prezidanto Maŭ, de venko al venko, ĉirkaŭirante sennombrajn rifojn kaj danĝerajn malprofundejojn.

Tra la kelkdekjara revolucia praktikado, kamarado Ĉen Ĉangfeng kaj la gefiloj de Ginggang-montaro ĉiuj profunde komprenas tiun ĉi grandan veron: "Marnavigo dependas de la stiristo, revolucio dependas de la penso de Maŭ Zedong."

*Kun nomtabulo de la Revolucia Komitato de Gianghi-provinco la revolucia amaso ĝoje festas ĝian fondiĝon.*





*Monumento por la revoluciaj martiroj sur Gingga-montaro*

Se oni aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, la revolucio disvolviĝas kaj venkas; se oni, male, kontraŭstaras la instruojn de Prezidanto Maŭ, la revolucio retroiras kaj suferas malvenkojn!

“Kiel instrukcias Prezidanto Maŭ, tiel agas ni.” Jen estas la plej granda saĝo, plej granda povo kaj plej granda kapablo de la gefiloj de Gingga-montaro.

En Hingguo — la modela gubernio en la ruĝa bazloko siatempe laŭdita de Prezidanto Maŭ, la revoluciuloj plej firme plenumas la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, sen ia hezito aŭ ajna deflankiĝo.

En tiu ĉi gubernio, du gvidaj kadroj praktikis la burĝaran reakcian linion en la komenco de la granda kultura revolucio. Poste, la superuloj decidis sendi ilin al Pekino por studi en kurso. Ĉu oni konsentu al tio? Parto de la kamaradoj diris: “Kiel oni povus permesi studi en Pekino al tiuj, kiuj faris eraron de direkto kaj linio? Ne, tute ne!” Sed kamaradino Hju Gujĵing, telefonistino de la Oficejo de Poŝto kaj Telekomuniko, kiu nun estas respondeculino de la Prepara Komitato por Granda Unuiĝo de la gubernio kaj pasinte estis kvalifikita de la du gvidaj kadroj kiel kontraŭ-revoluciulo, diris: “Partopreno de kadroj en studa kurso estas instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ni devas tion subteni senkondiĉe! Mi kredas, ke ili certe akiros pli da penso de Maŭ Zedong en Pekino.” Ŝi meminiciate

interŝanĝis pensojn kun tiuj ĉi du gvidaj kadroj kaj persone akompanis ilin al la stacidomo.

Miloj kaj dekmiloj da gefiloj de Gingga-montaro senŝanceliĝe kredas al la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj decideme plenumas ilin same kiel la hingguo-aj revoluciuloj.

Senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la gefiloj de Gingga-montaro, kiuj atenteme studas ĉiun novan instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj plenumas ĝin decideme, akiris venkon post venko por la granda proletara kultura revolucio en Gianghi.

Kiam Prezidanto Maŭ alvokis ke oni “**kontraŭbatalu egoismon kaj kritiku reviziismon**”, la gefiloj de Gingga-montaro tuj prenis laborejojn, kamprandojn, klasĉambrojn kaj kazernojn kiel batalejojn por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon. Kaj dum mallonga tempo, estis fonditaj en la urboj kaj la kamparo tra la tuta provinco ĉirkaŭ dek mil studgrupoj de la penso de Maŭ Zedong kun sume dekmiloj da partoprenantoj.

Kiam Prezidanto Maŭ alvokis, ke oni “**efektivigu grandan revolucian unuiĝon sub la principo de revolucio**”, efektiviĝis en unu monato la granda revolucia unuiĝo tiel sur la diversaj frontoj de la heroa urbo Nanĉang, kiel en la ses subprovincoj kaj pli ol 90 procentoj el la gubernioj (urboj) tra la tuta provinco.



Kiam Prezidanto Maŭ alvokis, ke oni “fidu al kaj apogu sin sur la plejparto de la kadroj”, kaj “efektivigu la revolucion triflankan kombiniĝon”, en la spirito por “kapti ĉiun minuton”, la gefiloj de Ginggang-montaro “liberigis” grandajn nombrojn da revoluciaj kadroj, venke naskiĝis la Revolucia Komitato de Gianghi-provinco kaj fondiĝis ankaŭ provizoraj gvidorganoj en la ses subprovincoj, unu urbo kaj pli ol 80 procentoj de la gubernioj de la tuta provinco.

Kiam Prezidanto Maŭ alvokis, ke la popolo “subtenu la armeon”, kaj la armeo “prizorgu la popolon” la PLA-anoj garnizonantaj en Gianghi firme subtenis la vastajn maldekstrajn revoluciajn amasojn, kaj aperis inter ili “modelo de prizorgo al la popolo” kiaj Li Venĝong kaj la “Heroa Kvara Plotono”, kaj la gefiloj de Ginggang-montaro nomis la PLA-anojn senditajn de Prezidanto Maŭ siaj “plej plej intimaj homoj”. Neniam estis pli profundaj la amo kaj unuiĝo inter la armeanoj kaj la popolanoj ol hodiaŭ.

Kiam Prezidanto Maŭ alvokis ke oni “tenu la revolucion kaj stimulu la produkton”, pasintjare, en Gianghi, la agrikulturo akiris riĉan rikolton en ĉiuj plantspecoj kaj la produkto de industrio kreskis tagon post tago.

*“Malsupre de la monto, jen malsupre de la monto,*

*Kvazaŭ en bildo, flirtas ruĝaj flagoj en la vento.”*

La gefiloj de Ginggang-montaro firme plenumis la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, tute strikte, sen ia malvigliĝo, kaj gajnis decidan venkon de la granda proletara kultura revolucio.

### LA GEFILOJ DE GINGGANG-MONTARO ANTAŬENMARŜAS ĈIAM LAŬ LA VOJO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ

En la antaŭvespero de la brila jaro 1968, venis grandega ĝojiga informo: La plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ fartas tre bone kaj radias de vigeleco, kaj li akceptis kune kun sia intima batalamiko vicprezidanto Lin Biaŭ pli ol du dek mil revoluciajn batalantojn el diversaj lokoj de la tuta lando. La reprezentantoj de la heroaj gefiloj de Ginggang-montaro feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Kamarado Ĉeng Ŝiking, respondeculo de la prepara grupo de la Provinca Revolucia Komitato, kaj respondeculoj de la revoluciaj amasaj organizaĵoj sentis en si senkomparan entuziasmon kaj grandegan ĝojon. Post la akcepto, ili tuj revenis al Nanĉang por raporti la ĝojindan aferon al la popolo de la tuta provinco. Kun emocio kamarado Ĉeng Ŝiking diris: “Nin akceptis la plej plej ruĝa




*La kurso por studi la penson de Maŭ Zedong, fondita de la “modela plotono pri subteno al maldekstruloj kaj amo al popolo” de PLA en la Gianghi-a Ŝpinteksa kaj Prestinktura Fabriko.*

suno en nia koro Prezidanto Maŭ! Li intime manpremis kun ni kaj kore salutis la popolon de Gianghi. Tio estas manpremo kaj saluto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al dudek du milion gefiloj de Gingga-montaro. Tio estas la plej granda kuraĝigo, plej granda eduko, plej granda instigo kaj plej granda zorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la gianghi-a popolo! Ni devas nepre certigi la plenan realigon de ĉiuj plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj strebi al kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio, strikte sekvante lin!”

De sia fondiĝo en aŭgusto de la pasinta jaro, la prepara grupo de la Revolucia Komitato de Gianghi-provinco ĉiam metis la disvastigon de la voĉo de Prezidanto Maŭ kaj la certigon de realigo de liaj plej novaj instrukcioj en la komandan pozicion. Kiel konigi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ plej rapide, plej vaste kaj plej rekte al la vastaj popolamasoj de la tuta provinco estis la unua problemo diskutita kaj la unua laboro aranĝita de ĝia unua kunsido. Kie estas plej multaj problemoj kaj plej akraj kontraŭdiroj, tien tuj alvenas la gvidaj kamaradoj de prepara grupo de la Provinca Revolucia Komitato por propagandi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Kiam ili profunden iras al bazaj organizoj kaj la amasoj petas de ili instrukciojn, ili ĉiam diras: “Ni mem ne havas instrukcion. La instrukcioj por vi estas nur tiuj donitaj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Nia tasko estas komplete komuniki la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj igi ilin precize plenumataj!”

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ, la certigo de plena realigo de viaj plej novaj instrukcioj signifas kompletan venkon de la granda proletara kultura revolucio! Nun, rapide leviĝas en Gianghi-provinco la alta tajdo de certigo de plena realigo de ĉiuj viaj plej novaj instrukcioj.



*Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri disvolvo de kuraĝoj en pensado, agado kaj sturmado, la proletaraj revoluciuloj en la Gianghi-a Fornega Fabriko sukcese produktis lastatempe la unuan miltunan hidraŭlikan premilon el la provinco.*

La heroaj gefiloj de Gingga-montaro ĵuras al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: En la nova jaro de batalo, ni nepre agos same kiel la “Heroa Kvara Plotono” kaj kamarado Li Venĝong: “Ni varme amas kion Prezidanto Maŭ varme amas, ni subtenas kion Prezidanto Maŭ subtenas, ni plenumas kion Prezidanto Maŭ instrukcias, kaj ni antaŭenmarŝas, kiam Prezidanto Maŭ mansignas.”

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! La gefiloj de Gingga-montaro faris decidon heredi kaj disvolvi la revolucionan tradicion de Gingga-montaro kaj por ĉiam Vin strikte sekvi generacio post generacio! Sekvante Vin, ni certe gajnos kompletan venkon de la ĉina revolucio kaj de la revolucio de la mondo!

# *Fajro de Armita*

## *Batalo Flamas*

### *tra Azio, Afriko*

### *kaj Latinameriko*

“**M**ARNAVIGO dependas de la stiristo, revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong.” Nun la mondo jam eniris novan revolucionan epokon kun la penso de Maŭ Zedong kiel la granda standardo. La mondsdua granda proletara kultura revolucio de Ĉinio akcelas la grandan disvolviĝon de la revolucia batalo de la tutmondaj popoloj. La brila penso de la granda stiristo de la monda revolucio Prezidanto Maŭ kondukas la revolucion de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj sur la vojon de triumfo. Vivege nun disvolviĝas la nacia demokratia revolucia movado kaj precipe la popola revolucia armita batalo en la vastaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Bonega estas la revolucia situacio.

Post longdaŭra kaj malfacilega palpserĉado kaj batalado, finfine la revoluciaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko trovis la grandan veron — la penson de Maŭ Zedong. Nun, ĉiam pli multe da revoluciuloj en la regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko venas al kompreno, ke la vojo laŭ kiu Prezidanto Maŭ gvidis la ĉinan popolon kapti la regpotencon per armita batala-

do, nome sub la gvido de proletara partio, mobilizi la kamparanajn amasojn en la kamparo por konduki gerilan militon, disvolvi agraran revolucion, starigi revoluciajn bazojn tie por sieĝi la urbojn per la kamparo kaj finfine kapti la urbojn, estas por ili brila ĝusta vojo batalakiri la venkon de la revolucio. El sia propra sperto de batalado, ili ĉiam pli profunde komprenas, ke nerefuteblaj veroj estas la geniaj tezoj de Prezidanto Maŭ kiaj “El la pafilo venas ŝtatpotenco”, “Nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita”, kaj “Sen popola armeo la popolo havas nenion” ktp. “La penso de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj malfermis novan eraon por la marksism-leninisma teorio pri militaj aferoj.” “La penso de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj montris la luman ĝustan vojon por la revolucia batalado de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj.” “La strategio kaj taktikoj de popola milito kreitaj de Prezidanto Maŭ estas la plej akra batalilo por la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.” Jen la konkludoj eltiritaj de la centmilionoj da revoluciuloj el la sangaj lecionoj kaj el la praktikado de sia revolucia batalo plena de brilaj venkoj.

Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, arde flamas la armita batalo de la aziaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Kaj la popolaj armitaj fortoj de multaj landoj kaj regionoj en Afriko kaj Latinameriko persiste bataladas kaj disvolviĝas senĉese.

### ĈIE EN AZIO FLAMAS ARMITA Batalo

La Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, kiu naskiĝis en la fajro de batalo kontraŭ la usona imperiismo, fariĝas ĉiam pli forta en sia batalo, alte tenante la grandan standardon de nacicava batalo kontraŭ la usona imperiismo. La popolaj liberigaj armitaj fortoj jam disvolviĝis en potencajn popolan armeon konsistantan el la Liberiga Armeo, lokaj armitaj trupoj kaj gerilaj taĉmentoj. Kreive aplikante la strategion kaj taktikojn de popola milito kaj firme tenante en siaj manoj la iniciativon sur la batalejoj, ili frakasis fojfoje la militan "eskaladon" de la malamiko kaj ekstermis kaj disbatis preskaŭ 1,500,000 homojn el ĝia efika forto. Kaj la armeo kaj popolo de norda Vjetnamio akiris la brilan venkon de faligo de 2,700 usonaj aviadiloj.

La granda venko de la vjetnama popolo en sia nacicava milito kontraŭ la usona imperiismo plene malkaŝis la papertigrecon de la usona imperiismo. En sia agresa milito kontraŭ Vjetnamio, la usona imperiismo enĵetis preskaŭ duonon de siaj teraj fortoj, uzis preskaŭ kvinonon de siaj aeraj fortoj kaj pli ol kvaronon de siaj maraj fortoj, aplikis ĉiajn modernajn armilojn escepte de atomobombo, kaj ĝiaj pormilitaj elspezoj en unu jaro atingis la grandegan sumon de tridek miliardoj da dolaroj. Sed ĉio ĉi tio ne povas savi ĝin de ĝia malvenko en Vjetnamio. Tio, ke la 31-miliona heroa popolo de Vjetnamio sukcese rezistas kontraŭ la plej granda imperiisma lando, draŝis kaj pelis ĝin en senelirejon, ja estas miraklo en la monda historio de naciaj militoj.

Depost la unua pafo en sia armita batalo en Naga, la popolaj armitaj fortoj de Tajlando sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando donis trafan kaj solidan baton al la usona imperiismo, kiu intencas turni Tajlandon en novtipan kolonion kaj militan bazon por bombadi Vjetnamion, agresi Laoson kaj minaci Sudorientan Azion kaj Ĉinion. Nuntempe, fajreroj de la popola armita batalo jam brulas tra la nordorienta, suda, centra kaj norda partoj de Tajlando. En 28 el la 71



*Profite de la batalpaŭzo la komandanto de la Laosa Popolo Liberiga Armeo lekcias pri la verko de Prezidanto Maŭ Zedong por la batalantoj sur la batalkampo.*



*La popolaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio impetas kaj sukcesas lanĉi surprizofensivon kontraŭ la usona agresarmeo.*

provincoj de la tuta lando, nun aktivadas popolaj armitaj fortoj kaj en pluraj el ili jam fondiĝis revoluciaj bazoj. En la pasintaj pli ol du jaroj, la popolaj armitaj fortoj de Tajlando frakasis multajn “sieĝekstermojn” fare de la tajlandaj militaj kaj policaj trupoj armitaj per usonaj bataliloj sub partopreno kaj direktado de usonaj agrosantoj, kaj ekstermis pli ol 1,200 el la reaciaj militaj kaj policaj trupoj. La venko de la armita batalo de la tajlanda popolo ne nur multe kuraĝigis la tajlandan popolon, peze batis la arogantecon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, sed samtempe ankaŭ donis fortegajn subtenon kaj kuraĝigon al la mondaj revoluciaj popoloj, precipe al la revoluciaj popoloj en la vastaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

La plej grava faktoro de la impeta disvolviĝo de la revolucia situacio de Tajlando estas tio, ke la Komunista Partio de Tajlando, kiu estas la gvidanta kerno de la revolucio, alte tenas la grandan ruĝan standardon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, persistas ĉe la vojo

sieĝi urbojn per kamparo kaj kapti la regpotencon per armita batalado kaj konstruas popolan armeon laŭ la armeonstruaj ideoj de Prezidanto Maŭ.

Hindio estas granda azia lando kun kvincent milion loĝantoj. Sub la gvido de la hindaj revoluciaj komunistoj la hinda revolucia popolo iras la revolucian vojon de Ĉinio kaj batalas kontraŭ la armita kontraŭrevolucio per armita revolucio. Tio komencis novan ĉapitron en la revolucia historio de Hindio kaj havas gravan signifon ankaŭ en la disvolviĝo de la monda revolucio de la proletaro. Tiel frue kiel antaŭ pli ol kvardek jaroj la granda Lenin jam montris: **“La rezulto de la batalo, analizite ĝis la fino, dependas de tio, ke Rusio, Hindio kaj Ĉinio k. s. konsistigas la gigantan plimulton de la monda loĝantaro.”**

En la komenco de 1967, printempa tondro ekremigis la teron de Hindio — la hindaj revoluciaj komunistoj vekis la revoluciajn kamparanojn de Naxalbari de Dargiling-gubernio k. a. lokoj al batalo, kaj tiel ekbruligis la fajron de armita batalo. Tiuj ĉi revoluciuloj profundigis en la kam-

parojn de Darĝiling-gubernio k. a., kie aparte peza estas la feŭda ekspluatado kaj la revolucia forto estas relative granda, propagandas la penson de Maŭ Zedong al la kamparanoj, vekas, organizas kaj armas ilin al ŝtorma atako kontraŭ bienuloj, kultivejaj mastroj kaj la reakcia registaro, kaj al perforta depreno de la kampoj, armiloj kaj greno de burokratoj kaj bienuloj. La revoluciuloj organizis krome armitajn grupojn kaj "popolajn tribunalojn" por puni prove rezistantajn lokajn tiranojn kaj bienulaĉojn kaj armite protekti la fruktojn de la agrara revolucio. De marto ĝis junio de 1967, en siaj pli ol 220 perfortaj aktivadoj, la kamparanoj plene frakasis la privilegiojn ĝuatajn de la feŭdaj bienuloj dum miloj da jaroj kaj la fremdlandaj kultivejaj mastroj dum cent jaroj kaj la "leĝojn" kaj "ordojn", kiujn la reakcia registaro altrudis al ili. La aroganteco de la bienuloj kaj kultivejaj mastroj likvidiĝis kaj la kamparanoj kiuj havas neniom aŭ ne sufiĉe multe da tero, spite levis sian kapon kun fiero. Laŭ nekompletaj informoj ellasitaj de hindaj ĵurnaloj, la Naxalbari-tipa agrara batalo de kamparanoj jam disvolviĝis en pli ol 50 regionoj (Taluka aŭ Tehsil) en ok ŝtatoj (Pradesh) kaj pluraj teritorioj administrataj de la centra registaro. La kamparanoj en tiuj regionoj perforte reprenis la kampojn perforte forprenitajn de la bienuloj kaj la reakcia registaro, kaj tiel reprenis la plantaĵojn sur la kampoj perforte alproprigitaj de bienuloj.

La hindaj revoluciaj komunistoj deklaris serioze, ke "la strategio alprenita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong estas alprenenda por la hindaj marksistoj," kaj ke ili "serioze strebados por fariĝi bonaj lernantoj de kamarado Maŭ Zedong."

La Komunista Partio de Birmo, kiu havas longan gloran historion de armita revolucia batalo, donas ĉiam pli pezajn batojn al la birma faŝisma reganta kliko de Neŭin, gvidante la popolajn armitajn fortojn de Birmo. En la jaro 1964, gvidate de la Komunista Partio de Birmo, la popolaj armitaj fortoj kaj la amikaj trupoj ekstermis pli ol dumil malamikajn soldatojn. En 1965, la popolaj armitaj fortoj puŝis sian atakan lancon en la ĉirkaŭaĵon de Rangong kaj forte skuis la malgrandan kortegon de Neŭin. En 1966, la popolaj armitaj fortoj kondukis pli ol 400 batalojn, dufoje surprizatakis la ĉirkaŭurbon de Rangong, okupis policejon nur 4-5 liojn foran de la nesto de Neŭin kaj skuis la loĝantaron en la urbo. Kaj de post la jaro 1967, la popolaj armitaj fortoj sub la gvido de la Komunista Partio de Birmo akiris multajn novajn venkojn.

Birmo havas entute nur kvindek kelkajn guberniojn, kaj en 31 el ili nun aktivigas popolajn armitajn fortojn. En la lastaj jaroj, la popolaj armitaj fortoj kreskis je 50 procentoj kaj organizis grandan armeon de milicanoj. Arda fajrego de armita batalo baldaŭ brulos tra la tuta lando. Tiel frue kiel en februaro de 1966, iu usona gazeto jam veis malespere: "En la tago la birma registaro kontrolas nur du trionojn de la lando, dum nokto ĝi povas kontroli nur la duonon."

Kaj la revolucia armita batalo de la indonezia popolo venke disvolviĝas en la vastaj kamparoj de la mil-insula lando, trarompante diversajn blankterorajn kontrolojn. Aparte rimarkinde estas, ke en okcidenta Kalimantano la revolucia forto havas konsiderinde grandan popolan armitan trupon, kiu frakasis unun post alia "sieĝekstermojn" faritajn de la reakciaj militaj kaj policaj trupoj kaj solide batis la malamikon, unuiĝante kun la vastaj amasoj, aplikante elastajn kaj flekseblajn strategion kaj taktikojn kaj utiligante favoran topografion. Okcidenta novaĵagentejo informis, ke en la lasta tagdeko de novembro, 1967, kolektinte superecan trupon de pli ol 500 batalantoj en montareo 60 kilometrojn oriente de Bengkajang, la popola armita forto de okcidenta Kalimantano ĉirkaŭatakis unu el la rotoj de la Terarmea Sturma Regimento al la ĉefforto de la Suharto-Nasution-a faŝisma armeo per bombkanonoj, aŭtomataj pafiloj k. a. La reakcia trupo estis draŝita ĝis prudentperdo sub la furioza atakado de la popola armita forto. Nun en la vasta zono de okcidenta Kalimantano, kiu estas montoza kaj arbarriĉa, la popolaj geriltaĉmentoj estas fondantaj revolucionan bazlokon. La disvolviĝo de la revolucia armita batalo en okcidenta Kalimantano alportis fortegan kuraĝigon kaj grandegan esperon al la revolucia popolo de Indonezio. En la kamparoj de norda Sumatro kaj orienta Javo, revoluciaj popolanoj leviĝis en amasoj kun armiloj por batali kontraŭ la reakciaj armeoj. Ankaŭ en okcidenta Javo kaj suda Sumatro, kiuj estas sub plej severa kontrolado de la militista faŝisma regpotenco de Suharto-Nasution, jam ekbrulis torĉoj de popola armita batalo. Hodiaŭ, la revolucia popolo de Indonezio jam etendis revolucionan armitan batalon en la kamparoj de la ĉefaj insuloj Javo, Kalimantano, Sulaŭesi kaj Sumatro.

La popolaj revoluciaj armitaj fortoj de Laoso, la Filipinoj kaj norda Kalimantano estas batantaj la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn per flekseblaj, elastaj manovroj kaj firmigantaj kaj disvastigantaj la revoluciajn bazlokojn laŭ la brila

vojo de la penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

## ĈIAM PLI FURIOZAS LA KONTRAŬIMPERIISMA MILITFAJRO EN AFRIKO

La senlime brila penso de Maŭ Zedong estas disvastiĝanta en Afriko, kie vigle disvolviĝas naciliberigaj movadoj, kaj furioze flamas kontraŭimperiisma armita batalo sur la vasta tereno de tiu kontinento. Tra la batala praktikado, la liberaj batalantoj de Afriko konvinkiĝis, ke la verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj estas “sunlumo en la ĝangalo”, “vojmontra lampo en mallumo” kaj “kompaso al venko”. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**”, ili ekprenis pafilojn por konduki mortan batalon kontraŭ imperiistoj, koloniistoj kaj iliaj lakeoj.

La patriotaj armitaj fortoj de Kongolando (K.) jam batalis plurajn jarojn kontraŭ la malamiko. La patriotaj armitaj fortoj sub la gvido de Pierre Mulele frakasis unun post alia “sieĝekstermojn” kaj “balaadojn” de la kontraŭrevoluciaj armitaj fortoj kaj venke persistas ĉe la vojo de revolucia armita batalado. Ĝi jam starigis firman revolucionan regpotencon en la okcidenta frontlinio kaj estas etendanta la terenon de batalado oriente kaj sude de la bazloko. Ankaŭ ĉe la nordorienta kaj la orienta frontlinioj la patriotaj armitaj fortoj ricevis disvolviĝon. En la lasta pli ol unu jaro, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri la tri ĉefaj armiloj por venki la malamikon, gvidantoj de la patriotaj armitaj fortoj jam metis sur la tagordon starigon de revolucia partio kaj starigon de armeo kaj unueca fronto sub la gvido de tia partio.

Kun ĉiu tago plifortiĝas la kontraŭimperiismaj armitaj fortoj en la najbara lando de Kongolando (K.), Angolo, Gvineo (portugala) en okcidenta Afriko, Mozambiko en orienta Afriko kaj Zimbabŭeo en la suda parto de tiu kontinento. Aplikante gerilajn taktikojn embuskadi, surprizataki, profunden enlogi la malamikon k. c., ili solide batas la malamikon. Kun la plua disvolviĝo de la kontraŭimperiisma armita batalo, la brilaj ideoj de Prezidanto Maŭ pri kupto de regpotenco per armita batalo ĉiam pli profundiĝis en la koron de la popolo. Iu mozambika batalanto por libero diris: “Ni dankas la revolucionan gvidanton Prezidanto Maŭ. Estas lia instruo, kiu ŝanĝis la spiritan fizionomion de nia popolo, plifortigis nian batalvolon kaj sciigis al ni kiel ni devas bata-



*La armita gerila taĉmento gvidata de la Komunista Partio de Birmo.*

li.” Studinte verkojn de Prezidanto Maŭ, angolaj gerilanoj ilin aplikis en analizado pri la favoraj kaj malfavoraj faktoroj de la malamiko kaj ni, akiris pli klaran vidon pri la situacio kaj decidis konduki longdaŭran bataladon kontraŭ la portugalaj koloniistoj kaj akumuli fortojn en ĝi por finfine venki la malamikon.

La patriotaj armitaj fortoj de iuj regionoj de Afriko lernas militarton en milito kaj fariĝas ĉiam pli grandaj. Multaj gerilanoj jam povas reciti la formulon el 16 ĉinaj ideografiaĵoj de Prezidanto Maŭ pri gerilado “**Kiam la malamiko almarŝas, ni retiriĝas; kiam ĝi kampadas, ni ĝin ĝenas; kiam ĝi laciĝas, ni ĝin atakas; kiam ĝi retiriĝas, ni ĝin persekutas**”, kaj ili ĝin praktikas en sia batalo. Dank’ al tio, pliriĉiĝas ilia batalsperto kaj pli fleksebla fariĝas ilia taktiko.



*La gerilanoj en Laoso faras ĉi tie la kaptilon.*

La disvolviĝo de la patriota armita batalo en Afriko teruris la novajn kaj malnovajn koloniistojn. Kun maltrankvilego, la angla ĵurnalo *The Observer* skribis en unu el siaj artikoloj: “Se Britio ne klopodas persvadi Usonon kaj Eŭropon per drastaj ekonomiaj sankcioj devigi sudan Afrikon efektiviigi politikajn ŝanĝojn, do certe okazos perfortaj agadoj de negroj.” Preventi la disvastiĝon de la arda fajro de armita batalo de la afrikaj popoloj ja estas nur stulta iluzio de la imperiismaj elementoj. La kontraŭimperiisma militfajro de la afrikaj popoloj flamas ĉiam pli arde kaj ĉiam pli vaste, kaj ĝi nepre disetendiĝos tra ĉiuj landoj kaj regionoj ankoraŭ sub la sklavigado de la imperiistoj kaj koloniistoj.

## **LA LATINAMERIKAJ POPOLOJ DECIDIS IRI LA VOJON DE LA ĈINA REVOLUCIO**

La kontrabandaĵoj “paca transiro” kaj “parlamentara vojo” kolportataj de modernaj reviziistoj en Latinameriko fariĝas ĉiam pli malplaĉaj al la tieaj popoloj. El sia praktika batalo, pli kaj pli multaj revoluciuloj vidas pli klare, ke revolucia

armita batalo estas la sola fidinda vojo por la latinamerikaj popoloj akiri la venkon de sia revolucio. Ili decidis iri la ĉinan revolucion vojon montritan de Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ diris: **“Por revolucii, estas necese havi revolucionan partion.”** Nur sub la gvido de marksism-leninisma partio armita batalo povas marŝi de venko al venko. Iu argentina revoluciulo diris kun profunda konvinkiĝo: “Por venke disvolvi armitan batalon, oni nepre devas akiri la subtenon de la amasoj kaj havi la gvidadon de novtipa marksism-leninisma partio, kiu aplikas la nuntempan marksism-leninisman — la penson de Maŭ Zedong, laŭ la specifaj kondiĉoj de niaj landoj.” Li montris krome: “Estas necese oponi reviziisman en la sferoj de ideologio, politiko, organizo kaj militaj aferoj, se oni volas, ke senĉese disvolviĝu la armita batalo en la latinamerikaj landoj. Se oni disvolvas armitan batalon ne kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, do oni kompromisos kun reviziismo kaj eĉ forlasos armitan batalon.”

En la lastaj jaroj, marksism-leninismaj partioj kaj organizoj naskiĝis unu post alia en dek kelkaj



latinamerikaj landoj en pint-kontraŭ-pinta batalo kontraŭ reviziismo, kaj ili ĉiuj emfazas observon de la penso de Maŭ Zedong en konstruado de la partio. Ili ĉiuj konfesas, ke la vojo de Maŭ Zedong reprezentas la direkton de la revolucio de Latinameriko.


Prezidanto Maŭ diris: “**La venko de revolucio ĉiam komenciĝas, disvolviĝas kaj efektiviĝas unue en la lokoj, kie la kontraŭrevoluciaj fortoj estas relative malfortaj.**” La vastaj kamparoj de Latinameriko estas ĝuste regionoj, kie la regado de imperiismo kaj la lokaj reakciularoj estas malforta kaj la revoluciuloj povas lerte manovradi. Unuj post aliaj, la revoluciaj partioj de multaj landoj faris rezoluciojn aŭ publikigis artikolojn, kiuj emfazas la plenumon de la granda strategia penso de Prezidanto Maŭ veki kaj armi la kamparanojn, starigi kaj disvolvi bazlokojn en la kamparo kaj sieĝi la urbojn per la kamparo. Iu argentina revolucia organizo montris: “La irenda vojo estas grandigi niajn fortojn en la kamparoj, montaroj kaj arbaroj, komenci de tie longdaŭran militadon, sieĝi la urbojn por finfine ilin kapti, starigi popolan regpotencon de politiko, ekonomio kaj militaj

aferoj en la liberigitaj regionoj, lasi la amasojn liberigi sin mem kaj firmigi la venkon post triumfo.” Resumante sian bataladon post studo de la teorio de Prezidanto Maŭ pri popola milito, iu sudamerika gerilano diris: “En la pasinteco, ni havis nur gerilajn regionojn, sed ne bazlokojn en la kamparo, tial ni ne havis postfronton, kiam ni devis iri sur montojn.” Kaj li diris krome: “Bazlokoj estas nia apogo, sen kiu ni ne povas kapti regpotencon sed povas esti frakasitaj de la malameriko.” Iuj revoluciaj partioj jam sendis kernajn kadrojn profunden en la kamparon por plene veki la amasojn kaj konduki longdaŭran armitan bataladon.

Hurlas nun la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko! Batalas nun la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko! La fajrero bruligita de Prezidanto Maŭ antaŭ kvardek jaroj sur Gingga-montaro nun disvastiĝas tra la vastaj regionoj de tiuj kontinentoj per incendiiga flamo. La granda ŝtormo de la revolucia armita batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko tute enterigos finfine imperiismon, modernan reviziismon kaj la reakciularojn de ĉiuj landoj!



*Sub la gvido de la granda penso de Maŭ Zedong senĉese disvolviĝis la armita batalo de la afrika popolo. Jen batalantoj de la patriotaj armitaj fortoj en Angolo, kiuj diligente sin ekzercas pri pafado.*



**La Monda Popolo Varme  
Amas Prezidanton Maŭ**

# Triumfa Antaŭenmarŝo laŭ la Direkto

## Montrita de Prezidanto Maŭ

*Membroj de la centra oficejo de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio (ortodoksa) en Ajĉi kolektive studas la Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.*





*La laboranta popolo en Kamboĝo havas senliman amon al Prezidanto Maŭ.*

**Ĝ**USTE ĉe la eniro de la mondo en la novan epokon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj revoluciaj popoloj de Birmo, Hindio, Indonezio kaj Japanio, kiel la revoluciaj popoloj de aliaj landoj, des pli varme prikantas Prezidanton Maŭ kaj lian penson, kun senlima respekto. Ili firme decidis antaŭenmarŝi laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.

### **LA DIREKTO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS ĜUSTA**

La birmaj laboristoj konstruantaj novajn fabrikojn sub la helpo de Ĉinio senlime amas Prezidanton Maŭ kaj senlime adoras lian penson. Renkontiĝante kun ĉinaj specialistoj ĉiumatene sur la konstruejo, ili ĉiam entuziasme kriis: “Maŭ Zedong! Maŭ Zedong!” Por esprimi sian profundan amon al Prezidanto Maŭ, iuj laboristoj ofte skribis tiujn vortojn kiaj “Ruĝas la oriento”, “Vivu Prezidanto Maŭ!” per la ĵus lernitaj ĉinaj ideografiaĵoj. Ili diris al ĉina specialisto: “Maŭ Zedong — bona, tre bona! Maŭ Zedong estas la granda gvidanto ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de ni. Li prizorgas ne nur la ĉinan popolon, sed ankaŭ la laborantan popolon de la tuta mondo. En la mondo de la nuna epoko, Maŭ Zedong plej prizorgas la sorton de la tutmonda laboranta po-

polo.” Iu laboristo diris al ĉina specialisto: “Pasis nur 17 jaroj post la liberiĝo de Ĉinio, sed ŝi jam fariĝis tiel potenca. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la ĉina popolo havas sian plej grandan gvidanton Maŭ Zedong kaj la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong. Sekvante la grandan revolucion gvidanton Maŭ Zedong, la popolo de la tuta mondo havos luman estontecon; ili kapablos venki imperiismon, reviziismon kaj ĉiujn reakciulojn kaj liberigi la tutan homaron, kiam la penso de Maŭ Zedong estos posedita de ili!”

Sub la gvido de la Komunista Partio de Birmo armita de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, la birma revolucia popolo starigis vastajn ruĝajn bazlokojn, kaj la arda fajro de armita batalo tuj brulos tra la tuta lando. En la praktikado de batalo ili pliprofunde komprenis, ke Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto de la popolo de la tuta mondo, kaj la penso de Maŭ Zedong estas la sola orientilo por akiri la venkon de revolucio. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ili faris armitan batalon en la daŭro de 20 jaroj kaj starigis firmajn bazlokojn en la kamparo. La armita batalo nun iras de venko al venko. Kamarado Thakin Ba Thein Tin, la unua vicprezidanto de la Komunista Partio de Birmo, diris, ke la historio de la birma armita batalo estas la historio, en kiu la granda


penso de Maŭ Zedong akiris venkon. Li diris krome, ke la sperto de la revolucia milito de Birmo dum la lastaj 20 jaroj refoje pruvis, ke la revolucia vojo de Ĉinio estas ĝusta kaj la direkto montrita de la penso de Prezidanto Maŭ estas korekta.

## AGU LAŬ LA LINIO DE PREZIDANTO MAŬ

La arda amo de la revolucia popolo de Hindio al Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong estas ankaŭ tre kortuŝa. Ricevinte de sia ĉina amiko portreton de Prezidanto Maŭ iu elektristo tuj iris ĝoje al strato por aĉeti por ĝi taŭgan kadron. Ekvidinte la portreton de Prezidanto Maŭ en liaj manoj, la homoj ĉe la vendejo tuj svarmis al li kaj kun forta deziro bone ĝin rigardadis. Iu bonkorulo el ili atentigis lin: “La (hinda) registaro oponas Ĉinion. Ĉu vi ne timas ke policanoj kaj spionoj alportos al vi malagrablaĵon pro la portreto de Prezidanto Maŭ?” Tiu ĉi elektristo justoplene respondis al li: “Nenion mi timas, mi ja rajtas pendigi la portreton de Prezidanto Maŭ, ĉar li estas la plej granda gvidanto de la laborista klaso kaj la laboranta popolo de la tuta mondo.” Li plu diris: “Ĉu vi scias, kial ni, hindaj laboristoj kaj kamparanoj, ĉiam pli malriĉiĝas kaj multege suferas de subpremado kaj ofendado fare de riĉuloj? La radika kaŭzo kuŝas en la ekspluatado kaj subpremado fare de

imperiismo, feŭdismo kaj burĝaro. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la laborista klaso kaj laboranta popolo de Ĉinio leviĝis por fari revolucion, faligis la parazitojn rajdantajn sur la nuko de la ĉina popolo, batalakiris sian liberiĝon kaj triumfe antaŭenmarŝas al socialismo kaj komunismo. Prezidanto Maŭ kuraĝigas kaj subtenas ankaŭ la laborantan popolon de la tuta mondo leviĝi por revolucio kaj batali por sia liberiĝo. Prezidanto Maŭ montris la ĝustan direkton al la laborista klaso kaj laboranta popolo de la tuta mondo. Lia koro ĉiam ligiĝas kun la nia. Kial mi ne pendigus la portreton de Prezidanto Maŭ? Mi volas, ke ĝi ĉiam troviĝu en mia domo!”

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revolucia alo de la Komunista Partio de Hindio en Darĝiling-distrikto senŝanceliĝe praktikas la saĝan instrukcion de Prezidanto Maŭ “**el la pafilo venas ŝtatpotenco**” kaj ekbruligis la unuan torĉon de armita batalo en Naksalbari. Ili klare deklaris, ke la armita batalo estas “kondukata laŭ la penso de Maŭ Zedong”. Ili decidis nepre iri la veran revolucion montritan de Prezidanto Maŭ, vaste disvolvi la armitan batalon en Hindio, faligi la hindajn reakciulojn kaj batalakiri la venkon de la hinda revolucio.



*Gelaboristoj vjetnamaj kaj elmigrintaĉinaj kune legas la verkon de Prezidanto Maŭ en la Ŝpinteksa Fabriko “Tri-Oka” en Hanojo, Vjetnamio.*



*Kolektiva studo okazas en unu studgrupo de la verkoj de Prezidanto Maŭ en Cejlono.*

## **STUDO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG —BEZONO DE LA REVOLUCIO**

La indonezia revolucia popolo sub la sanga regado de faŝista ŝtatpotenco elĉerpis sangan lecionon el siaj propraj travivaĵoj kaj nun pli profunde komprenas la grandecon de la penso de Maŭ Zedong. Iu respondeculo de amasa organizaĵo diris: “Kamarado Maŭ Zedong brile heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismon, kaj levis ĝin al la kulmino en la nuna epoko. Studo de la penso de Maŭ Zedong estas bezono de la revolucio. Li ankaŭ diris: “Alte tenante la standardon de popola milito, la komunistoj kaj revolucia popolo de Indonezio ekbruligis la stepoincendiigajn fajrerojn en kamparo. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la popolo de Indonezio lernas militon en milito. Nenia forto en la mondo povos malhelpi la eksplodon de popola milito en Indonezio.” Li firme kredas, ke laŭ la vojo de popola milito montrita de la penso de Maŭ Zedong kaj sub la gvido de la Komunista Partio de Indonezio, la indonezia

popolo nepre likvidos la ĝisĉielajn krimagojn de la faŝista regpotenco de Suharto-Nasution kaj akiros sian liberiĝon.

Laŭ raportistoj, en la Okcidenta Kalimantano kaj aliaj lokoj, la armitaj fortoj de la indonezia revolucia popolo ĉiam pli vigle agadas, kio ĵetas la reakcian registaron de Indonezio en grandan panikon, ke ĝi nur povas urĝe sendi siajn trupojn por subpremi. Sed, neniuj reakcia fortoj povos estingi la fajrerojn, kiuj tuj incendiigos la tutan stepon.

## **LA PENSO DE MAŬ ZEDONG LUMIGAS LA PERSPEKTIVON DE LA JAPANA REVOLUCIO**

Prezidanto Maŭ ĝuas la plej altan prestiĝon inter la revoluciaj popolanoj de Japanio. Por esprimi siajn senlimajn amon kaj adoron al Prezidanto Maŭ, multegaj laborantaj popolanoj pendigis lian portreton en siaj domoj. Iu deksepjara knabo de lernejo por blinduloj en Kanagaŭa senlime



*La fama poeto Talib Jallundri de Pakistano, kun libretoj de la Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong alte tenataj en ambaŭ manoj, emocie deklamas en kunveno sian poemon pri laŭdo al la penso de Maŭ Zedong.*


amas Prezidanton Maŭ kaj nomas lin la “plej granda proletara revoluciulo” kaj la “Lenin de la nuna epoko”. Jam delonge li deziris akiri portreton de Prezidanto Maŭ por ĝin pendigi en sia ĉambro. Li skribis varman leteron en brajlo al iu progressa librejo en Tokio. En la letero li diris, ke li estas aŭskultanto de la Pekina Radio kaj jam aĉetis unu ruĝan trezoran libreton — *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*; nun, li deziras akiri portreton de la plej amata kaj estimata Prezidanto Maŭ. Iun matenon, kiam la instruisto informis lin preni la poŝtaĵon, li tuj divenis, ke venas la portreto de Prezidanto Maŭ, sopirata tage kaj nokte. En ĝi vere estis portreto de Prezidanto Maŭ kaj insigno kun lia portreto. Li saltis de ĝojo kaj foje-refoje karesis la portreton. Ĝi donis al li neelĉerpeblan forton.

Sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, la japanaj revoluciuloj firme ribelas kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj, kontraŭ la sovetiaj kaj japanaj reviziistoj. Ili elhakis sian vojon el sub la regado de la Mijamoto-kliko kaj rapide kreskas en

la batalado kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj.

Multaj revoluciaj guberniaj komitatoj, filioj kaj grupoj de la maldekstruloj de la Japana Komunista Partio estas starigitaj en vastaj kamparoj kaj urboj de Japanio. En sia fondiĝa kunveno aŭ deklaracio ili solene deklaris: “En la estonteco ni iros la veran revolucion vojon sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong” kaj “nepre bone faros la preparan laboron por depreni la regpotencon”. Kvankam la usonaj kaj japanaj reakciuloj, la sovetiaj reviziistoj kaj la japana reviziisma Mijamoto-kliko nun unuiĝis por subpremi la japanan revolucion, kaj kvankam antaŭ la revoluciaj maldekstruloj ankoraŭ restas multaj malfaciloj kaj problemoj, tamen la penso de Maŭ Zedong jam lumigas la perspektivon de la japana revolucio. La forto de revoluciaj maldekstruloj de Japanio troviĝas en senĉesa disvolviĝo kaj kreskado, kaj la konscio de la japana popolo estas en rapida leviĝo. Neeviteble venos senprecedence bonega revolucia situacio.

*Kun senlima amo al Prezidanto Maŭ ĉi tiu nepala junulo pentris la portreton de Prezidanto Maŭ nur en tri tagoj.*



*Profite paŭzon dum batalo la laosaj batalantoj diligente lernas la verkon de Prezidanto Maŭ.*





# *La Penso de Maŭ Zedong*

## *Flugas trans la Maroj* \*

*Kelkfoje la kampo donacas mirakle  
grenaron abunde kreskantan.  
Kelkfoje arbara forteg' senobstakle  
ŝprucigas kaskadon grandkvantan.  
Kelkfoje montego sin levas pli alte  
ol siaj najbaraj masivoj.  
Kelkfoje genio inspire, ekzalte  
flamigas esperon en vivoj.*

*Eterne la homoj al suno sopiris  
el ombroj profundaj sur tero.  
Eterne kruelaj fiungoj fortiris  
feliĉon de ĝoj' kaj espero.  
Eterne uzurpis aĉuloj avidaj  
agante kruele, minace.  
Eterne mizeraj sklavaroj homidaj  
atendis la lumon senpace.*

*Gratulojn al vi en Popola Ĉinio!  
Hodiaŭ la mond' vin estimas.  
Gvidataj de Maŭ via homa Genio,  
nenian obstaklon vi timas.  
Gratulojn al vi malproksimaj frataroj,  
vin mano potenca protektas.  
La Penso de Maŭ jam transflugas la marojn,  
inspiras, instruas, direktas.*

*La Penso de Maŭ estas kampo fekunda  
kaj roko kun pint' ĝisĉiela.  
La vortoj de Maŭ estas fonto profunda  
kaj lumo brilanta kaj hela.*

---

\* skribita post la lego de Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong




*La vortoj de Maŭ kuraĝigas la korojn  
per sia saĝeco senlima,  
do karaj amikoj: Sukcesan laboron!  
La venko jam estas proksima.*

*Jen venas la venko kuranta galope,  
ni ĉiam la vortojn memoru,  
ke homoj amase — ne plu unuope  
por nova kulturo laboru.  
Por novaj kutimoj kaj novaj ideoj  
fidele strebadi kaj celu  
sed, la malutilajn insektajn lakeojn  
komune vi ilin forpelu.*

K. O. WARME (SVEDIO)

*Svingante la brile ruĝan libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong,  
somaliaj artistoj kantas laŭte la kanton Marnavigo dependas de stiristo.*



# Ŝpinteksa Industrio de Ŝandong Plene Superplenumis la Ŝtatan Planon

En novembro de 1967, kiam bonega situacio regis en la industria kaj agrikultura produktado kaj merkata provizado, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la ŝpinteksa industrio de Ŝandong-provinco portis al la tutlanda popolo alian ĝojigan novaĵon: la tuta provinco je 50 tagoj pli frue plenumis ĉiuflanke la produktan planon de ŝpinaj kaj teksaj produktaĵoj, kiaj kotona fadeno, kotona ŝtofo, silkaĵo kaj trikoto, difinitan de la ŝtato por 1967. La totala produkta valoro de la unuaj 11 monatoj de la jaro pliiĝis je 13.01% ol tiu

*En la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinteksa Fabriko de Kingdaŭ la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj neniam forgesas studi la penson de Maŭ Zedong por firme akiri venkon kaj en revolucio kaj en produkto.*



de la sama periodo de 1966, kaj la produkta valoro de la kotona fadeno kaj kotona ŝtofo pliiĝis respektive je 16.85% kaj 14.98%. Stabile pliboniĝis la kvalito de la produktaĵoj, plimultiĝis novaj specoj kaj malaltiĝis la produkta kosto. En la totalaj produktaj kvantoj de kotonaj fadeno kaj ŝtofo kaj en laborproduktiveco oni rompis la rekordon de la provinco.

En 1967, en la granda proletara kultura revolucio, la proletaraj revoluciuloj de la ŝpinteksa industrio de Ŝandong decideme efektiviĝis la grandajn principojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “teni la revolucion kaj stimuli la produkton” kaj “fari revolucion ŝpareme”, lanĉis senprecedence grandskalan revolucian kritikadon, por ĝisfunde malkovri kaj kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion distrustpetitan kaj praktikitan de la plenmano da plej grandaj enpartiaj irantoj de la kapitalisma vojo kun la ĉina Ĥruŝĉov ĉe la kapo, precipe la kontraŭrevoluciajn absurdaĵojn, kiaj “materia stimulo”, “profito en komando” kaj “ekspuato estas merito”, kaj tiel multe vekis la klasan konscion de la laboristaj kaj oficistaj amasoj, kaj tio siavice akcelis la impetan disvolviĝon de la produktado. En la tria jarkvarono de 1967, regis varmeĝo en Ŝandong, la alteco de la temperaturo kaj ĝia longdaŭreco estis maloftaj en la historio. Tio kaŭzis certajn malfacilojn al la ŝpinteksa industrio. Tamen sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ strategie malestimi la malfacilojn sed taktike trakti ilin serioze, la vastaj amasoj de la laboristoj kaj oficistoj rompis la “kutimon” de malkresko de la produktado en la tria jarkvarono kaj atingis kontinuan antaŭensalton en produktado en la sezono de alta temperaturo kaj alta humideco.

En la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la ŝpinteksa industrio de Ŝandong disvolvis sian revolucian spiriton kuraĝe pensi, kuraĝe agi kaj kuraĝe krei, frakasis la katenon de fremdlandaj dogmoj kaj malnovaj reguloj, solvis nemalmultajn gravajn, malnovajn kaj malfacilajn ŝlosilajn problemojn, kiujn longdaŭre ne povis solvi la burĝaraj “aŭtoritatuloj” kaj “specialistoj”. Post energia penado kaj esplorado la oficistoj kaj laboristoj de la teksa laborejo de la Unua Ŝtata Koton Ŝpinteksa Fabriko de Kingdaŭ plialtigis la rapidecon de teksmaŝinoj je triono de tiu en la pasinteco, kaj la pohora produktkvanto de la teksmaŝino altiĝis je 25%. La laboristoj de Silka Fabriko de Zibo mem faris teknologian projektadon, mem faris provadon, kaj mem kondukis produktadon, rompante la monopoligon de la teknologio fare de la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”. Ili produktis silkon de alta klaso, tiel ke aperis nova vivoplena situacio en la produktado.

# La Hodiaŭa Jan-an


Jan-an situas en la norda parto de Ŝenhi-provinco.


En 1935, sub la komando de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo atingis nordan Ŝenhi post la mondsdua, 25,000-lia Longa Marŝo. De tiam Jan-an fariĝis la lumturo de la ĉina revolucio kaj gvida centro de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Hodiaŭ en la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio, Jan-an jam fariĝis nova socialisma urbo. La lokoj, kie Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio siatempe loĝis, fariĝis ankoraŭ pli imponaj kaj belaj.

Jan-an restos ĉiam revolucia sanktejo, al kiu kliniĝas la koro de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.

La granda ponto de Jan-an





Zaŭjuan, kie siatempo troviĝis la oficejo de la



Sekretariejo de la Centra Komitato de la Partio



La popolo de Jan-an ebenigas la teron por transformi la naturon kaj akiri al si grandan riĉan rikolton.

La popolo de Jan-an plantas arbojn por verdigi la montaron.



# Vizito al Gangdong-brigado

**E**N la jaro 1967, kiam nia granda proletara kultura revolucio akiris decidan venkon, Gangdong-brigado — malgranda fiŝista vilaĝo — unuafoje vendis superfluan grenon al la ŝtato. Ĝiaj membroj diris emocie: “Ne grenon, sed la ruĝajn korojn ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj liveris al nia amata Prezidanto Maŭ kaj la ŝtato!”

Ja estas tre ordinara afero en Ĉinio, ke la popolkomunumaj brigadoj en kamparoj vendas al la ŝtato sian superfluan grenon. Sed eksterordinara estas tio por Gangdong-brigado, kiu antaŭe ne povis produkti sufiĉe da greno por sia propra bezono kaj unuafoje vendis superfluan grenon al la ŝtato en la pasinta jaro.

La vilaĝo de Gangdong-brigado sin trovas sur mal ebena tereno ĉe la piedo de Laŭŝan-montaro. La ĉirkaŭ 400 familioj de tiu vilaĝo kun montoj post la dorso kaj maro antaŭ la vizaĝo okupiĝas pri fiŝado kaj agrokulturado. De la jaro 1964, la pomua produktokvanto de greno de tiu brigado stabile superas 400 kilogramojn, t. e. kvaroble pli granda ol tiu de 1956 en la kooperativa periodo. Ankaŭ la fiŝkaptado de tiu brigado multe disvolviĝis kaj nun ĝi jam havas 110 grandajn kaj malgrandajn ŝipojn kaj 5,000 diversajn nilonajn retojn. Krome, ĝi disvolvis ankaŭ kultivadon de laminario, ostroj ktp.

Ĉiu ajn el la atingoj de la brigado — ĉiu nove konstruita ŝtupkampoj, ĉiu grenero rikoltita, ĉiu fiŝkaptata ŝipo nove farita k. s. ja senescepte signifas venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ; kaj ĉiu ajn el ili estas frukto de la penlaborado de la revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado. Ĉiu el ili estas ankaŭ peza bato al la ĉina Ĥruŝĉov.

## I

En 1962, kiam nia lando renkontis portempajn malfacilojn en ekonomio pro naturaj katastrofoj dum tri sinsekvaj jaroj, la ĉina Ĥruŝĉov ekblovigis la inferan venton de “tri pliigoj kaj unu fikso”, “materia stimulo”, “laborpoentoj en komando” kaj “alte premii kaj peze puni” en fiŝkaptado. Li diris, ke la komunumanoj ja laboras por akiri laborpoentojn, kaj akirinte monon kaj grenon ili fariĝos entuziasmaj en produkto. Sekve oni fiksis produktan kvoton por ĉiu ŝipo kaj ĉiu persono kaj donis premion por ekstra produkto laŭ proporcio. La premio konsistis el fiŝoj kaj mono, kaj kiu ne plenumis sian taskon, ricevis punon. Per tio li intencis korodi la

revolucian volon de la komunumanoj kaj atingi sian kriman celon de restaŭro de kapitalismo.

En tiu kriza momento, la partia organizo de Gangdong-brigado ĝustatempe organizis la vastajn revoluciajn amasojn lerni la instrukciojn de Prezidanto Maŭ, ke “**politika laboro estas la vivlinio de ĉia ekonomia laboro**” kaj ke oni devas elstarigi politikon. Tio akiris la okulojn de la kadroj kaj amasoj kaj komprenigis al ili, ke por entrepreni socialismon, oni devas dependi nek de “materia stimulo” nek de “laborpoentoj en komando”, sed de la penso de Maŭ Zedong kaj pena strebado al prospero. Tiel entuziasmiĝis la vastaj revoluciaj amasoj kaj altiĝis ilia batalspirito. Ili decidis ne plu pruntepreni eĉ unu groŝon de la ŝtato, nek postuli eĉ unu greneron de ĝi, kaj pluapaŝe altigi la produktokvanton de grenoj kaj samtempe fari pli multajn kontribuojn al la ŝtato en fiŝkaptado.

De kio oni devas komenci por plibonigi la agrokulturatan produkton fronte al la mizeraj montoj, malutilaj akvoj kaj sterilaj kampoj? Pri tio oni havis malsamajn opiniojn.

Por solvi tiun problemon, la revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado petis helpon de verko de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ diris: “**Sekve, ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika kaj havas pli ol du kontraŭdirojn, oni devas fari sian plejblon por trovi la ĉefan kontraŭdiron.**” La vortoj de Prezidanto Maŭ brilis kiel vojmontra lampo.

Ripetfoje la partia organizo de la brigado pristudis la aferon. Konsiderinte, ke ĉiu en la vilaĝo havas meznombre nur kvar dekonojn da muo da tero, oni decidis unue solvi la problemon de tero, nome batalakiri grenon de la maro sudokcidente de la vilaĝo per konstruo de ĉirkaŭbaro sur la strando. Samtempe, la partia organizo disvolvis kreivan studon kaj kreivan aplikadon de la “tri popularaj artikoloj”, precipe la artikolo *Monto-translokigo fare de la Malsaĝa Avo* inter la amasoj por ilin armi per la penso de Maŭ Zedong. Post la lernado, la memfido de la komunumanoj multe plifortiĝis. Ili diris: “Se la familio de la Malsaĝa Avo povis translokigi la montojn, ĉu nia kolektivo kun potenca forto ne povas eĉ konstrui baraĵon?” Kaj ekbatalis baraĵ-konstrua armeo el 500 personoj sur la strando. Ili portis unu- aŭ du-ope teron kaj ŝtonojn per vektoj kaj korboj, en fervora konkuro.

Multaj faras, multe fruktas. Finkonstruiĝis en nur 13 tagoj granda baraĵo 600 metrojn longa, 3.3 metrojn alta kaj 10 metrojn larĝa ĉe la bazo. Poste, la komunumanoj alportis fekundan grundon de sur monto kaj formis el ĝi tavolon kun dikeco de 1 metro, kaj tiamaniere transformis 45-muan sablejon ĉe la bordo en fruktodonan kampon. En la sekvinta jaro, tiu kampo akiris abundan rikolton de 405 kilogramoj po muo, kio fariĝis la unua miraklo en la agrokultura historio de Gangdong-brigado.

La fera fakto donis trafan baton sur la teorio pri "materia stimulo" de la ĉina Ĥruŝĉov.

## II


En la jaro 1964, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon "Lernu de Daĝaj-brigado en agrokulturo".

La revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado aktive respondis al ĝi kaj ekagis laŭ ĝi senŝanceliĝe. Ili firme decidis plue reformi la malfekundajn ŝtupkampojn kun ĝisfunda revolucia spirito.

La ŝtupkampoj de la brigado havis nur maldikan tertavolon. Por ilin bonigi, oni devis konstrui ĉe la rando de ĉiu ŝtupkampo netan ŝtonbaraĵon, elfosi la ŝtonojn en la parceloj, aldoni tavolon da kruda grundo kaj fine kovri kaj ebenigi la parcelojn per la origina humo. Krome oni devis fari por ili sulkojn por irigacio kaj drenado. Tian ŝtupkampon "kun ŝtonbaraĵo, ebena surfaco, dika tertavolo kaj ebleco por irigacio kaj drenado" la komunumanoj nomas altnorma kampo de stabila altprodukto. Oni povas imagi al si, kiel multe oni devas penlabori kaj ŝviti por formi unu muon da tia kampo!

La revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, tamen neniom hezitis kaj decidis fari grandiozan konstruadon. Ĉiujare, kiam finiĝis la okupoplenaj sezonoj en somero kaj aŭtuno, la laborfortoj iom post iom transiĝis surmonten por komenci unun post alia la laborojn de ŝtonhakado kaj terfosado. En la frostaj vintroj, ĉiuj surmontiĝis por komenci malfacilegan bataladon. Post tia lukto dum

*La membroj de Gangdong-brigado ĝoje iras al la laboro.*



tri malvarmegaj vintroj kaj printempoj, ili finkonstruis 180 ŝtonajn baraĵojn kun totala longo de pli ol dekmil metroj. Ili reformis 400 muojn da sterila tero en stabilajn altproduktajn kampojn kun tertavolo 60-80 centimetrojn dika. Krome, ebeniginte altaĵon ili unuigis la 48 kampetojn apartigitajn de ĝi kaj formis fekundan kampon kun areo de 4.5 muoj.

Samtempe kun la reformado de la ŝtupkampoj, la revoluciaj amasoj de la brigado komencis radikale solvi la problemon de irigiacio. Ili decidis konstrui puton kaj pumpstacion sub la monto sude de la vilaĝo. Ili antaŭkalkulis, ke ili povas plenumi la taskon de 6 metrojn profunda puto per 1000 labortagoj. Sed la afero iris ne tiel glate: ili renkontis rokpecon etendiĝantan sur la tuta fundo de la kavo, apenaŭ ili fosis ĝis la profundeco de duona metro. Frapate de martelo, la ŝtonego disŝprucigis fajrerojn sed neniom moviĝis. Kion fari? Ĉu preni alian lokon? Tio sekvigis ŝanĝon de la projekto pri la pumpstacio, irigacia kanaletto ktp. La revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado kun la firma volo de la Malsaĝa Avo estis timigita de nenia malfacilo. Ili asignis 18 junajn fiŝistojn kaj alvenigis spertan ŝtonhakiston por ilin gvidi en tekniko. Ili kantis:

*Kun pioĉoj kaj fosiloj,  
Malsaĝan Avon ni imitas.  
Por altprodukto de l' parceloj,  
Ni surmonten akvon gvidas.*

Sperto mankis al la junuloj. Dum kelktaga hakado, iuj el ili vundiĝis je la mano kaj iu junulo eĉ grave vundis al si la kruron per martelo. La konstruantoj ŝanceliĝis. Ĉu iri antaŭen aŭ returnen? Je tiu kriza momento, ili relernis la instruon de Prezidanto Maŭ: "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon." Ĉiu el la vortoj de Prezidanto Maŭ donis forton, kaj tuj vekis en ili senliman kuraĝon. Ili resumis sian sperton de malsukcesoj kaj daŭrigis sian batalon. Finfine ili "formordis" la ŝtonegon per 3,100 labortagoj kaj pretigis puton 6 metrojn profundan. Por plivastigi la irigaciatan areon, ili konstruis basenon apud la puto dum unu printempo kaj kondukis en ĝin

riverakvon. Tiuj konstruaĵoj garantias la irigiacion de 400 muoj da ŝtupkampoj. Se oni vizitas Gangdong-brigadon hodiaŭ, oni povas de malproksime aŭdi motorbruon de la pumpstacio. Klara akvo fluas de monttalo al monttalo, irigacias la 400 muojn da ŝtupkampoj kaj grandskale pliigas la grenprodukton.

Depost la komenco de la granda proletara kultura revolucio de nia lando, la revoluciaj amasoj de Gangdong des pli amas Prezidanton Maŭ kaj senlime fidelas al lia penso. Ĉiun batalan alvokon de la granda gvidanto ili plenumas



cent-pocente. En printempo, Prezidanto Maŭ elmetis la alvokon **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, kaj la revoluciaj amasoj tuj ekagis, ĝustatempe semis, irigaciis kaj donis necesajn prizorgojn neniam malstreĉiĝinte ĝis la rikolto. Kiam ili plantis bataton en la komenco de somero, ili renkontis maloftan trosekecon. Ili portis akvon per vektoj kaj siteloj kaj sukcese plenumis la plantadon. Ili rigardis ĉiun pliproduktitan greneron aŭ fiŝon kiel kontribuon por la defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kaj tiamaniere ili akiris abundegan rikolton en 1967.

En la aŭtuno, Prezidanto Maŭ ordonis: **“kontraŭbatalu egoismon kaj kritiku reviziismon”**, kaj la revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado tuj ekagis senprokraste. La viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj ĉiuj iris sur la batalfronton, konkure agis kiel kritikistoj kaj lanĉis furiozan atakon kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov. Sur la kampoj kaj ŝipoj, en la domoj kaj sur la stratoj, ĉiuj lokoj fariĝis batalejoj por kontraŭbatali egoismon, kritiki reviziismon kaj sieĝi la ĉinan Ĥruŝĉov.

Ili forte kondamnis la vipurajn artifikojn de la ĉina Ĥruŝĉov por restaŭro de kapitalismo, kiaj **“materia stimulo”**, **“laborpoentoj en komando”** kaj **“alte premii kaj peze puni”**. Ili diris: **“Se oni irus laŭ la vojo de la ĉina Ĥruŝĉov, finfine estos tago, kiam iuj tenos monujon dum aliaj portos almozulan korbon. Tio estas vojo kondukanta al pereco, kiun oni nepre ne iru.”** La vastaj revoluciaj amasoj havis unu saman konon pri la krimo de la **“materia stimulo”**, **“laborpoentoj en komando”** kaj **“alte premii kaj peze puni”**, nome ĉio ĉi tio oponas kontraŭ elstarigo de la proletara politiko, subfosas la kolektivitan ekonomion, koruptas la animon de la homoj, kaŭzas klasan polariziĝon, kaj finfine kondukos al restaŭro de kapitalismo.

Dank’ al la amasa kritikado, la vasta komunumanaro ne nur fariĝis klarvida pri la abomeninda vizaĝo de la ĉina Ĥruŝĉov, sed samtempe ankaŭ pri la malutilo de egoismo. Komunumano Liu Ĝaŭking diris kun profunda kompreno: **“Simile al morditoj de vipuro, ni devas ne nur batmortigi la vipuron, sed ankaŭ elimini la ricevitan venenon, alie ni eble ankoraŭ ricevostatencan en la estonto.”**

Komunumano Liu Gjucuj estas forta junulino. Ŝi estas saĝa kaj kapabla, sed la amasoj ŝin rigardis kiel personon **“malfacile trakteblan”**. En la pasinteco, ŝiaj okuloj estis vualitaj de laborpoentoj, kaj ŝi ĉiam zorgis unue pri la gajnotaj laborpoentoj kiam ŝi akceptis iun taskon. Iunokte dum aŭtuna rikolto, subite ekpluvis. La brigadestro tuj haste kunvokis la membrojn por savi la rikoltaĵojn sur la draŝejo, sed Liu Gjucuj unue demandis: **“Kiom da laborpoentoj vi donos al mi por tio?”**

**“Kial laborpoentojn?! Rapidu savi la kolektivitan grenon!”**

Aŭdinte tiujn vortojn de la brigadestro, Liu Gjucuj diris nenion, brue riglis la pordon kaj enlitiĝis por dormi.

Kiam la brigadestro ŝin kritikis poste, ŝi eĉ kverelis kun li.

Post kiam Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon **“kontraŭbatalu egoismon kaj kritiku reviziismon”**, Liu Gjucuj ŝanĝiĝis. Ŝi aktive parolis en la kunvenoj ĉe kamprando aŭ en sia hejmo por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon. Ŝi diris: **“En la pasinteco, mian kapon okupis egoismo. Mi ne aŭskultis la instruojn de Prezidanto Maŭ, kaj estis venenita de la ĉina Ĥruŝĉov per ‘laborpoentoj en komando’.** Mi impetis en laboro, kiu ebligis gajni multajn laborpoentojn, sed malrapidis, se la laboro ne povis havigi al mi multe da tio. Nun post studo de la ‘tri popularaj artikoloj’ verkitaj de nia amata Prezidanto Maŭ kaj la amasa kritiko, mi komprenas, ke ‘laborpoentoj en komando’ kondukas al eraro ĉiam pli granda. La radiko de la eraroj faritaj de mi kuŝas en la ĉina Ĥruŝĉov. De nun mi nepre forte batalos kontraŭ egoismo kaj forte kritikos reviziismon. Mi klopodos fariĝi homo kia doktoro Bethune, fariĝi homo kiu komplete sin donas al aliaj sen ajna konsidero pri si mem.”

Nun oni trovas, ke Liu Gjucuj antaŭiras en laboroj kaj preferas mem preni la pezajn laborojn lasante al aliaj la malpli pezajn. Iunokte dum la aŭtuna rikolto de 1967, denove pluvis. Liu Gjucuj kaj aliaj membroj tuj meminciate iris aranĝi la draŝejon. Tiufoje la brigadestro neniel povis konstati, kiuj partoprenis la laboron, ĉar neniu el ili volis anonci sian nomon.

Liu Gjucuj ne plu estas persono **“malfacile traktebla”**, sed fariĝis jam aktivulo en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ŝi ja ne estas sola en sia tipo. Ni prenu krome ekzemplon pri aljuĝo de laborpoentoj.

Gangdong-brigado jam ekpraktikas la progresintan sistemon de aljuĝo de laborpoentoj — ne ĉiutage aljuĝi kaj registri la laborpoentojn de ĉiu persono, sed amase diskuti kaj difini la laborklason de ĉiu homo unufoje en ĉiu monato. Kaj la diskuto kaj difinado estas samtempe procezo de memkritiko kaj interlernado. En sia laborgrupo, komunumanino Liang Juelan estis juĝita kiel unuaklasa; sed ŝi ripetfoje esprimis, ke tion ŝi ne meritas memkritikante pri sia eraro ne lasi sian edzon fariĝi kadro. Ŝi diris: **“Tio ĉi estas ago egoisma, nekonforma al la instruo de Prezidanto Maŭ tutkore kaj tutanime servi al la popolo.”** Sed la samgrupanoj juĝis ŝin kiel unuaklasan opiniante, ke ŝi varme amas Prezidanton Maŭ, kuraĝas eldiri kaj kontraŭbatali sian egoismon kaj estas zorgema pri la kolektivo kaj aktiva en laboro.

Sennombraj estas tiaj ekzemploj.

Batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo jam fariĝis nova moro ĉe la amasoj de Gangdong-brigado, kiuj arde amas nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj senlime fidelas al la penso de Maŭ Zedong.

La revoluciaj amasoj de Gangdong-brigado nun venke marŝas antaŭen sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

# Nova Fizionomio de Hengŝa

STUDADO de verkoj de Prezidanto Maŭ jam fariĝis moro inter la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la insulo Hengŝa de Baŭŝan-gubernio, Ŝanhajo. Kiel sunobriilo la penso de Maŭ Zedong lumigas ĉiujn angulojn de la tuta insulo. Profunde ŝanĝiĝis la fizionomio de la homa spirito kaj de la produkto.

## ARDA ENTUZIASMO EN STUDADO DE VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ

“Marnavigo dependas de stiristo, revoluciado dependas de la penso de Maŭ Zedong.”

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hengŝa ĉiam havas verkojn de Prezidanto Maŭ en sia poŝo, vortojn de Prezidanto Maŭ sur siaj lipoj kaj la penson de Maŭ Zedong en sia koro, kaj sekvas la instrukciojn de Prezidanto Maŭ en siaj agoj. Kun profunda klasa amo ili kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ.

Ankaŭ la blinda maljuna malriĉkamparano Li Fuking de la 13-a produkta grupo de Hingŝeng-a Produkta Brigado decidis studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Ne povante vidi li petis aliajn voĉlegi la verkojn por li. Li diris kun profunda konvinkiĝo: “Se oni studas verkojn de Prezidanto Maŭ, li neniam perdos sian vojon eĉ ne havante la vidkapablon; alie, li ne povos sin orienti, eĉ kun sanaj okuloj.” Ĉiuvespere antaŭ sia enlitiĝo, li ĉiam karesas la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Foje, li iris pli ol dek liojn dum pli ol kvar horoj kun helpo de bastono por aĉeti portretojn de Prezidanto Maŭ, kiujn li surgluis sur la murojn de sia ĉambro. “Kvankam mi ne povas vidi ilin,” li diris, “tamen, kiam mi palpas ilin, mi sentas varmon en mia koro, kaj energio plenigas mian tutan korpon.”

Malriĉkamparanino Guo Langen havas multajn infanojn kaj pezajn domlaborojn. Sed tio ne povas malhelpi ŝin en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ŝi ĉiam ĉeestis, kiam la produkta grupo aranĝis kolektivan lernadon. Iunokte, portante sian infanon en unu brako kaj tenante lanternon en la alia mano, ŝi iris por partopreni la studadon de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Tiam pluvis, la vojo estis glita, kaj la ĉirkaŭaĵo estis malluma. Subite, pro malatento ŝi glitfalis en rivereton. Subordiĝinte, ŝi denove daŭrigis sian vojon kun malsekigitaj vestoj. Kiam ŝi atingis la studrondon, iu demandis ŝin: “Ĉu vi sentas malvarmon?” Ŝi respondis kun rideto: “Iomete. Sed la verko de Prezidanto Maŭ varmigis mian koron.”

Kian profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ havas la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!

## PARKERA ELLERNO DE LA “TRI POPULARAJ ARTIKOLOJ” DE KOMUNUMANOJ

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hengŝa studas verkojn de Prezidanto Maŭ ne nur en kunvenoj sed ankaŭ ĉe kamprandoj dum laborpaŭzoj. Ofte kune studas armeanoj kaj popolanoj, kaj la membroj de tuta familio aŭ de tri generacioj de la avo ĝis la nepoj. En ĉiu familio troviĝas homoj kiuj povas parkeri la “tri popularajn artikolojn”. Laŭ nekompleta statistiko, tion kapablas jam 47% el la plenaĝaj membroj de la komunumo. Post malfacila penado kun profunda klasa amo, la malriĉkamparanino Ŝi Mejĝen povas parkeri ses brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ, nome: la “kvin popularajn artikolojn”\* kaj krome *De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?* Tia ekzemplo ne estas sola en la insulo.

Plejparto el la ruĝaj soldatetoj, kiuj vizitis lernejon por tri aŭ pli multaj jaroj, povas parkeri la “tri popularajn artikolojn” kaj ĉirkaŭ cent eldirojn de Prezidanto Maŭ Zedong. Lu Ĝaŭdi, nur kvinjara, povas parkeri antaŭ multaj homoj la artikolojn *Servu al la Popolo* kaj *Memore al Norman Bethune*, sen preterlasi eĉ unu vorton. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: “El mil kaj mil taskoj, la plej grava estas la tasko studi verkojn de Prezidanto Maŭ; okupitaj de mil kaj mil aferoj, ni nepre ne forgesu studi verkojn de Prezidanto Maŭ.” Ili diris pri trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ: “Frue progresas tiu, kiu frue studas ilin; malfrue progresas tiu, kiu malfrue studas ilin; kaj eraron certe faros tiu, kiu ne studas ilin!” Ili diris brave ankaŭ:

“Prezidanto Maŭ verkis siajn trezorajn librojn por ni malriĉuloj. Kiu studu kaj apliku ilin, se ne ni!”

## KONTRAŬBATALI EGOISMON, KRITIKI REVIZIISMON KAJ REMULDI LA MONDKONCEPTON

La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong estas potenca armilo por remuldi homan animon kaj spirita forto por nutri kaj kulturi novajn komunismajn homojn. Prenante la “tri popularajn artikolojn” kiel sentencon, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj ripetade ilin studas. Prenante Ĝang Side, Norman Bethune kaj la Malsaĝan Avon kiel siajn brilajn ekzemplojn, ili batalas kontraŭ la egoismo en sia kapo por ĝisfunde remuldi sian mondkoncepton.

Ĉar la ideo pri privata posedado havas historion de pluraj jarmiloj, la egoismaj pensoj estas sufiĉe multaj en ilia kapo. Per batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo kaj kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, ili plenforte eliminis la egoismajn pensojn kaj starigas en si kolektivismon. En la pasinteco, oni “terkulturis por laborpoentoj”; kaj nun, ili “terkulturis por la revolucio”. Antaŭe, por iuj virinoj “la korpo venas al la kampo, sed la koro restas en la domo”; sed nun, “starante antaŭ sia domo, ili ĉirkaŭprenas la mondon per la rigardo”. Pasinttempe, iuj tutkore zorgis pri siaj familiaj kromokupoj, pensante ke “la manĝo dependas de la kolektivo, dum la poŝmono de la propra klopodo”. Sed nun ili plenanime sin okupas pri kulturado de komunaj kampoj, dediĉante sin tutkore al la kolektivo kaj la revolucio.

Antaŭe, kelkaj komunumanoj de la kvina produkta grupo de Ŝenglia Produkta Brigado ofte disputis pro kalkulo de laborpoentoj. Sed, lasttempe por konsente

noti laborpoentojn, ili uzas nur tre mallongan tempon, ĉar ili jam armis sin per la penso de Maŭ Zedong, elstarigis la proletaran politikon, kaj ĉiuj disvolvis en sia familio batalon kontraŭ egoismo kaj kritikon al reviziismo, uzante la metodon de “helpo de unu al la alia por fariĝi ruĝa en duopo”, tiel ke ili forbalais komplete la egoismon el sia pordo kaj lasis la kolektivismon instaligi en sia domo.

Studinte verkojn de Prezidanto Maŭ, Hju Jonglan, la politika laborantino de la milica plotono de la kvara produkta grupo de Hongkia Produkta Brigado, postulas sin ĉiam agi laŭ la normo “**servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve**”. Antaŭe ŝi ne volis labori en la kamparo kaj antaŭ ĉiu afero ŝi unue kalkulis por si mem. En la laboro, ŝi faris inerte nur tion, kio estis necesa. Studinte la “tri popularajn artikolojn”, ŝi ekkomprenis ke ĉiu ajn laboro estas senescepte servo al la popolo. Komparante sin kun Ĝang Side, Norman Bethune kaj la Malsaĝa Avo, ŝi sentis ĉiam pli grandan honton. Ŝi decidis energie remuldi sian ideologion, severe postuli de si agi en ĉiu okazo laŭ alta normo kaj fari ĉion bonan. Kiam ŝi vidis, ke mankas al la maljuna malriĉkamparano Huang Hjueking helpanto por lavi liajn vestojn, ŝi ekmemoris la vortojn de Prezidanto Maŭ “**ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi sin unu alian**” kaj lavis la vestojn de Maljuna Huang kune kun alia komunumano post la taglaboro.

## TUTKORE KAJ PLENANIME POR LA POPOLO

La granda proletara kultura revolucio estas severa provo ankaŭ por kadroj. En la komenco de la movado ankaŭ Hjue Ĝangjong, estro de la oka produkta grupo de Hingŝenga Produkta Brigado estis kritikita de la amasoj. En la komenco tio kaŭzis al li ĉagrenon, kaj formiĝis tubero en lia penso. Poste, kun tiu problemo li studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ekkomprenis la veron ke kadroj devas “**iri en la mondon kaj sperti ventojn kaj pluvojn**” kaj devas “**persisti en ĉio bona kaj korekti ĉion malbonan por la interesoj de la popolo**”. Tiel li prenis la kritikojn de la amasoj kiel movforton por hardi sin kaj antaŭenpuŝi sin al progresado, kaj denove gvidis aktive la produkton kaj aliajn laborojn kun plena revolucia entuziasmo. Tamen lia edzino riproĉis lin malkontente: “Funkciante kiel kadro, kion vi rikoltis kontraŭ viaj penoj? Kaj vi volas labori plu kiel kadro, spite al mia admono! Ĉu ankoraŭ ne sufiĉis al vi la kritikoj?”



Se vi plu eliros vespere, mi riglos la pordon kaj ne lasos vin eniri!” Hjue Ĝangjong nur ridetis al ŝi, sed ignoris ŝiajn vortojn kaj plenanime laboris kiel kutime. Iuvespere, reveninte de kunveno li vere trovis la pordon firme riglita. Lia edzino ne konsentis enlasi lin. Tiam estis ĝuste fine de decembro kaj la frosta vento rekte mordis la ostojn. Tamen, tute ne ŝanceliĝis la revolucia volo de Hjue Ĝangjong. Li ekkaŭris antaŭ la pordo kaj komencis legi atenteme la “tri popularajn artikolojn” sub la lumo de sia elektra torĉo por kuraĝigi kaj instigi sin per la vortoj de Prezidanto Maŭ. Pasis pli ol unu horo, kvankam liaj manoj kaj piedoj rigidiĝis de frosto, tamen li sentis varmon en sia koro pro la brilo de la penso de Maŭ Zedong. Poste lia edzino fine malfermis la pordon. Enirinte la ĉambron, antaŭ ĉio li studis la ĉapitron “Servi al la Popolo” el la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kune kun la edzino. “Antaŭ la Liberiĝo,” li diris al ŝi, “ni malriĉuloj laboris tagnokte por bienuloj, tamen sufiĉis al ni nek manĝo nek vesto. Kial? Ĉar ni ne havis la regpotencon. La kritikoj de la amasoj celas nur helpi min korekti miajn erarojn por ke mi pli bone servu al la popolo. Kiel ni povas forlasi la regpotencon, nian vivradikon, nur pro tio, ke oni faris al mi iom da kritikoj?”

Sub lia pacienca helpado, lia edzino rapide progresis. Nun ŝi ne nur ne malhelpas, sed, male, eĉ admonas kaj stimulas sian edzon bone fari sian laboron.

## LA ARMEO KAJ LA POPOLO ESTAS KVAZAŬ DE LA SAMA FAMILIO

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hengŝa profunde konvinkiĝis el siaj sennombraj travivaĵoj ke la Popola Liberiga Armeo persone fondita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de vicprezidanto Lin Biaŭ estas fortika bazo de la fera ŝtato de la proletaro. Ili ĉiuj prenas kore la batalantojn kiel siajn intimulojn.

Foje, iu roto de la garnizono en la insulo intencis prepari “amarmemorigan manĝon” el sovaĝaj legomoj, per kiuj malriĉuloj nutris sin en la malnova socio. Tio estas tradicio de nia armeo por fari klaskonsciigan edukadon al la batalantoj. Vidante ke la batalantoj kolektas ĉe kamprandoj sovaĝajn legomojn, la komunumanoj de la apuda produkta brigado pensis ke legomoj mankas al la roto kaj tuj alsendis plenan bovĉaron da ili. Kiam la batalantoj klarigis la aferon kaj volis resendi la legomojn al la produkta brigado, la komunumanoj are kolektiĝintaj insiste petis ke la batalantoj nepre akceptu la donacaĵon. La partia filio de la roto decidis ke la batalantoj kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kune prenu la “amarmemorigan manĝon”. De tiam, vaste disvastiĝis tra la insulo la bona tradicio de klaskonsciiga eduko per “amarmemoriga manĝo”. Per tio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj gravuris en sian memoron la pasintan amaron kaj la sangan klasan malamon kaj neniam forgesos la bonfaron de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista

Partio, kiuj portis al ili la emancipiĝon kaj la nunan feliĉon.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la insulo ĉiuj prenas la aferojn de la garnizono kiel la siajn. Ili diras: “La armeanoj estas niaj intimuloj, kiujn alsendis Prezidanto Maŭ. Ilia malfacilo estas ankaŭ la nia. Se ni faras ion por ili, tio estas nur elmonstro de nia koro.”

La kamaradoj de la garnizono interligiĝas kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj koro kun koro. La armeanoj kaj la milicanoj kune studas trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ sub la sama lampo, kune ekzercas sin sur la sama placo, kune interbabilas pri siaj pensoj sur la sama benko, kune terkulturas sur la sama kampo kaj kune gardstaras por defendi la saman insulon. La intima rilato inter la armeanoj kaj la popolanoj, simila al tiu de sango kun karno kaj fiŝo kun akvo, atingis novan altecon.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj elstarigante la proletaran politikon, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hengŝa puŝas la amasan movadon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ al nova etapo. Ne malproksima estas la tago kiam Hengŝa fariĝos granda ruĝa lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

---

*\*La “kvin popularaj artikoloj” estas komuna nomo por la artikoloj de Prezidanto Maŭ Servu al la Popolo, Memore al Norman Bethune, Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo, Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio kaj Kontraŭ Liberalismo.*

---

## BRAVAJ ELDIROJ

☆ Mi varme amas kion Prezidanto Maŭ varme amas; mi subtenas kion Prezidanto Maŭ subtenas; mi plenumas kion Prezidanto Maŭ instrukcias; kaj mi antaŭenmarŝas, kiam Prezidanto Maŭ mansignas.

☆ Ne gravas kapoperdo, sed venku l’ ver’ en certo; por defendi Prezidanton Maŭ, mi min oferos en preto.

---



*K-dino Vang Jin'e studas la verkon de Prezidanto Maŭ.*

# *la Popolo dum la Tuta Vivo*

## *Labori Kiel Servanto de*

**K**AMARADINO Vang Jin-e, vicdirektanto de la Ki-vilaĝa milica bataliono de Hin-gubernio, Ŝanhi-provinco, estas juna revolucia sturmantino. Oni povas vidi en ŝi la spiritan fizionomion de la juna generacio de nia popolo, rapide kreskanta sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong.

### **PRO KIO LA SAMVILAĜANOJ AMAS TIUN ĈI JUNULINON?**

La 10-a de majo, 1967, estis bela sunbrila tago. Ĉe la vilaĝfino kaj sur ĝiaj stratoj amasiĝas miloj da homoj, kiuj, ne deturnante sian rigardon de la ŝoseo kondukanta al la gubernia urbo, kun emocio atendis Vang Jin-e revenantan de Prezidanto Maŭ.

Vang Jin-e partoprenis en la Ŝanhi-provinca Delegacio al Pekino por Lernado. Hodiaŭ ŝi revenos hejmen. En Pekino la granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis la delegacion, manpremis kaj fotografiĝis kun ĝia tuta membraro sur Tiananmen-pordego en la internacia laborista festotago "la Unua de Majo". Kiam tiu informo atingis Ki-vilaĝon, ĝi tuj ĝoje skuis la tutan vilaĝon kaj la tutan komunumon. Hodiaŭ disvastiĝis la novaĵo pri ŝia reveno, kaj la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj milicianoj de la vilaĝo ĉiuj volas la

unua vidi Vang Jin-e kiun akceptis Prezidanto Maŭ, la unua aŭdi la ekstreme ĝojigan informon pri la bona sano de Prezidanto Maŭ kaj la unua premi la manon kiun premis Prezidanto Maŭ.

Dume iuj diris: "Jin-e ja vidis la mondon. Estas dubinde, ĉu ŝi ankoraŭ tenas nin en sia memoro." Aliaj konjektis: "En iu venonta tago eble ŝi transposteniĝus en la provincan ĉefurbon aŭ la gubernian urbon."

Facile kompreneblaj estas la babiloj de la amasoj pri Vang Jin-e. De infano el malriĉa familio ŝi kreskis en estron subtenatan de la amasoj; ŝi, ordinara kadro de milicianoj, estis elektita kiel membro de la revolucia komitato de la provinco. Tio estis tre granda ŝanĝiĝo. Kompreneble, oni tre atente observadis, kiel ŝi sin tenas al la fido kaj honoro donitaj de la Partio kaj la popolo.

Tute kontraŭe al la konjekto de iuj homoj, en la tago de sia reveno ŝi surhavis, same kiel antaŭe, la bluan jakon, kiu jam perdis la koloron, kaj ŝultroportis la flavan tornistran kun verkoj de Prezidanto Maŭ. Same kiel antaŭe, reveninte al la vilaĝo, anstataŭ iri hejmen ŝi klopodis por viziti malriĉajn kamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. De familio al familio ŝi iris por komuniki la eksterordinare ĝojigan novaĵon pri la akcepto fare de Prezidanto Maŭ al la Ŝanhi-

provinca Delegacio, kaj krome zorgeme ilin demandis pri diversaj aferoj de la ĉiutagaj vivbezonaĵoj kiaj brulaĵo, rizo, oleo, salo ĝis la tri revoluciaj bataloj. Kiel kutime, malgraŭ ke ŝi laboris ĝis profunda nokto, ŝi eklaboris en la kampo pli frue ol la aliaj komunumanoj tuj ĉe la mateniĝo de la sekvinta tago.

La pribabilo ĉe la amaso pri Jin-e iom post iom malaperis. Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, Jin-e fariĝis pli modesta kaj simpla ol antaŭe, ŝia spirita mondo fariĝis pli alta kaj ŝia koro kunligiĝis kun la amaso pli strikte.

En la internacia laborista festotago "la Unua de Majo", 1967, kiam Prezidanto Maŭ fotografiĝis kun la Ŝanhi-provinca Delegacio dum akcepto sur Tian-anmen-pordego, Vang Jin-e feliĉe staris tuj apud Prezidanto Maŭ. Ŝi sentis, ke tio estas la plej granda feliĉo, la plej granda honoro por ŝi en la tuta vivo. Sed ĝuste en tiu plej feliĉa momento ŝin ekkaptis la ideo, ke kamarado Ĉen Jongguj alte tenas la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj faris pli grandan kontribuon al la revolucio kaj devas stari pli proksime al Prezidanto Maŭ, tial ŝi meminiciate cedis sian bonan lokon al li. Kvankam kamarado Ĉen Jongguj modeste rifuzadis tiun honoron, tamen ĉiuj insistis ke li staru apud Prezidanto Maŭ.

Iun fojon kiam ĵipo de PLA devis reveni de Ki-vilaĝo al la gubernia urbo, tiam ankaŭ Vang Jin-e devis iri al la urbo por kunveni. Pro samvojo la ŝoforo proponis al ŝi sidlokon. Ŝi rifuzis kun dankoj kaj veturis al la urbo per biciklo.

Ŝi ofte diris: "La honoro estas donita de Prezidanto Maŭ, kaj la sukcesoj estas kreitaj de la amasoj; estas mia devo labori kiel servanto de la popolo kaj bone servi al ĝi." Ŝi neniam elpendigis diplomojn de honoro donitajn de la gvidaj instancoj kaj fotojn faritajn por ŝi de raportistoj; ŝi faris grandan nombron da bonoj, sed pri tio ŝi neniam menciis al aliaj.

Estas ege erare konsideri tion banalaj "bagateloj". La degeneriĝo de homo trafita de sukertegitaj obusoj ĝuste komenciĝas de tiaj "bagateloj". La fera bastiono en penso por oponi kaj preventi reviziismon ja estas konstruita el brikoj kaj tegoloj de tia senlaca penado.

## EN LABORO ĈIAM IRI ANTAŬ LA ALIAJ

Prezidanto Maŭ diris: "Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva

produkta laboro... Tio estas granda afero kun fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon."

Kamaradino Vang Jin-e kun seriozo komprenis tiun instruon de Prezidanto Maŭ kaj ĝin praktikas en la vivo. Ŝi scias, ke mallaboremo signifas komencon de degenero kaj nepartopreno de produkta laboro certe disigos ŝin de la amasoj; spite al ĉia ajn ŝanĝiĝo, la esenca karaktero de la laboranta popolo devas neniam ŝanĝiĝi; en kia ajn okupateco oni devas partopreni kolektivajn produktajn laborojn. Tial, anstataŭ malpli multe ŝi plimulte partoprenis kolektivajn produktajn laborojn post kiam ŝi estis elektita kiel komitatano. Ŝi laboras sen konsidero pri la laborpezo, vetero kaj gajno de laborpoentoj. Ŝi ĉiam laboras kaj ŝvitas kune kun la amasoj. Ŝi profunde komprenas el sia sperto, ke ju pli multe oni partoprenas kolektivajn produktajn laborojn, des pli profundiĝas la klasa amo al la amasoj. En kolektiva produkta laboro Vang Jin-e ĉiam aperas kie troviĝas malfaciloj kaj kie la laboro estas pli peniga. En ĉiu ŝlosila momento ŝi aperas senescepte en la amasoj kaj gvidas ilin marŝi antaŭen.

Iun profundan nokton en la lasta jaro, apenaŭ kamaradino Vang Jin-e revenis hejmen post kunveno, ŝi subite aŭdis urĝan sciigon el megafono pri inundprevento. Ŝi sciis, ke la riverlito okcidente de la vilaĝo estas pli alta ol la kampoj, kaj se la digoj estos breĉigitaj, miloj da muoj da plantaĵoj estos inunditaj. Ŝi tuj ekprenis instrumenton kaj la unua kuris al la plejfronto kontraŭ inundado. En tiu tempo la pluvo torentis kaj la fluo en la rivero senĉese ŝvelis. Kune kun la PLA-anoj en la vilaĝo por subteni agrikulturon Vang Jin-e gvidis la milicianojn al la rivero kaj senhezite saltis en ĝin por batali kontraŭ fluego. Sub la gvidado de Vang Jin-e, la PLA-anoj, milicianoj kaj komunumanoj, sume pli ol 300 personoj, kune laŭtlegis: "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon." La voĉo tondre skuis la teron kaj la ĉielon. Kvankam ili batalis ĝis la deka de la sekvinta mateno, tamen ĉiuj restis ankoraŭ viglanimaj kaj kun alta batalspirito. Kamaradino Vang Jin-e persiste batalis pli ol kvin horojn en la akvo. Oni laŭdis ŝin dirante: "Jin-e vere estas bona junulino elkulturita de Prezidanto Maŭ."

## ESTI INTIMULO DE LA AMASOJ

Vang Jin-e estas tre zorgema pri kaj klopodema por la bonstato de la gekamaradoj kaj varmigas la koron de klasaj fratoj per fajra klasa amo de la proletaro. La amasoj ŝatas kunesti kun ŝi kaj laŭdas, ke ŝi estas intimulo de la malriĉkamaradoj kaj malsuperaj mezkamaradoj.

Ĝoŭ Deĝeng, aktivulino en lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ, suferis gravan artriton kaj ŝiaj membroj ne povis moviĝi. Rigardante la suferojn kaj malfacilojn de kamarado kiel siajn, Vang Jin-e klopodis ĉie por venigi por ŝi kuracistojn kaj aĉetis medikamenton per sia propra mono kaj krome kuraĝigis ŝin batali kontraŭ la malsano per la penso de Maŭ Zedong.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "Preni en manon ideologian edukadon estas la centra ĉenero en unuigo de la tuta Partio por fari grandan politikan batalon", Vang Jin-e atentigas precipe la propagandon de la penso de Maŭ Zedong. Ĉiufoje reveninte de kunveno, ŝi aĉetas verkojn de Prezidanto Maŭ, portretojn de Prezidanto Maŭ kaj insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ per la vivsubvencio kiun la ŝtato donis al ŝi, kaj disdonas ilin al la amasoj. Plejparto de la milicianoj en la vilaĝo ricevis de ŝi tiajn valorajn donacojn.

Baza milicano Hoŭ Ĝiming, diplomito fininta sian trijaran kurson en mezlernejo, ne volontis okupiĝi pri agrikultura produktado. Vang Jin-e meminciate proksimiĝis al li, zorgis lian vivon, kaj helpis lin progresi ideologie, kune kun li laboris, lernis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kuraĝigis, ke li kontrolu sin per la spirito de Ĝang Side kaj Bethune, forte batalu kontraŭ egoismo kaj firmdecide revoluciu en la kamparo dum la tuta vivo.

Hoŭ Ĝiming ja ne estas la sola kiu ricevis helpon de Vang Jin-e! Ŝi ĝojas pro progreso de kamaradoj kaj helpas tiujn kiuj estas postgintaj. Laŭ ŝia opinio, helpi pli multajn kamaradojn signifas kontribui pli multe al revolucio.

En iu fojo Vang Jin-e iris partopreni kunvenon de sia propra milica plotono por kolekti opiniojn pri si, sed nenion oni diris. Sur la vojo de hejme reveno ŝi pensis en si: "Kial oni diris nenion pri mi mem? La ĉefa kialo kuŝas en tio, ke mi multe aktivadis lastatempe en la gvida rondo kaj malofte revenis al mia plotono, tiel ke la amasoj ne sufiĉe bone sciis min." De tiam ŝi ne nur bone faris laborojn de la brigado kaj milica bataliono, sed ankaŭ ofte iras en la produktajn taĉmentojn, plotonojn kaj subplotonojn, lernas, interparolas kaj laboras kune kun la milicianoj kaj komunumanoj, tiel ke ŝi pli intimiĝas kun la amasoj.

Post kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ alvokis, ke "oni devas bone solvi la problemon de la rilatoj inter la superaj kaj malsuperaj instancoj kaj bonigi la rilatojn inter la kadroj kaj la amasoj", ŝi firme plenumas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ, faris decidon esti lernanto de la amasoj kaj servanto de la popolo dum la tuta vivo kaj revolucii dum la tuta vivo fidele sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

*Kune kun la milicianoj k-dino Vang Jin'e studas la "tri popularajn artikolojn" por forte kontraŭbatali sian egoismon kaj starigi kolektivismon.*



# Li Lianjing, Servistino en Pasaĝera Aeroplano

FEJ KONG

ĈIU pasaĝero de trajno, aviadilo aŭ ŝipo ĉiam deziras ke lia vojaĝo estu signifoplena kaj iru glate kaj sekure ĝis la celloko. La fervoja, ŝipa kaj aviada komunikoj de Ĉinio estas ĝuste

tiel aranĝitaj, por ke tiu komuna deziro de la pasaĝeroj estu tute kontentigita.

En tiu ĉi artikolo ni prezentos al la legantoj kamaradinon Li Lianjing, servistinon en pasa-



*Li Lianjing kaj ŝiaj batalamikinoj interparolas pri la kompreno de la penso de Maŭ Zedong.*



ĝera aeroplano, kiu kreskis sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong kaj dediĉas sian tutan koron en servado al la pasaĝeroj.

## ĈIAM KAJ ĈIE POR LA PASAĜEROJ

18-jara Li Lianjing estas aktivulino en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la Pekina Administracio de la Ĉina Civila Aervetura Kompanio. En sia ĉiutaga laboro, ŝi profunde komprenas, ke por vere servi tutkore al la popolo kiel servistino en pasaĝera aeroplano, antaŭ ĉio, estas necese elstarigi politikon, kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ kaj direkti sian agadon ĉiam per la penso de Maŭ Zedong. De kelkaj jaroj ŝi ne nur fervore studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la pasaĝeroj kaj donacas al ili trezorajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj insignojn kun lia portreto, sed ankaŭ tutkore servas al ili kaj en ĉiuj okazoj direktas sian zorgon al ilia bono, prenante Ĝang Side, Bethune kaj aliajn heroojn kiel siajn modelojn.

Iufoje, en vojaĝo de la ĉefurbo al Harbino troviĝis inter la pasaĝeroj kamaradino, kiu ricevis vundon dum laboro. Li Lianjing tre zorgeme flegis tiun vunditan kamaradinon. Ŝi propramane distranĉis frukton kaj manĝigis al ŝi pecon post peco. Kiam la vundita kamaradino iris al la necesejo, ŝi ankaŭ tie ŝin helpis tre kompleze. Plej grave tamen estas tio, ke Li Lianjing kuraĝigis tiun kamaradinon lukti kontraŭ sia sufero per instruo de Prezidanto Maŭ. Kiam la aeroplano venis proksime al la celloko, tiu ĉi kamaradino diris al ŝi kun larmoj de dankemo: "Fratineto, vi estas kvazaŭ mia parenco, mi certe tenos en mia memoro la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj pli konsciencie plenumos mian laboron asig-nitan de la Partio, kiam mi resaniĝos."

Ali-foje, Li Lianjing trovis iun malsanan pasa-ĝeron, kiu volis kuŝigi sin. Ŝi tuj alportis sian surtuton por ke la malsanulo uzu ĝin kiel kap-kusenon. Kaj ŝi estis tre ĝoja kaj kontenta, kiam ŝi vidis, ke tiu ĉi malsana pasaĝero endormiĝis.

En iu vojaĝo de Pekino al Ŝanhajo, estis iu anglino, kiu portis kun si malpli ol unujaran infaneton. Al tiu knabeto Li Lianjing donis plej grandan zorgon. La infano ne mamsuĉis, kaj Li Lianjing manĝigis lin per persone preparita trinkaĵo el pulvorigita lakto. Kiam la infano ploris, ŝi portis lin anstataŭ la patrino kaj klopodis

amuzi lin. Antaŭ ol tiu ĉi angla amikino forlasis la aeroplanon, ŝi tre emociite kantis kun la servistino kanton prikantantan Prezidanton Maŭ, laŭdis ŝian bonan servadon kaj foje-refoje dankis ŝin.

## PROPAGANDISTINO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Nelonge post kiam Li Lianjing venis al sia laborposteno komenciĝis la senprecedenca, granda proletara kultura revolucio. De la oficejo de la Administracio ĝis la suraeroplanaj laborgrupoj disvolviĝis la movado "komandi la ĉiutagan laboron per la penso de Maŭ Zedong" kaj formiĝis la nova revolucia kutimo: ricevi instrukciojn de Prezidanto Maŭ en mateno kaj raporti al li pri la laboro dum la tago en vespero, pere de studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Por strikte sekvi la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ, la servistinoj ankoraŭ organizas la pasaĝerojn por fari revolucian amasan kritikon al la ĉina Ĥruŝĉov, kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon, kaj tio ricevis aprobon kaj subtenon de la pasaĝeroj.

Sed, kiel organizi la pasaĝerojn, kiuj venas el plej diversaj anguloj de la lando, en studadon de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la motorzumado de la aviadilo dum la mallonga kelkhora flugado? Tio por Li Lianjing ne estis sen malfaciloj. Prenu la prezentadon de revoluciaj literaturaj kaj artaj programeroj al la pasaĝeroj kiel ekzemplon. Komence tio levis ondadon en ŝia kapo. Ŝi pensis, ke ŝi neniam estis profesia aktorino kaj ne havas bonan voĉon aŭ lertajn membrojn por dancado, kaj dubis, ĉu ŝi sukcesos en la propagando per siaj prezentoj. Tial naskiĝis ĉe ŝi timo al malfaciloj. Poste, ŝi ripetade studis kun tiu ĉi demando verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ instruas: "**En tempo de malfacileco, ni devas vidi niajn atingajojn, devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon.**" Legante tiun lian grandan instrukcion, Li Lianjing sentis brulon sur la vangoj, ĉar ŝi trovis ke ŝia konduto ne konformas al la espero de Prezidanto Maŭ. Kiam ŝi pensis pri tio, la amara vivo de ŝia familio en la malnova socio reaperis antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi ja naskiĝis en mizera kamparana familio en Ĉangle-gubernio, Ŝandong-provinco. Antaŭ la Liberiĝo, ŝia patro tutjare laboris ĉe bienulo kiel jardungito, kaj ŝia patrino devis almozpeti de pordo al pordo, tamen la tuta familio ankoraŭ suferis de malsato kaj malvarmo. Ŝiaj du fratoj kaj du fratinoj

pliĝaj sinsekve mortis pro malsano kaj malsato. Post la Liberiĝo ŝia tuta familio ekhavis feliĉan vivon. Se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ja ne estus tiaj tagoj por ŝi hodiaŭ! Pensante pri tio, Li Lianjing firme decidis fariĝi propagandistino de la penso de Maŭ Zedong kaj popola servistino. Sed, por esti bona servanto al la popolo, antaŭ ĉio, estas necese fariĝi bona batalanto en eliminado de egoismo kaj starigado de kolektivismo kaj senkompate batali kontraŭ ĉiaj egoismaj konsideroj kun la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kiel armilo. De tiam ŝi ankoraŭ pli diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj modeste lernas de la kolegiinoj. Post certa periodo da ekzercado, ŝi fine ellernis la dancojn *Vivu Prezidanto Maŭ!* kaj *Sur la Ora Monto en Pekino*, la dialogon *Kontraŭbatali Egoismon kaj Kritiki Reviziismon*, la kantojn kun gestado *Mi Portas sur Mia Brusto Insignon kun Vortoj de Prezidanto Maŭ*, *Prezidanto Maŭ Inspekte Venas al Diversaj Lokoj* kaj aliajn prezentaĵojn. Kiam ŝi prezentis tiujn revoluciajn programerojn antaŭ la pasaĝeroj, multaj ĉinaj kamaradoj kaj fremdlandaj amikoj estis kortuŝitaj de ŝia sincera sento, kun kiu ŝi varme kaj entuziasme prikantis Prezidanton Maŭ.

## SENKOMPATE BATALI KONTRAŬ EGOISMO

Vicprezidanto Lin Biaŭ instrukiis: “Ni devas fari nin forto de revolucio kaj samtempe, ankaŭ objekto de la revolucio. En revolucio oni devas ankaŭ direkti ĝin kontraŭ si mem, se ne, oni ne povos sukcese konduki tiun revolucion.” Antaŭe, Li Lianjing ne havis komprenon pri remuldo de ideologio kaj revolucio kontraŭ la memo. Pri la vorto “remuldo” ŝi opiniis, ke ĝi koncernas nur la bienulojn kaj kapitalistojn. Kiel tio povus koncerni ŝin, filinon de malriĉkampano, kiu neniam faris ekspluaton, naskiĝis sub la ruĝa standardo kaj kreskis en la nova socio? Tiel, estante memkontenta pri sia bona deveno, ŝi iom post iom pensis ke ŝi “estas ruĝa denaske”. Tion rimarkinte, ŝiaj gvidantoj kaj kamaradoj sincere edukis kaj helpis ŝin, instigante ŝin uzi la “tri popularajn artikolojn” kiel ideologian armilon por remuldi sin, plenforte rompante egoismon kaj firme starigante kolektivismon en sia kapo. Li Lianjing legis krome multajn librojn pri heroaj kaj modelaj personoj, kaj trovis ke tiuj fariĝis grandaj komunismaj batalantoj ĉefe dank’ al tio, ke ili forte batalis kontraŭ sia egoismo per la penso de Maŭ Zedong. Por ili tute ne

ekzistas tia afero, kia “esti ruĝa denaske”, sed nur “esti ruĝa de konscia sinremuldo”. Dank’ al ripetada lernado kaj praktikado, Li Lianjing fine ekkomprenis la gravecon de elimino de egoismo kaj starigo de kolektivismo kaj firme batalas kontraŭ ĉiu ekfulmo de egoisma konsidero en sia ĉiutaga laboro kaj vivo.

Iufoje, Li Lianjing revenis de nokta aerveturo je tria horo matene, kaj sentis sin iom laca. Tiam ŝi pripensis, ĉu morgaŭ matene ŝi ankoraŭ ellitiĝu frue por fari purigajn laborojn kune kun la aliaj kamaradoj. Unue ŝi opiniis, ke ŝi revenis malfrue, kaj pro tio la kamaradoj certe povos pardoni ŝin se ŝi morgaŭ ellitiĝos iom pli malfrue; sed poste ŝi konsciiĝis ke tia penso estas egoismo. Kvankam iom pli multe dormi estas malgranda afero, sed lasi “mallaborem” superregi en la kapo ne estas afero malgranda. Se tiu tendenco daŭre evoluos, la bonaj kvalitoj propraj al la laboranta popolo povos esti perditaj. Ŝi do frue ellitiĝis por fari purigadon je la sekvinta mateno kiel kutime.

Li Lianjing kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj aktive propagandas la penson de Maŭ Zedong, kaj pro tio ŝi estas honorita kiel aktivulino en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj starigita kiel modelo de la kamaradoj de civila aviada fako.

## *Du Popolkantoj*

### I

*Ne tiom helas la brilanta suno,  
Kiom la pens’ de Prezidanto Maŭ.  
Ne tiom multas la sennombraj steloj,  
Kiom la saĝ’ de Prezidanto Maŭ.  
Ne tiel altas la gigantaj montoj,  
Kiel la granda ind’ de Prezidanto Maŭ.  
Ne tiel vastas la profunda maro,  
Kiel la bona far’ de Prezidanto Maŭ.*

### II

*Post maĉo de oliv’ ni sentas guston de sukero,  
Post liberiĝo ne forgesas ni la pasintecon.  
Nun dank’ al la gvidado de la kara Prezidanto,  
Kun ĉiu jar’ ni pli kaj pli ekvivas en prospero.*

# Niu Hiangjong Resaniĝis

**J**E la 28-a de februaro, 1967, en la kuracejon de la Higiena Sekcio de iu pekina divizio de la Ĉina Popola Liberiga Armeo venis la patrino de batalanto Niu Mingjin kaj lia 18-jara fratino Niu Hiangjong, suferanta de malsano. Ili venis en la kuracejon post longa vojaĝo de sia hejmvilaĝo en Vejhan-gubernio, Hebej-provinco. Transpaŝinte la sojlon, la maljuna patrino ne postulis unue, ke la armeaj kuracistoj diagnozu por ŝia filino, sed kore petegis ilin dirante: "Kamaradoj PLA-anoj, nepre akceptu mian filinon malgraŭ ĉio."

Kial ŝi diris tion al la kuracistoj?

## PRI LA MALSANO DE NIU HIANGJONG

En la vintro de 1965, kiam Niu Hiangjong estis nur 16-jara, ŝi komencis senti doloron en la maldekstra suba parto de sia abdomeno, kaj poste ŝia ventro komencis pufiĝi kun ĉiu tago. Post la malsaniĝo, ŝi vizitis hospitalojn de la popola komunumo, gubernio kaj subprovinco kaj ricevis plurfojnajn ekzamenojn kaj kuracadojn dank' al prizorgo de la partia filio de la produkta brigado, sed tute vanis la klopodoj. Ĉiam pli grandiĝis la ventro de la knabino, kaj pli kaj pli seriozaj simptomoj aperis ĉe ŝi. Ŝi spiris malfacile kaj povis sin movi nur kun penego. Kia brula maltrankvilo turmentis ŝian patrinon! En julio de 1966, la patrino veturis kun sia filino de Vejhan al Tiangin, kun la espero, ke fama hospitalo en tiu urbeĝo savos ŝian filinon.

## ROMPITA KANO

Ŝi informiĝis, ke en iu granda hospitalo de Tiangin laboras famega "specialisto" de tumoroj. Kun arda espero la patrino kaj filino turnis sin al li kun peto por helpo, sed tre malkonsciencia en sia laboro, tiu ĉi "specialisto" haste faris diagnozon post malzorgema ekzameno. Li asertis, ke en

ŝia ventro kreskas maligna difuza tumor, tio signifis, ke Niu Hiangjong suferis malsanon nekuraĉeblan. La patrino kaj onklo ripetfoje petis la "specialiston", ke li tenu la pacienton por kuracado, sed tiu ĉi "specialisto" diris kun rokofirma konvinko: "Ekster la hospitalo ŝi povos vivi ankoraŭ tri monatojn, sed kuracate en ĝi ŝi povos vivi maksimume nur unu monaton." Kaj per tio la knabino estis al morto kondamnita de la "specialisto" kun kapo plena de burĝaraj pensoj.

## LA PLA-KURACISTOJ MALESTIMANTAJ MALFACILOJN

Aŭdinte la rakonton de la patrino de Niu Hiangjong pri la okazaĵo en la tiangina hospitalo, la kuracistoj en la armea kuracejo tre indigniĝis kontraŭ la burĝara medicina "specialisto". Ja estis netolereble, ke iu kuracisto fame konata kiel medicina "specialisto" tiel aĉe sintenis kontraŭ la revoluciaj kamparanoj kaj malsanuloj. Pluraj el la ĉeestantaj kamaradoj diris: Se la burĝara medicina "specialisto" ne volis ŝin kuraci, do ni nepre ŝin akceptu por kuraco. Sed ankaŭ troviĝis inter ili kamaradoj, kiuj pensis kun maltrankvilo: Kion fari, se malsukcesos la kuraco?

Post la akcepto de la paciento, la kamaradoj de la kuracejo kreive studis la "tri popularajn artikolojn" kun la demando ĉu la malsano estas kuracebla, kaj faris varman diskuton pri tio, ligante tion kun la batalo inter la du linioj en la granda proletara kultura revolucio. Ili opiniis, ke akcepti aŭ ne akcepti Niu Hiangjong manifestas, ĉu oni kuraĝas rompi la superstiĉon pri burĝara "specialisto", kaj tio koncernas la principan problemon, ĉu oni tenas en sia kapo la penson de Maŭ Zedong; kaj sub la akcepto aŭ neakcepto kaŝiĝas respektive "kuraĝo" aŭ "timo" kaj "kolektivismo" aŭ "egoismo". Do la diskuto pri akcepto aŭ neakcepto

esence signifas batalon inter du malsamaj mondkonceptoj. Post la diskutado ili venis al kompreno, ke la malsamaj sintenoj al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj suferantaj de malsano esti tre varmkora kaj ekstreme respondecema al ili aŭ esti tute senkora kaj nerespondecema al ili kaj rifuzi ilin helpi markas la batalon inter la du klasoj, du ideologioj kaj du linioj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ la kamaradoj sin esprimis: La burĝara "specialisto" kondamnis Niu Hiangĵong al morto, sed la PLA-aj kuracistoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong nepre spitos ĉiajn malfacilojn kaj resanigos ŝin kun firma decido!

## LA UNUA VENKO — ĜUSTA DIAGNOZO

De kia malsano la paciento suferis? Oni devas fari definitivan kaj ĝustan diagnozon.

Ĉu oni akceptu la diagnozon faritan de la t. n. aŭtoritato de la granda hospitalo kiel bazon, aŭ kuraĝe neigu la diagnozon de la "specialisto" kaj elmetu sian propran opinion laŭ la faktoj?

Dum pluraj kunaj ekzamenadoj, pluraj armeaj kuracistoj neigis, surbaze de abunda scienca materialo, la diagnozon faritan de la tumora "specialisto", ke en la ventro de la knabino kreskas maligna difuza tumoro. Tamen iuj kamaradoj diris: "Kompreneble ni ne devas superstiĉe kredi je la burĝaraj 'specialistoj', tamen oni ne povis fari tian konkludon sen ia ajn bazo."

Por solvi tiun demandon, la partia filio organizis la personaron kreive studi kaj kreive apliki verkojn de Prezidanto Maŭ. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri kombino de revolucia sinteno kaj rigora scienca sinteno, ili faris ĉiuf flankan, seriozan, detalan kaj ripetitan ekzamenadon pri la malsano de Niu Hiangĵong kaj fine venis al fundamente unuanima konkludo, ke la knabino suferas de kolosa tumoro, nome "giganta ovaria kisto". Tiamaniere ili kategorie neigis la eraran diagnozon de la burĝara "specialisto" kaj faris sciencajn diagnozon pri la malsano de Niu Hiangĵong per la granda penso de Maŭ Zedong.

*La kuracisto en iu trupo de PLA rakontas kiel kuraci la malsanulon Niu Hiangĵong. Jen la granda tumoro (en la kesto) 16 kilogramojn peza.*



## LA PENSO DE MAŬ ZEDONG PRILUMIS LA OPERACIAN STABLON

Por fari operacion, ili vizaĝis al novaj malfaciloj. La kuracejo de la higiena sekcio estis tre malbone ekipita kaj neniam entreprenis tiel komplikan operacion, ĉu do oni povos sukcesi? Sed la kamaradoj faris analizon dirante: "Nun estas ni, kiuj plej bone konas la malsanon; se ni havas revolucionan sentimecon antaŭ la malfaciloj, ne superstiĉe kredas la aŭtoritatajn specialistojn kaj direktados nian agadon per la senlime brila penso de Maŭ Zedong, do ni kuraĝos elpreni eĉ multe pli grandan tumoron."

Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ "ne konduki batalon sen preparo, nek konduki batalon sen certeco pri venko" kaj "strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn, sed taktike ni devas trakti ilin ĉiujn serioze", la laborantoj de la tuta sekcio antaŭkalkulis pri ĉiuj eventualaj okazoj dum la operacio kaj elpensis taŭgajn rimedojn tiam bezonatajn kaj faris sufiĉan preparadon en spirito, tekniko, materio kaj organizado. Antaŭtagmeze de la 18-a de marto, komenciĝis streĉa batalo en la operaciejo sub la ĝusta gvidado de la partia komitato, la prizorgado de diversnivelaj gvidantoj kaj forta helpo de la 254-a hospitalo. Post du horoj kaj kvin minutoj da operaciado, unu tuta tumorego kun la pezo de 16 kilogramoj estis fine elprenita el la ventro de Niu Hiangĵong.

La novaĵo pri la sukcesa operaciado tuj disvastiĝis. La patrino kaj frato de Niu Hiangĵong, PLA-ano Niu Mingjin kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj kore ĝojkriis: "Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" La kuracaj laborantoj diris ĝoje: "Tiu ĉi sukceso estas venko de la penso de Maŭ Zedong kaj forta frapo sur la kapon de la burĝara 'specialisto'."

Du semajnojn poste, Niu Hiangĵong tute resaniĝis kaj elhospitaliĝis. Kiam ŝi estis forlasanta la hospitalon, ŝi emocie kriegis kun feliĉaj larmoj en la okuloj: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la Popola Liberiga Armeo!" Baldaŭ poste, ŝi skribis dankleteron al la kuracejo, el kiu oni legis interalie: "Estas nia plej plej ruĝa suno en la koro, nia plej plej amata kaj estimata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu donis al mi la duan vivon. Mi defendos Prezidanton Maŭ per mia dua vivo kaj tutkore kaj tutanime servados al la popolo."

Post dumonata ripozo, Niu Hiangĵong fortiĝis kaj partoprenis agrokulturan produkton.

## KURANTAJ AFEROJ

### LA UNUA HIDRAŬLIKA INSTALAĴO POR AŬTOMATA ELEKTROFORNEGA KONTRLO DE ĈINIO

La unua hidraŭlika instalaĵo por aŭtomata elektrofornega kontrolo de nia lando estas sukcese provfarita de la Benhi-a Ferŝtala Kompanio en Liaŭning-provinco.

La naskiĝo de tiu instalaĵo markas ke nia lando jam atingis internacian progresintan nivelon en la aŭtomata kontrolo de elektrofornega ŝtalfando. Tio kreis ekstreme favoran kondiĉon al nia lando por multe, rapide, bone kaj ŝpareme produkti altkvalitan alojan ŝtalon, kaj metis bonan bazon al nia lando por alta aŭtomatigo de elektrofornega ŝtalfando.

### SUKCESA FINKONSTRUO DE LA 10000-TONELA ŜIPO "CHAO YANG"

La 10000-tonela ŝipo "Chao Yang" estas projektita kaj konstruita de la Ŝanhaja Giangnan-ŝipkonstruejo.

Tiu ŝipo longas 161 m. kaj larĝas 20.4 m., ĝia tonelaro estas 19,800. Ĝi kapablas porti ŝarĝon de 13,000 netaj toneloj kaj navigacii 40 tagnoktojn sen survoja preno de provizo kaj kun pohora rapideco de 17.5 mejloj.

### GRANDA PLASTOŝMIRITA KOLORPORTRITO DE PREZIDANTO MAŬ

Sub aktiva kunlaborado de frataj entreprenoj kaj post centoj da provoj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la 9-a Presejo de Ŝanhajo fine elfaris grandan plastoŝmiritan kolorportreton de Prezidanto Maŭ.

La plastoŝmirita portreto en grandeco de 2.5 m x 2 m. estas glacea kaj travidebla, kaj imuna kontraŭ malsekeco kaj paliĝo sub diversaj klimatoj. Tia granda portreto estas konvena por subĉiela pendado en stratoj, kunvenejoj, fabrikoj, vilaĝoj, trupoj kaj aliaj lokoj.

# Merkato



*Majong-komunumo en Guangdong-provinco abunde rikoltis bananojn. Nun la komunumanoj ilin sendas al la ŝtata kolektejo.*

**S**UB la direkto de la politikoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion kaj stimuli la produkton**” kaj “**disvolvi la ekonomion kaj garantii la liveron**”, la merkato en urboj kaj kamparo de nia lando ĉie prezentas viglan kaj prosperan spektaklon en la senprecedenca granda proletara kultura revolucio.

En 1967, la liverado de varoj, ĉu en urboj ĉu en kamparo, estis kompare sufiĉa. La merkato vere prosperis kaj la prezoj estis vere stabilaj. La liverado de greno,

viando, legomo kaj frukto estis pli bona ol tiu en 1966. Kaj tiu de fabrikaĵoj por ĉiutaga uzo fundamente kontentigis la bezonon de la popola vivo. La vendokvanto de la kotonteksaĵoj kaj trikotaj vestoj en 1967 pliiĝis ol tiu en 1966; kaj tiu de kudromaŝinoj, radio-riceviloj, termosoj, emajlaĵoj, aluminiuj kuirpotoj kaj aliaj varoj por ĉiutaga uzo pliiĝis je 15% ol tiu en 1966. Por kontentigi la bezonon de la granda proletara kultura revolucio, la provizado de papero, ĉina inko, stencilo k.a. en 1967 kreskis kelkoble ol tiu en 1966.

La bonega situacio de la vigla kaj prospera merkato estas neapartigebla kun la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado en la lando. En la granda proletara kultura revolucio, la vastaj amasoj de la laboristoj kreive studas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ, firme tenas la revolucion kaj stimulas la produktadon, kontraŭbatalas egoismon kaj kritikas reviziismon por realigi sian ideologian revoluciigon, kaj batalakiris novan disvolviĝon de industria produk-

tado, precipe tiun de la malpeza kaj ŝpinteksa industrioj, tiel ke ili metis potencon materian bazon al la prospero de la socialisma merkato. Laŭ la nekompleta statistiko, malsamgrade pliiĝis en 1967 la produktkvanto de ĉiutagaj uzaĵoj kiaj salo, horloĝoj, dentopasto, sinteza sapopulvoro, ovaĵo, vino, vestoj, ŝuoj, kapvestoj, metalaj kaj ledaj artikloj. La laboristoj kaj oficistoj de la trikota industrio sola jam sukcesis fari pli ol cent kompare gravajn teknikajn renovigojn kaj per tio ili

# Prospera, Prezoj Stabilaj

multe akcelis disvolviĝon de la produktado.

Varme respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton", la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de nia lando batalakiris ĉiuf flankan riĉrikolton en la agrikultura produkto de 1967. En 1967 la fundamenta konstruado de agrikultura akvo-utiligo havis tre grandan disvolviĝon. Tiu jaro estis la jaro, en kiu 17 provincoj kaj regionoj kiaj Hebej, Hejlonggiang, Ŝandong, Henan plej multe kaj plej bone konstruis novajn mekanikajn konstruaĵojn por drenado kaj irigaciado inkluzive putojn kaj por tio pligrandigis la irigaciatan areon de post 1961.

La granda disvolviĝo de la agrikultura fundamenta konstruado donis favoran kondiĉon al la granda riĉrikolto en agrikultura produkto. La ĝojo pro abunda rikolto nun regas la kamparon en nia lando. La malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj aktive vendas al la ŝtato siajn rikoltitajn grenon, kotonon, oleon krudmaterialon kaj aliajn agrikulturajn kaj kromajn produktaĵojn. Dank' al la granda disvolviĝo de la agrikultura produktado, multe kreskas la aĉetpovo de la popolo en urboj kaj kamparo, precipe de la kamparanoj, kio manifestiĝis sur la merkato ke la totala vendkvanto de la varoj en 1967 havis pli grandan kreskon kompare kun tiu en 1966, kaj ke precipe la vendkvanto de iuj gravaj industriaĵoj por ĉiutaga uzo okulfrape kreskis.


La konstanta stabilo de la merkataj prezoj ludis aktivan rolon en akcelado de la industria kaj agrikultura produktado kaj en garantio de la popola vivrimedo. En 1966 kaj 1967, la ŝtato faris reguligon pri la prezoj de parto da varoj, malaltigis en malsamaj gradoj la prezojn de iuj industriaj produktaĵoj por ĉiutaga uzo kaj produktaĵoj rimedoj de la agrikulturo. En la prezreguligo oni malaltigis, ĉefe en malproksimaj regionoj kaj montregionoj, prezojn de parto da industriaĵoj kaj tiel pli racie aranĝis la varprezojn inter la regionoj de la tuta lando.

Post pluapaŝa detruo de malnovaj ideologio, kulturo, moro kaj kutimo kaj starigo de la kvar novaj en 1967 aperis tute nova aspekto en urboj kaj kamparo, kio klare montris socialisman karakterizon de la varoj de nia lando. Estas forigitaj la komercmarkaj desegnoj postlasitaj de la malnova socio kun feŭdisma aŭ kapitalisma gusto kaj iuj varoj por servi al burĝara vivmaniero; la montroŝrankoj plenas de freŝa kaj revolucia spiro kaj fariĝis pozicioj por propagandi la penson de Maŭ Zedong. En la arda movado de granda revolucia kritiko disvolvita en 1967, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj sur la komerca fronto faris grandskalan revolucion kritikon kontraŭ kontraŭrevoluciaj reviziismaj

*Enkorbigo de fiŝoj fare de la membroj de la Hongvejhu-brigado de Hongŝan-komunumo en Vuhan-urbego por sendi ilin al vendejoj*



absurdaĵoj por restaŭri kapitalismon, dissemataj de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun la ĉina Ĥruŝĉov ĉe la kapo, kiaj “materia incito”, “profito kiel komando” kaj malfermo de “libera merkato”. Tiu kritikado plenigis la komercan fronton per varma atmosfero de proletara socialisma revolucio kaj pluapase mobilizis ilian aktivecon, ke ili starigis la penson tutkore servi al la popolo, metis sian servan graviton sur kamparon kaj fabrikojn kaj plibone fari komercan laboron. Ĉio ĉi tio estis granda kontribuo por garanti la venkan disvolviĝon de la granda proletara kultura revolucio.



*Riĉega rikolto troviĝas en bestkulturado de Hilingolligo, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Jen kiom grasaj kaj fortaj bestoj!*

*La malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Tang-gubernio, Henan-provinco, vendas fervore al la ŝtato la novan kotonon.*






# Saviĝo de la Ŝipo "Calliman"

KINGHUA

**E**N la frua mateno de 13-a de decembro, 1967, subite brulegis la greka kargŝipo "Calliman" en la kaldrona ĉambro, kiu ankris en la haveno de Kingdaŭ. La fajro rapide disvastiĝis laŭ la hejtolejo eliginta el la oleotubo. Se la fajrego ne estos rapide estingita, ĝi bruligos la ĉirkaŭajn cisternojn kaj kaŭzos eksplodon de la tuta ŝipo. Tio endanĝerigos ankaŭ la aliajn ŝipojn en la haveno. La ŝipestro signalis al la Kingdaŭ-a Havena Administracio por urĝa helpo. La deĵorantoj de la Administracio tuj komunikis tion per telefono al

la komandejo de la loka mararmeo. La fajrolumo estas ordono. En la sama momento, la komandantoj kaj batalantoj vekitaj el profunda dormo sur la militaj ŝipoj kaj boatoj en la haveno kun plej granda rapideco ellitiĝis, kolektiĝis kaj formis fajroestingan trupon el pli ol 300 personoj, kaj sturmis al la greka ŝipo kunportante fajroestingilojn.

Tiutempe la elektra kondukilo por lumigado sur la ŝipo estis jam rompita de la fajrego. En la maŝinejo ruliĝadis densa fumo, kaj ĉie lekis la flamoj. La ŝipanoj



**“EKSPOZICIO MEMORE  
AL NORMAN BETHUNE”  
EN PEKINO**

Okaze de la 28-a datreveno de la publikigo de la brila verko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune*, oficiale malfermiĝis “Ekspozicio Memore al Norman Bethune” en la Kultura Palaco de Nacimalplimulto en Pekino.

La ekspozicio konsistas el tri partoj, nome: la plena teksto de *Memore al Norman Bethune*, Norman Bethune — granda batalanto de internaciismo, kaj vivu la senlime brila penso de Maŭ Zedong. La ekspoziciaĵoj enhavas 165 bildojn kaj 24 objektojn. Inter ili estas olepentraĵo pri la intima akcepto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al kamarado Bethune, valoraj fotoj pri la vivo, studo kaj laboro de kamarado Bethune antaŭ kaj post lia alveno al Ĉinio, precipe en la periodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito, anglalingva skribmaŝino kaj medicinaj instrumentoj uzitaj de li en Ĉinio, liaj verkoj, leteroj, telegramoj, ekstraktoj el liaj taglibroj, skribitaj dum lia laboro en Ĉinio.

**GRAMOFONDISKOJ POR  
PROPAGANDI LA PENSON  
DE MAŬ ZEDONG EN  
GRANDKVANTAJ PRODUKTADO  
KAJ DISTRIBUADO**

Kun senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Gramofondiska Fabriko de Ĉinio elfaris kaj distribuis al la tuta lando kaj la tuta mondo milionojn da gramofondiskoj de deklamoj de verkoj de Prezidanto Maŭ, de kantoj kun teksto el vortoj kaj poemoj de Prezidanto Maŭ. Interalie, serio de diskoj de kantoj kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ kia *La kerna forto, kiu gvidas nian aferon, estas la Komunista Partio de Ĉinio* sola distribuiĝis je ducent mil ekz. Krome, la fabriko produktis grandan nombron da gramofondiskoj de revoluciaj modelaj operoj kaj revoluciaj kantoj.

de “Calliman” metis sian tutan esperon sur la batalantojn de la ĉina popola mararmeo, kiuj venis por ilin helpi. La subplotonestro kaj komunisto Li Baŭŝan la unua sursaltis la grekan ŝipon kaj tuj sturmis malsupren en la maŝinejon. Vicoj da batalantoj sekvis lin, laŭte kriante: “Faru firman decidon, timu neniun oferon, superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.” La flamoj, la sufokanta densa fumo kaj la tre mallarĝaj kaj zigzagaj feraj ŝtuparoj kaj pasejoj sur la ŝipo kaŭzis al la fajroestingantoj grandajn malfacilojn. Tamen, la batalantoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong ne timas eĉ suriri glavmonton kaj sturmi en fajromaron. Ili sin ĵetis tien, kie la fajro estis plej furioza, kaj kie estis la plej granda danĝero. Trovinte la fajrofonton, Li Baŭŝan rapide suprengrimis la ŝtuparon kaj raportis pri la stato de la fajro. Tiutempe iu ŝipano informis la interpretiston, ke “jam abrupte leviĝis la olea temperaturo en la cisterno en la maŝinejo, eble okazos eksplodo antaŭ ol paso de duon-horo, kaj tio estas granda minaco al la homoj sur la ŝipo.” Por ĝustatempe sekurigi la ŝipon, Li Baŭŝan denove sturmis malsupren en la maŝinejon, kun dekelkaj batalantoj sen reakiro de spiro. Post kiam la flamoj estis estingitaj, la politika direktanto Hu Ĉunlin kondukis ĉiujn detale inspekti la varmegajn oletubojn. Kiam ili rimarkis ke asbesta tegaĵo de la kaldronego ankoraŭ bruletas pro surhavita hejtolo, la veterana batalanto Ĝaŭ Fengji riskante sian vivon iris en la pasejon inter la kaldronego kaj vando por forigi la asbestan tegaĵon. Ankaŭ vickapitano Ĝang Ĉaŭjong rampis sur la tre varma planko sub la alttemperaturan kaldronegon por debati la tegaĵon.

Post la heroa luktado de pli ol tri horoj, la fajrego estis fine komplete estingita. La ŝipanoj de la “Calliman” kiuj propraokule vidis la bravecon de la ĉinaj maristoj en estingado de la fajro, estis profunde kortuŝitaj. Ili senĉese kriis en la ĉina lingvo: “Bona estas Maŭ Zedong! Bona estas Ĉinio!” Iu ŝipano demandis la interpretiston: “Kion la mararmeanoj laŭte deklamis dum malsupreniro en la fajrejon?” La lasta respondis, ke tio estis eldiro de Prezidanto Maŭ. Tiu ŝipano kortuŝite diris: “Nun mi jam scias, kian grandan potencon havas la penso de Maŭ Zedong. Via armeo estas nevenkebla. Nenie en la mondo estas trovebla armeo tiel kuraĝa kaj sentima al morto kia la via.” Kelkaj aliaj ŝipanoj diris kun profunda emocio, ke antaŭe la varŝipo, sur kiu ili laboris, ankris en haveno de iu lando, okazis al ĝi ankaŭ akcidento. Tiutempe ili pafis kelkajn kestojn da signal-kugloj por peti helpon, sed neniun venis, ĝis la tuta varŝipo dronis en la akvo. Ĉifoje la ĉina popola mararmeo ĝustatempe venis helpi, tio montras ke la ĉinaj armeanoj estas vere bravaj idoj de la popolo. En tio ankaŭ elmontriĝas la potenco de la penso de Maŭ Zedong. Ili esprimis, ke kien ajn ili veturos, ĉie ili rakontos pri la proletara naturo de la ĉina popola armeo kaj animskua agado de la heroaj batalantoj, viditaj per la propraj okuloj, kaj disvastigos la penson de Maŭ Zedong.

# La Granda Kultura Revolucio Stimulas Nin Triumfe Antaŭenmarŝi

**L**A granda proletara kultura revolucio de Ĉinio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, estas senprecedence granda revolucia movado. Nun ĝi disvolviĝas kun potenca forto de lavango tra la tuta lando. En la akra batalo inter la du linioj kaj la du vojoj, sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la ĉinaj revoluciaj virinoj forte atakas, kun sentimeca revolucia spirito, la plenanon da ĉinaj plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

En la batalo la ĉinaj revoluciaj virinoj kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ por batali kontraŭ ĉiuj egoismaj pensoj kaj akcelas sian ideologian revoluciigon. Ili faris senmortan gloran meriton kaj starigis brilan modelon en la senprecedenca proletara kultura revolucio por la revoluciaj virinoj de la mondo. Ni japanaj revoluciaj virinoj devas lerni de vi, lerni vian spiriton, ke vi reformas vian mondkoncepton kaj ribelas kontraŭ ĉiuj demonoj kaj diabloj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj kreive studante kaj kreive aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ.

Ni, japanaj revoluciaj virinoj, vivantaj en Pekino, partoprenas en la granda proletara kultura revolucio kune kun ĉinaj kamaradoj kaj akiris profundan instruon. Stimulate de la revolucia ribela spirito, ni kondukas streĉan batalon kontraŭ la reviziisma Mijamoto-kliko. Same kiel la ĉina plej granda enpartia potenctenanto, kiu iras la kapitalisman vojon, la reviziisma kliko de la Komunista Partio de Japanio faris seriozan krimon en la virina movado.

En la virina movado la reviziisma kliko de la Komunista Partio de Japanio plenenergie laŭdas la feliĉon de familio kaj laŭmodajn fasonojn, propagandas kruelecon de milito kaj kreas psikon de timo al milito. En la ĉiutaga virina aktivado, ĝi efektivigas ekonomiismon de bagatelaj favoroj

kun la celo malhelpi la vastajn virinajn amasojn vekigi al la revolucia vojo.

Ni japanaj revoluciaj virinoj en Pekino longe vivis sub la influo de la reviziisma Mijamoto-kliko. La reviziisma kliko de la Komunista Partio de Japanio ne lasis nin lerni la penson de Maŭ Zedong, malpermesis nin profunde kontakti kun ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj, intencante kulturi nin, japanajn revoluciajn virinojn en Pekino, en novan privilegian tavolon, por ke ni akceptu obeeme ĝian parlamentan vojon kaj fidele batalu por akiri multajn voĉojn por ĝi.

Tamen, persone partoprenante en la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio ni vidis, ke la fera balailo de la revolucio forlavas la malpuraĵojn kiel uragano kaj forte atakas la fortikaĵon de reviziismo. La ribela spirito de ĉinaj revoluciaj amasoj donis al ni grandan kuraĝon kaj subtenon, ke ni decidis ekpafi kontraŭ la reviziisma Mijamoto-kliko. Ribela fajro jam brulas ĉie en nia patrolando. La Asocioj de Novaj Japanaj Virinoj en dek ok gubernioj jam ribelis kontraŭ la reviziisma kliko de la Kompartio de Japanio, kaj kvar el la membroj de la Centra Komitato de la Novaj Japanaj Virinoj leviĝis kontraŭ ĝi.

Ni profunde komprenas, kiu forto en la animskua batalo kontraŭ reviziismo stimulis nin ribeli kontraŭ la reviziisma Mijamoto-kliko. Ĝi estas la senlime brila penso de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la revoluciaj popoloj de la mondo, montras, ke sola fajrero povas bruligi tutan stepon. Spite al tio, ke la virina movado de Japanio vizaĝas al diversaj malfaciloj kaj repuŝoj, tamen ni profunde kredas, ke en la nemalproksima estonteco la ribela fajrego kontraŭ la usona imperiismo, la japana reakciularo kaj la reviziisma kliko de la Kompartio de Japanio flamos tra la tuta insularo de Japanio.

# Ĉinio Antaŭenmarŝas

*Charles Bettelheim, plenuma prezidanto de la Landa Komitato de Franc-Ĉina Amikeca Asocio, faris viziton al Ĉinio en 1967. Jen estas resumo de lia brodkasta parolado en Ŝanhajo ĉe la fino de la vizito.*

— La Redakcio

Nun, kiam tuj finiĝos mia unumonata vizito en Ĉinio, mi parolos mallonge pri miaj impresoj dum la vojaĝo.

Tiu ĉi vojaĝo ebligis al mi viziti tiujn malsamajn lokojn kiaj Pekino, Ŝenhi, Ŝanhi, Kantono, Ŝanhajo, k. c. Mi sentis, ke la politika vivo de la amasoj en tiuj lokoj estas vere tre vigla. Tia plenvigla politika situacio estas videbla ĉie, kaj ĝi manifestiĝas precipe per dazibaŭoj, amasaj mitingoj kaj malgrandaj kunvenoj. La granda proletara kultura revolucio estas objektiva realo, kaj tiu realo klare prezentiĝas antaŭ ĉiu vizitanto al Ĉinio de la komenco ĝis la fino. La granda revolucio mobilizis centojn da milionoj da popolanoj, kaj ili ankaŭ profunde sentas, ke tiu granda revolucio firme interligiĝas kun ilia propra sorto. Tion pruvis miaj intervidiĝoj kaj interparoloj kun laboristoj, kamparanoj kaj studentoj. La popolamasoj vere rigardas la ŝtatan aferon kiel sian propran.

Se la streĉa politika vivo konsistigas elstaran parton de la nuna situacio de Ĉinio, do la disvolviĝo de la produkto kaj la sufiĉa provizo en merkatoj kaj vendejoj konsistigas alian parton, kiu donis profundan impreson.

Mi vizitis Ĉinion en 1958. En 1964 mi faris la duan viziton kaj vidis la grandan disvolviĝon de Ĉinio en ekonomio. La ĉifoj vizito donis al mi la saman impreson. En 1967 estis granda riĉrikolto en la agrikulturo de Ĉinio. Dum la kunsidoj en fabrikoj mi informiĝis, ke la industria produktado de Ĉinio regule disvolviĝis de 1964 ĝis nun. Tia stato estas tute kontraŭa al tio, kion priparolas la malamiko de Ĉinio. La granda kultura revolucio en Ĉinio ne malhelpis la disvolviĝon de la produktado, sed male, ĝi liberigis la

kreemon de la amasoj, antaŭenigis teknikan renovigon kaj forigis la diversajn obstaklojn, kiujn iuj malnovaj gvidantoj metis por kontraŭstari la proponojn de la laboristoj kaj teknikistoj. Tial, la granda kultura revolucio akcelis la disvolviĝon de la produktado.

En la tereno de konsumajtoj la produktaĵoj estas abundaj, la prezoj malkaraj, kaj la specoj multaj, kaj ĉio ĉi tio impresis min profunde. La specoj de tiuj produktaĵoj en 1964 jam estis tre multaj, kaj nun ili eĉ des pli multiĝas. La diversaj novaj kaj altkvalitaj produktaĵoj, kiaj transistoraj radioriceviloj, diversspecaj teksaĵoj, precipe la teksaĵoj el artefaritaj fibroj, jam aperis sur la merkato. Ĉinio jam komencis apliki novan teknikon por produkti altenergiajn novtipajn elektraĵojn lumfontojn, kaj de nun ĝi povas eksporti elektro-lumfontajn instalaĵojn. Sed antaŭ la Liberiĝo Ĉinio devis importi el eksterlando eĉ la ordinarajn ampolojn.

Lasttempe, ankaŭ la specoj de teknikaj instalaĵoj por produktado fabrikitaj de Ĉinio treege plimultiĝas. Iuj teknikaj instalaĵoj ne nur atingis la mondan progresintan nivelon sed ankaŭ parte superis tiun nivelon. Interalie, tion montris la fabrikado de sinteza benzeno kaj artefarita albumino. Ĉinio estas la unua lando en la mondo, kiu kapablas fabrikati tiujn du produktaĵojn.

En Ŝanhajo mi vizitis la Unuan Fer-ŝtalan Fabrikon de Ŝanhajo. Tiu ĉi fabriko faris kontribuon en la kuratingo kaj superado de la monda progresinta nivelo. Dum la granda kultura revolucio, en 1966, la laboruloj de tiu ĉi fabriko plenumis novan teknikon pri la fando de ŝtalo per pura oksigeno. Kelkaj novaj konvertil-fornoj, kiuj funkcias per tiu tekniko, estis konstruitaj nur en la daŭro de tri monatoj, de la 1-a de junio

ĝis la 6-a de septembro, samjare. Tiuj konvertil-fornoj estas aŭtomataj, kaj la oksigeno estas enblovata de ilia supro. La tuta procedo de funkciado estas reguligata de la centra kontrolejo per ŝaltiloj.

La laboruloj, kiuj akiris tiun atingon, diris, ke ili rikoltis tian sukceson pro tio, ke ili ĉerpis grandegan spiritan forton el la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj estis kuraĝigitaj de tiu spirita forto.

En Hi-an, Ŝenhi-provinco, mi vizitis la entreprenojn, kiuj produktas grandtipajn elektrajn instalaĵojn, transformatorojn kaj izolilojn. Dum la granda proletara kultura revolucio ili ankaŭ efektivigis gravajn teknikajn reformojn, kaj precipe menciinda estas tio, ke ili produktis alttensian kondensatoron kun 1,000,000 voltoj.

Ĝenerale, en la plejparto de la fabrikoj, kiujn mi vizitis — ĉu en la Kemisterka Fabriko de Taj-juan, ĉu en la Dua Ilmaŝina Fabriko de Pekino, ĉu en la Ŝarĝvagona Fabriko de Ŝanhajo — mi vidis multajn teknike renovigitajn instalaĵojn. Tiuj instalaĵoj multe plialtigis la laborproduktivecon, malpliigis la laborintensecon aŭ plibonigis la kvaliton de la produktaĵoj. Ĉio ĉi tio refoje refutas la kalumnion, ke la granda kultura revolucio de Ĉinio "malhelpas la teknikan progreson".

Ĝuste kiel tiuj laboruloj diris al mi, ili stimulas kaj disvolvas la produktadon kun nova laborsinteno, kaj tiu laborsinteno naskiĝis kaj senĉese plifirmiĝas sub la inspirado de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Mi opinias, ke tio estas tute vera.

La produkta brigado Daĝaj, kiun mi vizitis en la 18-a de julio, estas la plej progresema ekzemplo pri tiu nova laborsinteno. Tiu brigado estas parto de Daĝaj-popolkomunumo kaj situas en montregiono de Ŝanhi-provinco. La laboruloj de tiu brigado efektivigis veran transformadon de la naturo. La treege krutaj montdeklivoj jam fariĝis sinsekvoj da larĝaj ŝtuparkampoj, la valoj estis prilaboritaj kaj ebenigitaj, kaj la terkulturado kaj irigaciado estis ĉiam pli kaj pli rebonigitaj. Ĉion ĉi tion efektivigis tiu brigado apogante sin sur sia propra forto. Eĉ en 1963, kiam ilin trafis severa natura katastrofo, ili ne akceptis ian ajn helpon de la ŝtato. Nun la kamparanoj ĉi tie jam loĝas en ŝtonmasonitaj domoj multe pli komfortaj kaj solidaj ol antaŭe. En 1967, Daĝaj akiris senprecedence grandan riĉrikolton de la someraj plantaĵoj, kaj la totala produktkvanto de tritiko kaj pizoj pli ol kvaroble superis la plej altan jaran produktkvanton de la someraj grenoj en

ilia historio. La brutbredado ĉi tie ankaŭ rimar-kinde disvolviĝis.

La sukceso de Daĝaj, laŭ la ĝusta dirmaniero de la ĉinoj, estas produkto de la revoluciigo de la homa ideologio. La revoluciigo de la homa ideologio estas rezulto de la vastaj propagando kaj studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

Mi opinias, ke tiu ĉi granda proletara kultura revolucio de Ĉinio estas batalo por ĝisfunde kontraŭstari la ideologion postlasitan de la pasinteco. Tiu ĉi revolucio celas solidigi socialismon per la venko de la proletara ideologio. Sekve tio ne povas esti pure ideologia batalo. Tiu ĉi batalo devas esti, kaj esence estas, politika batalo.

Supre estas parto de la impresoj, kiujn mi akiris dum mia restado en Ĉinio. Se oni volas, ke mi faru indukton, eble mi povas diri, ke de unu jaro Ĉinio spertas fortegan revolucionan ŝtormon, sed dum tiu ĉi revolucia ŝtormo Ĉinio daŭre laboras, daŭre antaŭenpuŝas la industrian kaj agrikulturan produktadon kaj senĉese inventas kaj kreas. Ĉinio senĉese antaŭenmarŝas en multaj flankoj. La popolo de Ĉinio antaŭenmarŝas laŭ la vojo de si mem elektita, t. e., la socialisma vojo. Ĉio ĉi tio estas grandioza afero.



## Letero al Malproksimaj Amikoj

Al J. L.

Pekino, 28 jan. 1968

Kara amiko:

Mi ne povas deteni min de emocio, kiam mi skribas al vi ĉi tiun leteron. Ekde la granda proletara kultura revolucio, preskaŭ ĉiutage mia koro estas tuŝita de emociaj okazaĵoj. Ofte min impulsas la deziro komuniki ilin al vi por ke vi dividu kun mi la senton. Iafoje mi ekpensis, kiel bonege estus, se vi povus veni al nia lando kaj vivi inter ni kelkajn monatojn, por propraokule vidi la altan politikan konscion kaj la vigan revolucionan spiriton de aspirado al prosperiĝo, kiujn nia popolo montras en la granda kultura revolucio.

En tiu ĉi letero mi rakontos al vi tre kortuŝan okazaĵon, el kiu vi vidos, kiom gigantajn materialajn kaj spiritalajn fortojn povas produkti la vastaj amasoj, kiam ili ekposedas la penson de Maŭ Zedong.

La akcidento okazis en 1966 aliu batalanto de PLA nomata Vang Haŭ. Sed permesu al mi citi rekte lian propran rakontadon sube:

Frumatene en la 28-a de novembro, la temperaturo falis ĝis pli ol dek gradoj sub nulo C. Kiam mi kaj miaj batalamikoj energie laboris en la konstruejo, subite rompiĝis kun bruego la ligna apogilo, kaj pli ol dek kubometro da tero kaj ŝtonoj falis sur min, tiel ke mi estis subterigita sub tavolo da tero kaj ŝtonoj dika je du metroj. Mi sentis, ke la premo pli kaj pli peziĝas, kaj eĉ estas malfacile por mi spiri. Ĝuste tiam tre maltrankvile vokadis min miaj kamaradoj. Aŭdinte tion, mi respondis al ili per ĉiuj miaj fortoj: "Mi estas ĉi tie!" Aŭdinte mian

voĉon, ili tuj laŭte kriis: "Ne timu, Vang Haŭ! Eĉ se la ĉielo falus aŭ la tero fendigus, ni savos vin laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ!" Ilia firma voĉo plena de klasa amo varmigis mian koron. Mi ekpemis miajn dentojn kaj decideme respondis: "Kun Prezidanto Maŭ kaj vi kamaradoj mi nenion timas!" Kiam mi pensadis pri la plej plej ruĝa suno en nia koro Prezidanto Maŭ, aperis antaŭ miaj okuloj lia granda figuro. Spite al la malfacilo de parolo, mi nereteneble kriis kun emocio: "Vivu! Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" Pro tio ankaŭ miaj kamaradoj, kiuj laboregis por savi min, kriis supre. En la fosaĵo, tuj pleniĝis la krioj: "Vivu! Vivu! Longe vivu Prezidanto Maŭ!" Aŭdante tiujn emociajn kriojn, mi sentis varman fluron trakuri mian tutan korpon. Ĉiuj sentis, ke Prezidanto Maŭ estas ĉe ni kaj direktas nian batalon.

Por savi min, la subplotonestro tiel forte skrapis la teron, ke liaj manoj multe sangis. Sed li persistis en la batalo. Plurfoje la kamaradoj provis eltiri lin, sed vane. Li diris: "Ne zorgu min! Savu unue Vang Haŭ!" Li persistis ĝis kiam li svenis.

La disfalo de la tero kaj ŝtonoj ankoraŭ daŭris kun bruoj, kiuj vekis min el sveno. Mi aŭdis ke miaj kamaradoj krias la instruon de Prezidanto Maŭ "**zorgi aliajn pli multe ol sin mem.**" Mi ekpensis, ke prefere mi sola oferu la vivon, se vivofero estas ne evitebla. Pro la intereso de la revolucio, oni ne devas oferi pli multe da vivoj. Pensante pri tio, mi decideme diris: "Foriru vi ĉiuj rapide kaj ne plu zorgu pri mi!" Sed ili ne volis aŭskulti miajn vortojn kaj laŭte kriis la vortojn de Prezidanto Maŭ: "**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**", luktante ankoraŭ pli intense kontraŭ la tero kaj ŝtonoj.

Amasoj da tero kaj ŝtonoj estis forskrapitaj kaj forportitaj, sed novaj

falaĵoj repleniĝis la lokon. En tiu tempo, la vicplotonestro Ding Jaŭ-feng vidis grandan falruliĝontan ŝtonon, kiu serioze minacis la vivojn de mi kaj la aliaj kamaradoj. Li saltis supren kaj apogis la ŝtonegon per sia dorso spite al la danĝero minacanta lin mem de la jen-jen okazantaj faloj de tero kaj ŝtonoj. Kun kunpremitaj dentoj kaj kun levita kapo li staris tie firme.

Post intensa luktado, mia kapo estis finfine malkovrita de la kamaradoj. Mi ne povis eldiri eĉ solan vorton pro emociiĝo, kiam mi vidis miajn batalamikojn, kiuj savis min. La heroaj agoj de miaj kamaradoj donis al mi pli grandan kuraĝon kaj forton. Por ne maltrankviligi miajn kamaradojn, mi eltenis la doloron, superregis mian emociiĝon kaj ne ellasis eĉ unu ĝemon.

La falado de la tero kaj ŝtonoj ankoraŭ daŭris de tempo al tempo. Mia kapo estis ĉiam en danĝero de frakasiĝo. Vidinte tion, kamarado Vang Guĵun rapide kovris mian kapon per sia korpo. Multfoje mi provis foradmoni lin, sed tute vane.

Poste, mi sentis paraliziĝon tra la tuta korpo kaj spiris pli malfacile. Ne volante maltrankviligi miajn kamaradojn, mi ankoraŭ tenis min trankvila. Por kuraĝigi min, miaj kamaradoj ankaŭ daŭre recitis vortojn de Prezidanto Maŭ al mi. Mi foje kaj refoje svenis pro la tro peza premo de la ŝtonoj. Sed, kiam mi rekonsciiĝis, tiu, pri kiu mi unue pensis, estis nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj la unua frazo, kiun unue mi diris, estis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" Post vivmorta luktado, la kamaradoj min plene elterigis finfine. En miaj kamaradoj mi refoje vidis la gigantan forton de la penso de Maŭ Zedong. En la kriza momento, vortoj de Prezidanto Maŭ donis al mi fidon kaj kuraĝon por superi ĉiujn malfacilojn, kaj la penso de Maŭ Zedong donis al mi neelĉerpeblan spiritalan forton. Mi profunde sentas, ke Prezidanto Maŭ

estas la plej plej ruĝa suno en nia koro, la penso de Maŭ Zedong estas la animo de ni batalantoj kaj ĉiamvenka spirita atombombo.

Kara amiko, el la supra rakonto de la batalanto kaj el la progresemaĵoj de vicoj da herooj, raportitaj en EPĈ, vi povas vidi, ke la penso de Maŭ Zedong jam estas edukanta generacion da novaj homoj de komunismo. Tiuj homoj **“komplete sin donas al aliaj sen ajna**

**konsidero pri si mem”**; ili tutkore kaj plenanime servas al la revolucio kaj **“ekskluzive”** kaj **“senrezerve”** servas al la popolo. Ili ne timas morton, se la revolucio bezonas la oferon de ilia vivo. Ili kuraĝas enstrudiĝi en maron de fajro aŭ suriri monton de glavoj. Ili ne ŝanceliĝas eĉ antaŭ falo de la ĉielo kaj fendigo de la tero. Posedante la penson de Maŭ Zedong, la popolo povas krei ĉian miraklon en la mondo. Ekde la granda proletara

kultura revolucio, en nia lando senfine aperas heroaj personoj unuj post la aliaj, kaj prosperas kun ĉiu tago kaj industria kaj agrikultura produktado, rezulte de senprecedenca disvastiĝo de la penso de Maŭ Zedong.

Kara amiko, mi devas fini la leteron nun. Bonvolu skribi al mi ofte. Bonan sanon!

Kamarade via,  
*Jong Hiangkian*



## Post la Kurso

### Rakonto pri Ĉaro da Kotonono

Tio okazis inter du produktaj brigadoj de iu popola komunumo en nia lando, unu nomata Feliĉo kaj la alia Ruĝa Brilo. La du brigadoj estas disigitaj nur de iu rivero. Pas-int-jare, ambaŭ akiris riĉegan rikolton de kotonono\*, kian li neniam havis antaŭe. Ricevinte la riĉan rikolton, la brigadanoj ne forgesis sian devon al la ŝtato kaj liveris multajn ĉarojn da kotonono al la ŝtata aĉet-ejo.

Iun post-tag-mezon, kiam la membroj de la Tria Grupo de la brigado Feliĉo revenis de la aĉetejo, la en-ej-isto trovis, ke la kvanto de

kotonono sur la ricev-atesto estas je ĉirkaŭ 600 kilogramoj\* pli granda ol tiu, kiun la grupo fakte liveris. La brigadanoj rigardis unu alian kun miro en la okuloj, sed ne povis klar-igi, kiel tio okazis. Fine, ili decidis ke iu iru al la aĉetejo en la sekvonta tago por fari kontrolon.

Kiam tiun novaĵon aŭdis la brigadanoj, iuj diris: “Nu ni retenu la ‘ekstran\* pagon’ por aĉeti terkultur-ilojn kaj sterkon\*.” Sed la pli-multo diris: “Nia amata Prezidanto Maŭ alvokas, ke ni batalu kontraŭ egoismo kaj kritiku reviziismon, do ni devas redoni la super-pagon, eĉ se ĝi estus pli granda ol tiu por ĉaro da kotonono.”

Kiam la grupestro Tang Kajhin revenis de kunveno okazinta en la komunuma oficejo kaj aŭdis pri la okazaĵo, li pensis en si, ke oni nepre devas redoni la superpagon por ĉaro da kotonono, ĉar ne redoni signifas mal-obei la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Cetere, mi estas filo de malriĉkamparano, kaj la membroj elektis min kiel estron, ja por ke mi gvidu ilin iradi la luman vojon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ! En la sekvanta tago, kiam li el-radikigis koton-arbojn, maljuna malriĉ-

kamparano Jaŭ Cajgaŭ lin vidis kaj tuj diris sen ĉirkaŭ-parolo: “Kajhin, vi devas el-diri vian opinion pri la afero de kotonono!” “Kion ni devas fari laŭ via opinio?” demandis Kajhin. Jaŭ Cajgaŭ, kiu ĉiam bone observas la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj plej multe zorgas pri aferoj de la kolektivo\*, diris firme: “La plej grava el ĉiuj aferoj estas obei la instrukciojn de Prezidanto Maŭ.” “Prave!” ĝoje respondis Kajhin.

La grupa komitato diskutis pri la afero kaj poste tuj okazigis grupan kunvenon. Antaŭ ĉio, la kunvenantoj legis la “tri popularajn artikolojn” kaj la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ en la granda proletara kultura revolucio kaj poste komencis diskuti la demandon de ĉaro da kotonono. Multaj diris: “Prezidanto Maŭ instruas al ni imiti kamaradon Bethune **‘komplete sin-doni al aliaj sen ajna konsidero pri si mem’** kaj alvokas nin **‘batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon’**; ni nepre ne ĉasu profiton je malprofito de alia.” Ju pli ili studis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj diskutis pri la demando, des pli fariĝis klaraj iliaj pensoj kaj okuloj. Fine ili decidis je ĉies konsento redoni la pagon.

Dume, la grupano, kiu iris al la aĉetejo por pridemandi la aferon, informiĝis, ke hieraŭ la pes-isto de la aĉetejo erare prenis ĉaron da kotono de la Kvara Grupo de la brigado Ruĝa Brilo por tiu de la Tria Grupo de la brigado Feliĉo, ĉar tiam estis multego da koton-ĉaroj kaj li devis labori sub pelado de urĝeco.

Kiam la Tria Grupo de Feliĉo transdonis la pagon por unu ĉaro da kotono al la Kvara Grupo de Ruĝa Brilo, la membroj de tiu ĉi lasta diris: “La Tria Grupo de Feliĉo alportis al ni ne nur la pagon por unu ĉaro da kotono, sed ankaŭ la penson de Maŭ Zedong.” Kaj ili decidis preni tion kiel sian imitindan ekzemplon kaj laŭdi la fratan grupon per dazibaŭo\*, kies teksto legiĝas interalie jene:

“Brilegan ekzemplon la gvid-antoj kaj membroj de via grupo starigis por ni, respondante al la plej nova

instrukcio de Prezidanto Maŭ en la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, kiam la cent-milione\* nombra popolo entuziasme levas altan tajdon\* de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko kontraŭ reviziismo, laŭ la granda alvoko de Prezidanto Maŭ. . . . Via bela ago estas frukto de via kre-iva studo kaj kre-iva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ; la penso de Maŭ Zedong donis al vi la forton. Ni nepre imitos vian ekzemplon. . . .”

Tute nova ŝanĝo okazas al la spirita fizionomio de nia popolo en la granda proletara kultura revolucio, sub la forta brilo de la penso de Maŭ Zedong.

## Nia Vortareto

**ĉaro** — rada trans-port-ilo.

**dazibaŭo** — skribaĵo sur granda pa-

pero por esti legata de la publiko. **ekstra** — plia krom la kutima.

**fizionomio** — karakter-montra aspekto de iu aŭ io.

**instrukcio** — ordonoj kaj klarigoj donitaj de super-ulo al sub-ulo.

**kilogramo** — pez-unuo egala al milono de tuno.

**kolektivo** — aro da homoj kune agantaj aŭ kun-igitaj per komunaj intereso.

**kotono** — la mola blankaĵo ĉirkaŭ semoj de koton-arbo, el kiu oni faras fadenojn k. a.

**menso** — la spirito kaj intelekto en kontrasto kun la korpo.

**miliono** — 1,000,000.

**pesi** — mezuri pezon.

**populara** — konata kaj ŝatata de popolamasoj.

**sterko** — aĵo por fari teron pli frukto-dona.

**tajdo** — leviĝo kaj malleviĝo de la mara akvo.

# *La Usonaj kaj Pupaj Armeoj en Serioza Perdo kaj Demoraliziĝo*

DAHU

**L**A fripona vetludanto Johnson kun sia “riĉa” monujo, ju pli multe perdas, des pli inklinas al vetludo, sed li ne atendas, ke pliaj vetludoj kaŭzas al li nur pliajn perdojn. Ĉiuj bone scias, ke la armitaj fortoj senditaj de la Johnson-registaro al la sudvjetnama batalejo jam atingis 470,000 homojn, sed la fiaska sorto ankoraŭ alkroĉiĝas al Johnson. Ju pli

eskaladas la milito, des pli rapide multiĝas iliaj mortigitoj kaj vunditoj. La bonŝance postvivantaj demoraliziĝis kaj tremas tutajn tagojn en maltrankvilego. Estas ne strange, ke konsilantoj de la Johnson-registaro nevole konfesis kun veo, ke la agresa milito kontraŭ Vjetnamio estas milito, “en kiu oni vidas nenian veran esperon”.



## PLI OL MILJON MILITISTOJ EKSTERMITAJ EN 7 JAROJ

Laŭ nekompleta statistiko, en la periodo de 1961 ĝis 1967, estis ekstermitaj kaj malorganizitaj de la heroaj sudvjetnamaj armeo kaj popolo preskaŭ 1.5 milion usonaj kaj pupaj armeanoj, inter kiuj estis pli ol 300,000 usonaj kaj kunkrimaj armeanoj. Rezulte de la seriozaj perdoj de homoj pro morto kaj vundo, multaj regulaj divizioj de la pupa armeo neniel povas esti rekonpletigitaj. Westmoreland, la ĉefo de la usona armeo agresanta Vjetnamion konfesis, ke plejparto de la nunaj 150 batalionoj de la pupa armeo jam perdis batakapblon. Sub la ordono de sia usona mastro la marioneta kliko decidis reorganizi sian armeon, malorganizis 4-5 disbatitajn diviziojn kaj metis iliajn anojn sub la disponadon de pupaj provincestroj.

## ĈIEL KLOPODI POR FORLASI LA BATALEJON

Pro timo de punado fare de la vjetnama popolo, la usonaj kaj pupaj soldatoj ĉiam sin trovas en maltrankvilo, abomenas la militon kaj timas la morton. Iuj eĉ ne povas bone dormi nokte timante ke ilin surprizatakos la armitaj fortoj de la sudvjetnama popolo. Multaj usonaj soldatoj tagnokte kalkulas la restantajn tagojn ĝis la dato por sia reveno al la patrolando, soifante kiel eble plej frue forlasi la batalejon. Por eviti batalon, iuj el ili ĉiarimede klopodas sin malsanigi antaŭ la batalo, iuj simple ŝajnigas sin malsanaj, aliaj eĉ sin vundas per ponardo aŭ alia armilo. En Binhduc sola de My-tho, en majo, 1967, estis pli ol cent usonaj militistoj, kiuj sin vundis por eviti batalon. Kaj krome, ĉiam pli multiĝas dizertintoj el la pupaj trupoj. En la unuaj 9 monatoj de 1967, dizertis preskaŭ 3,000 armeanoj el la pupaj trupoj en la provincoj Quang-tri kaj Thua-thien, kaj al iu bataliono de pupa armeo restis nur unu plotono kaj 7 usonaj "konsilantoj".

## RIBELI KONTRAŬ LA AGRESANTOJ

Inter la usonaj kaj pupaj soldatoj, ĉiam pli multaj personoj komprenis, ke la agresiva milito lanĉita de Usono kontraŭ Vjetnamio, same kiel la antaŭa agresiva milito kontraŭ Koreio, "estas abomenata de la popolo" kaj "krimago". Tial ilia kontraŭmilita humoro ĉiam pli akriĝas, kaj ofte okazas ke soldatoj rifuzas batalon. Laŭ nekompleta statistiko, de post 1965, sur la sudvjetnama batalejo pli ol 50 fojojn okazis, ke miloj da usonaj soldatoj rifuzis batalon. Kiam helikopteroj venis por transporti al "balaa" regiono soldatojn de la Unua Infanteria Divizio de Usono garnizonanta en iu bazo ĉe la provinco Thu-dau-mot, multaj soldatoj forĵetis siajn pafilojn kaj rifuzis enaviadiliĝi, kaj multaj aliaj protestis per fasto. En du usonaj bazoj ĉe la provincoj Thu-dau-mot kaj My-tho, en 1967 okazis sinsekve du grandskalaj bataloj inter la usonaj soldatoj rifuzantaj batalon kaj usonaj ĝendarmoj. Laŭ la informo el lasita de Vaŝingtono, en oktobro 1967, tuj antaŭ la ekveturo de la 198-a Malpeza Infanteria Brigado de Usono al la sudvjetnama batalejo, eksplodis ribelo, kiun partoprenis ĉ. 250 soldatoj kaj forte kontraŭbatalis la alvenantajn ĝendarmojn por subpremo. Ili vundis 25 ĝendarmojn kaj detruis multajn transportajn veturilojn. La pupaj soldatoj, kiuj ne volas vendi sian vivon por la uson-pupa reganta kliko, returnante sian pafilon pafmortigis uson-pupajn oficirojn kaj venis al la flanko de la popolo. Laŭ raporto de Gai Phong, Novajagentejo de Suda Vjetnamio, nokte de la 1-a de aŭgusto 1967, kiam la popola armita forto atakis iun malamikan bazon ĉe Quang-tri, multaj pupaj soldatoj pafmortigis siajn komandantajn oficirojn kaj transiris al la popolo. Ankoraŭ iuj pupaj soldatoj ribelis en tuta roto. Pro neeltenebla tiranado fare de la usonaj agresaj trupoj, la pupaj paraŝut-soldatoj en O-cap de la provinco Ba-ria balae pafis kontraŭ la usonaj rabistoj per siaj maŝinpafiloj. Iu pupa roto pafmortigis sian usonan "konsilanton" dum militiro kaj 45 el ĝiaj soldatoj forkuris.

*Jen la originala aspekto de papera tigro de la usona imperiismo ▶  
En kia mizera stato estas la usona agresarmeano post sinsekvaj malvenkoj!*



# “Helpo” aŭ Rabado?

GUĜI

ANTAŬ kelkaj jaroj, utiligante la urĝemon de la nove sendependiĝintaj landoj de Afriko al disvolvo de sia nacia ekonomio, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio donis “helpojn” al iu afrika lando en nombro da konstruaj projektoj en industrio kaj agrikulturo. Inter ili estis lakto-, viando- kaj fiŝo-prilaborejoj kaj tri grandaj terkulturejoj. Sed pli ol kvar jaroj jam pasis, la “helpoj” plenforte prifanfaronitaj de la sovetiaj reviziistoj ne nur portis al tiu lando nenian bonon, male, en formo de ŝuldo ili pezas kvazaŭ muelŝtono sur la dorso de ĝia popolo.

Laŭ la interkonsento, la sovetiaj reviziistoj pruntedonis al la lando monon por tiuj entreprenoj, tamen neniu sciis kiom da mono bezonas ĉiu aparta entrepreno. Rezulte la efektivaj konstruaj kostoj multe ŝvelis. Laŭ la sovetia reviziismo, “lano kreskas sur la korpo de ŝafo mem”, kaj la ŝuldon ĉiuokaze pagos la “helpata” lando, kiom ajn kostas la konstruaj projektoj.


Por akiri la monon elspezotan en la “helpata” lando por la konstruado, la sovetia reviziismo liveris al tiu lando varojn, inter kiuj la kvanto de iuj superis je pli ol 100% la bezonon de la merkato, kaj ankoraŭ iuj el ili estis varoj, por kiuj la sovetia reviziismo ne trovis merkaton. Rezulte de tio, la liveritaj varoj ne povis vendiĝi, kaj la finkonstruo plurfoje prokrastiĝis pro manko de mono por kovri la lokajn elspezojn.

La “helpoj” de la sovetia reviziismo al tiu lando baziĝas sur la jena principo: Antaŭ la komenco de la konstruado, oni unue konstruas belajn kaj komfortajn loĝejojn kaj aĉetas fridoŝrankojn kaj aŭtomobilojn por la “specialistoj”. Nur post kiam ilia ĉiutaga vivo estas bone aranĝita, tiam komenciĝas la “laboro”. Kiam la konstruado estas interrompita pro manko de monrimedoj, kaj la indiĝenaj laboristoj ricevas neniun groŝon dum pluraj monatoj, la nenion farantaj “specialistoj” daŭre ricevas sian altan salajron. Kiam iuj konstruaj projektoj prokrastiĝis je 1-2 jaroj, dum tiu tempo ili simple tiel vivis senfare. Tiamaniere, la mono pruntedonita de la sovetia reviziismo daŭre fluis en la poŝojn de tiuj “specialistoj”.

En la projektado de tiuj konstruaĵoj, la sovetia reviziismo tute ne konsideris la konkretajn kondiĉojn de la “helpata” lando. Ni prenu la lakto-prilaborejon kiel ekzemplon: Tiu lando produktas brutojn, kaj la popolo kutime trinkas laktojn de bovinoj kaj ŝafinoj. Sed la sovetia reviziismo konstruis tiun lakto-prilaborejon en ĝia ĉefurbo, fore de la paŝtaj regionoj, kaj tiu fabriko ja produktas buteron, fromaĝon kaj la t.n. “higienan lakton” k.s., kiujn konsumas nur eŭropanoj. Dum pli ol du jaroj post la komenciĝo de la produktado, ĝi uzis nur kvionon de sia produkta kapablo pro manko de la freŝa lakto, kaj ĝiaj produktaĵoj estas malfacile vendeblaj pro tro alta prezo kaj nekonformo al la kutimo de la vasta popolo.

Ĉu “helpo” aŭ rabado? La respondo estas evidenta, kiam oni ekrigardas la finkonstruitan viando-prilaborejon en tiu afrika lando. Ĝi ĉiumonate povas buĉi 5,000 bovojn kaj estis konstruita de la sovetia reviziismo en pli ol kvar jaroj. Antaŭ ol tiu prilaborejo ekfunkciis, la sovetia reviziismo jam postulis la pagon de interezo en granda sumo. La “helpata” lando do povas fari nenion alian ol forsendi la viandajn produktaĵojn de la fabriko al Sovetio, kiel repagon de la ŝuldo. Laŭ kalkulo, la ŝuldo povos esti finpagita nur post pli ol dek jaroj. Alivorte, dum tiu longa tempo, tiu lando ne nur ricevos neniom da bono, sed, kontraŭe, ĝi devos pagi ĉiujare pli ol 10, 000,000 ŝilingojn (t. e. dudekonon de sia ĝenerala budĝeto) el sia ŝtata kaso por subteni la produktadon de la prilaborejo. Post pli ol dek jaroj, ĝi ricevos nur malnovajn domojn kaj eluzitajn maŝinojn de la fabriko. Estas ne mirinde, ke oni diras ke la “helpo” de la sovetia reviziismo estas simple ĉantaĝo!

Koncerne al la grandaj terkulturejoj konstruitaj de la sovetia reviziismo, ili delonge fariĝis sovaĝejoj plenaj je herboj, arbustoj kaj bestoj. Centoj da traktoroj kaj aliaj agrikulturaj maŝinoj senŝirme kuŝas tie kaj jam difektiĝis pro manko de prizorgo. Ankaŭ la fabelaĵo de la sovetia reviziismo pri “grena bazo” kaj “memprovizado de olea materialo” montriĝis nur sapveziko.



## LA TURKA POPOLO OPONAS NATO-N

La turka popolo aktive disvolvas batalon por insiste postuli ke Turkio forlasu la agresan blokon Norda Atlantika Traktata Organizo superregatan de la usona imperiismo. En Ankaru, la ĉefurbo de Turkio, ĉirkaŭ mil studentoj faris manifestacion. Ili distribuis pamfletojn, esprimante sian firman oponon kontraŭ la nordatlantika bloko. En iu urbo en la okcidenta parto de Turkio, sloganoj kontraŭ NATO estis elpendigitaj ĉe multaj konstruaĵoj.

## SERIOZA FORFLUO DE LA USONA ORO

Sub la ŝtormo de la spekulacia akaparo de oro en okcidenta Eŭropo, sole en decembro de la pasinta jaro, Usono perdis el sia rezervo oron valorantan 925,000,000 usonajn dolarojn. Tio preskaŭ je 100% superis la sumon

de la ora forfluo de Usono dum la tuta jaro 1966. Tiom granda forfluo de oro en unu monato estis senprecedenca en la historio de Usono.

Laŭ la oficiala statistiko de Vaŝingtono, rezulte de la grandkvanta forfluo de la oro, nun la ora rezervo ankoraŭ tenata de la Departemento de Financo de Usono valoras nur 12 miliardojn da dolaroj, t.e., ĝi falis ĝis la plej malalta punkto en 30 jaroj. Kaj el tiuj 12 miliardoj da dolaroj da oro, 10.5 miliardoj da dolaroj estas destinitaj por subteni la enlandan papermonon. Tial, la oro uzebla por la usona registaro internacie valoras fakte nur 1.5 miliardojn da dolaroj.

## 200,000,000 HINDOJ EN MALSATO

En sia artikolo aperigita je la 24-a de decembro, 1967, raportisto de la brita burĝara ĵurnalo *Dimanĉa Spiegulo* malkaŝis: "El la 500-miliona popolo de Hindio, 200 milionoj — jes, 200 milionoj — estas kronike subnutrataj. Kaj la vido de la sufero de malsatantaj infanoj estas neforgesebla... skvama haŭto, ŝvelintaj ventroj kaj maldensaj haroj, kiuj devus esti gagate nigraj, jam blankiĝantaj."

Hindio origine estis lando kun abundaj riĉfontoj kaj riĉe produktis rizon. Tamen, ĉar la reakcia registaro de Hindio donis liberon al la nova koloniismo de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo por kruele ekspluati la popolon, velkas la agrokulturo, kaj tre malmulte enspezas la kamparanoj, tiel ke la hinda laboranta popolo suferas malsaton.



## LA POPOLA ĈINIO MARŜAS TRIUMFE ANTAŬEN

Karaj gekamaradoj,

La ĉina popolo, gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kun la provita marksista-leninista Prezidanto Maŭ Zedong ĉe la kapo, en mallonga historia tempo ŝanĝis sian patrujon de malriĉa malantaŭrestanta lando, premita kaj ekspluatita de imperiistaj fortoj, en landon kun progresanta riĉa ekonomio, en landon kun vera demokratia libereco.

Hodiaŭ la Ĉina Popola Respubliko estas ŝanĝita en reflekseblan

kastelon de la revolucio kaj socialismo, esperon kaj defendilon de la libereco de popoloj, barikadon ne-transireblan por agresantaj planoj kaj mallumaj komplotoj de imperiismoj kun Usono ĉe la kapo kaj kun la perfidaj estraranoj de la Komunista Partio de Sovetunio kiel la centro de modernaj reviziistoj.

La popola Ĉinio marŝas triumfe antaŭen, disvolvante en larĝa fronto la grandan proletaran kulturan revolucion, direktatan persone de la granda respektata gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĉi tio skuas de la fundamento tutajn imperiismajn-reviziismajn fortojn.

Karaj gekamaradoj, por la esperantistoj, la revuo "El Popola Ĉinio" iĝis taŭga kondukilo de la lecionoj kaj pensoj de Prezidanto Maŭ, organo kie la vastaj amasoj de samideanoj de la tuta mondo lernas pri la sukcesoj de la mirinda ĉina popolo.

Vivu niaj du gvidantoj grandaj kaj provitaj marksistaj-leninistaj Maŭ Zedong kaj Enver Hoxha, forĝantoj de la ĉina-albana eterna amikeco!

G. M. (Albanio)

## MIAJ PROPONOJ

Estimata Redakcio,

Estas bonega afero ke EPĈ aperas monate. Tiamaniere legantoj povas ricevi pli freŝajn scion kaj informon. Sed estus plej bone kaj bele se Peking Review — Pekina Revuo — aperus en internacilingva traduko. Mi estas certa ke multaj abonus ĝin, sufiĉe multaj.

Estus bone se vi povus eldoni *Koncizan Historion de Ĉinio* kaj ceterajn bazajn librojn pri Ĉinio. Vi jam faris bonegajn servojn... Vortoj de Prezidanto Maŭ estas bona faro.

J. J. (Finlando)

Sur la

*kovrilo*

Intima konversacio de Prezidanto  
Maŭ kun la soldatetoj de la oka-  
voja Armeo en Jan-an (1939 j.)

Sur la

*dorskovrilo*

La junaj sturmantoj de ŝanhajaj  
ruĝaj gvardioj manifestacias sur  
la strato por kondamni la krimojn  
de la Ĥruŝčov de Ĉinio.

---

### Korekto

Anstataŭ la fotoklarigon pri la  
bildo sur la dorskovrilo de n-ro 2  
oni devas legi jenon: "Sekvante la  
instruon de Prezidanto Maŭ iri  
profunde en fabrikojn kaj kampa-  
rojn por labori kaj kritiki la bur-  
ĝaron kune kun la amasoj de la-  
boristoj kaj kamparanoj, la re-  
volucia amaso de la Filmfarejo  
"Ruĝa Gvardio" en Ŝanhajo ak-  
vumas kune kun la komunumanoj  
la kotonarban kamparon ĉe la  
popola komunumo de Ĉuanŝa-  
gubernio, Ŝanhajo.



# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (117) 1968

## Ĉefa Enhavo

Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon

Eterne Flirtados la Ruĝa Flago de Ginggang-montaro

Fajro de Armita Batalo Flamas tra Azio, Afriko kaj  
Latinameriko

Triumfa Antaŭenmarŝo laŭ la Direkto Montrita de  
Prezidanto Maŭ

La Penso de Maŭ Zedong Flugas trans la Maroj (*poemo*)

Ŝpinteksa Industrio de Ŝandong Plene Superplenumis la  
Ŝtatan Planon

Vizito al Gangdong-brigado

Nova Fizionomio de Hengŝa

Labori Kiel Servanto de la Popolo dum la Tuta Vivo

Li Lianjing, Servistino en Pasaĝera Aeroplano

Niu Hiangjong Resaniĝis

Merkato Prospera, Prezroj Stabilaj

Saviĝo de la Ŝipo "Calliman"

La Granda Kultura Revolucio Stimulas Nin Triumfe  
Antaŭenmarŝi

Ĉinio Antaŭenmarŝas

Rakonto pri Ĉaro da Kotonono

La Usonaj kaj Pupaj Armeoj en Serioza Perdo kaj Demo-  
raliziĝo

"Helpe" aŭ Rabado?



Prezidanto Maŭ instruas al ni: "La subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj absolute ne povas meti la esperon de sia liberiĝo sur la 'prudentecon' de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Nur per plifortigo de sia unuiĝo kaj persistado ĉe la batalo, ili povos gajni la venkon."

# La brilo de la penso de Maŭ Zedong

La venkoj de la granda proletara kultura revolucio multe entuziasmigis la vastajn laboristajn kaj oficistajn amasojn de la ŝanhaja haveno en revolucio kaj produktado. Laŭ la rivero Huangpu, longa je dekoj da lioj, alvenas kaj foriras senĉese grandaj ŝipoj plene ŝarĝitaj en sceno de vicleco kaj prospero. Nun, la vastaj revoluciaj amasoj de la haveno strikte sekvas la grandan strategian aranĝon de Prezidanto Maŭ kaj levas altan tajdon de amasa kritiko kaj granda batalo kontraŭ la Ĥruŝčov de Ĉinio. La amasa revolucia kritiko forte puŝas la revolucion kaj produktadon en la haveno ruliĝadi antaŭen kiel alta tajdo kun ondoj unuj superantaj aliajn.

La proletaraj revoluciuloj de la ŝanhaja haveno afiŝas ĉie pri la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ "Tenu la revolucion kaj stimulu la produktadon", kaj per tio forte instigas la produktan entuziasmon de la laboristoj.



Angulo de la haveno



Kun alta revolucia entuziasmo la proletara revoluciuloj de la haveno streĉe laboras

# lumigas la havenon de Ŝanhajo



Por rapidigi sian subtenon al la socialisma konstruado kaj al la revoluciaj bataloj de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, la laboristoj disvolvas inter si laborkonkurson. La foto montras la laboristojn amasiĝantajn antaŭ la registra tabulo de laborrezultoj post la laboro.



Uzante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon, la laboristoj ĝisfunde kritikas la Ĥruŝčov de Ĉinio en formoj de kunsidoj, kritikaj kunvenoj, dazibaŭoj, nigratabulaj gazetoj ktp.



光焰无际的毛泽东思想万岁!

毛泽东思想是我们一切工作的指南

紧密地团结在党中央周围

以巩固、加强

新华社